
Esperanto en servo de la mondo paco



paco

ORGANO DE LA MEM-SEKCIO DE GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO



1985

Mondvastaj sekvoj de nuklearmila milito

Longdaŭra nuklea vintro grandparte ekstermos la vivon en ĉiuj landoj

En studaĵo, publikigita sub la titolo „Mondvastaj sekvoj de nuklearmila milito kaj la evolulandoj", sovetiaj sciencistoj prezentas la opinion, ke la eksplodo de nuklea konflikto inter Oriento kaj Okcidento trafos la tutan mondon, inkluzive de la evolulandoj, per teruraj postefikoj.
En tiu studaĵo, el kiu ni prezentas la sekvantajn fragmentojn, oni konstatas, ke la homaro devas neniigi la nukleajn armilojn, antaŭ ol ili neniigos la homaron.

En la komenco de la okdekaj jaroj la internacia situacio konsiderinde malpliboniĝis pro la kulpo de pli kaj pli aventuremaj kaj agresivaj rondoj de Okcidento. Tio ege altigis la danĝeron, ke ekestos nuklearmila milito, dum kiu povus esti aplikotaj multaj miloj da nukleaj eksplodiloj.
Dum la nuklea ekvilibro inter Sovetunio kaj Usono, atingita en la komenco de la sepdekaj jaroj, ebligis traktadon pri vico da signifaj soveti-usonaj interkonsentoj koncerne la limigon de nuklea armado kaj la malebligon de nuklearmila milito, kontraŭe en la pasintaj jaroj la situacio konsiderinde malpliboniĝis.
La Unuiĝintaj Ŝtatoj ne ratifikis la SALT-II-kontrakton, subskribitan en 1979 inter Sovetunio kaj Usono. Ili blokis la triflankajn interparoladojn pri ampleksa malpermeso de nuklearmilaj eksperimentoj. Ĝuste ili prokrastis je necerta tempo la ratifikadon de la soveti-usona kontrakto pri limigo de subteraj nuklearmilaj eksperimentoj (la tiel nomata sojla kontrakto), farita en 1974, kaj de la kontrakto pri subteraj nukleaj eksplodoj por pacaj celoj, farita en 1976.
Samtempe la Unuiĝintaj Ŝtatoj procedis al pliintensigo de certaj armeaj kaj teknikaj tendencoj. Ekzemple oni evoluigis raketojn ekipitajn per granda nombro de pluroblaj eksplodkapoj, kiuj ebligas trafi samtempe plurajn celojn; la trafprecizeco estis ege plibonigita. Usono ellaboris programojn por „modernigi" en la plej diversaj formoj la nukleajn armilojn kaj por multobligi siajn potencojn. Ĉio tio ĝenis en konsiderinda grado la stabilecon de la internacia situacio. La konservado de la ekvilibro devigas Sovetunion al adekvata respondo, por ke neniu en Usono havu la imagon pri atingo de gravaj armeaj kaj politikaj avantaĝoj.

La neniigo de la homaro

La senĉesa nuklea armilarkreskigo kondukas ĉiam pli al jena ekkono: La nuklea militdanĝero, kia ĝi ekzistis antaŭ nur 10 ĝis 15 jaroj, minacis la vivon de centoj da milionoj da homoj, sed hodiaŭ la eksplodo de tia milito neniigus la tutan homaron aŭ eĉ ĉiun vivon sur la Tero.
La eksplodo de nuklearmila milito inter la du plej grandaj arme-politikaj aliancoj de nia tempo – NATO kaj Varsovia Kontrakto – disvastiĝus sendube al forta nuklea batalinterŝanĝo, eĉ se ĝi estus gvidata nur sur „limigita" teritorio aŭ kun apliko de nur „malgrandaj dozoj". Kelkaj usonaj politikistoj kaj strategoj kredas en sia naiveco, ke dum konflikto inter la du plej gravaj blokoj eblus interŝanĝi „selektitajn" aŭ pesitajn batojn, gvidi „limigitan" nuklearmilan militon simile al ŝakpartio kaj tiamaniere eviti la venĝobatojn kontraŭ la teritorio de Usono. Sovetiaj militistoj rigardas la gvidadon de „limigita" nuklearmila milito kiel neeblan pro la fakto, ke nuklean batalinterŝanĝon oni ne povas reteni en antaŭe fiksitaj limoj.
La fakto, ke limigita nuklearmila milito ne estas farebla, permesas konkludi, ke nuklearmilaj batoj direktiĝos ne nur kontraŭ celoj en „limigita" batalkampo, sed nepre ankaŭ kontraŭ armebazoj, diversaj specoj de moveblaj trupoj kaj instalaĵoj de la armea infrastrukturo de Usono kaj aliaj NATO-ŝtatoj en ĉiuj partoj de la mondo. Ni aldonu, ke ekzistas politikaj direktivoj de Usono koncerne la gvidadon de „limigitaj" kaj „longdaŭraj" nuklearmilaj militoj en tiuj teritorioj, kie NATO kaj Varsovia Kontrakto konfrontas sin, kiel ankaŭ en pli foraj regionoj.
En tiu konekso oni devas mencii, ke tiuj usonaj armeaj kaj politikaj doktrinoj permesas apliki nukleajn armilojn dum regionaj kaj aliaj lokaj krizaj situacioj en la evolulandoj. El tio rezultas la fakto, ke la „rapidega intervena trupo" destinita por intervenoj estis ekipita per nukleaj armiloj, inkluzive de neŭtronaj armiloj.
Tio malkaŝas la malbonaŭguran karakteron de la usona rifuzo aliĝi al la sovetia sindevigo ne apliki kiel unua nukleajn armilojn. Por Sovetunio tiu ĉi unuflanka konfeso fariĝis fundamento de ĝia ekstera kaj defenda politiko.

Nuklearmila milito damaĝos ĉiujn kontinentojn

En la pasintaj jaroj centoj da milionoj da homoj en Norda Ameriko, Eŭropo kaj en Sovetunio ĉiam pli konsciiĝis pri la ruinigaj sekvoj de nuklearmila milito. Sed ankoraŭ tiuj sekvoj ne estas plene esploritaj, kio lasas do spacon al la plej diversaj iluzioj. Sufiĉe profunde oni esploris la faktorojn de nuklea eksplodo kaj ĝiajn sekvojn je la senpera vivomedio. Ĉefe dank' al la penoj de kuracistoj estiĝis emocia, drameca bildo pri la sekvoj de nuklea batalinterŝanĝo en la operacaj teritorioj. Sed ĝis nun oni ankoraŭ ne sukcesis havigi al si plenan klarecon pri tio, ĉu iuj teritorioj sur la terglobo eventuale restus netuŝitaj de la postsekvoj de nuklearmila milito.
En granda zorgo pro la kreskanta danĝero de nuklearmila milito, sciencistoj el Okcidenta Eŭropo, Sovetunio kaj Usono faris esplorojn en tiu vivnecesa sfero, kiuj kondukis al vico da novaj pliaj ekkonoj rilate al la sekvoj de milito. Oni samopinias, ke la plej gravaj sekvoj havus vere tutmondan karakteron kaj disvastiĝus al Latina Ameriko, Afriko, Suda Azio, Oceanio kaj Aŭstralio – per aliaj vortoj al ĉiuj partoj de la mondo. Sciencistoj de diversaj landoj venis al tiu ĉi konkludo, analizinte la datumojn, kiujn oni kolektadis dum jardekoj pri faktoroj influantaj la mondan klimaton. Helpe de plibonigitaj matema-

tikaj metodoj estas eble analizi komplek-sajn fenomenojn, kaj la progreso de la komputada tekniko permesas al ili pli kaj pli kopii komplikajn fizikajn proce-sojn kaj fenomenojn. Antaŭ 10 ĝis 15 jaroj tio ankoraŭ ne eblis.
El tiu ĉi studaĵo evidentu, ke eksplodo de nuklearmila milito trafus la tutan mondon, inkluzive de la evolulandoj per siaj teruraj sekvoj. Sciencaj esploroj, faritaj de matematikistoj, fizikistoj, meteologoj, biologoj, ekonomikistoj kaj sociologoj ebligis prognozi la tutmondan karakteron de la sekvoj, rezultantaj el tia ruinigo fare de la homaro mem, kaj la katastrofajn situaciojn sekve de la ŝanĝoj en la termodinamikaj kondiĉoj de tia altevoluinta ekologia sistemo, kiel tiu de la Tero.

Longdaŭra nuklea vintro

En siaj konsekvencoplenaj kaj fakte ne-antaŭvideblaj kromefikoj konsistas la diferenco inter nuklea konflikto kaj ĉiuj aliaj militoj, kiujn la homaro dum sia historio konis, same kiel inter ĝi kaj ĉiuj ajn naturkatastrofoj. La kaŭzo estas la enorma liberigo de energio dum la detonacio de nukleaj armiloj. Ĝuste tiuj kromefikoj decidas pri la destino de tiuj, kiuj sukcesus transvivi nuklean eksplodon. Nuntempe ni ankoraŭ ne kapablas ekkoni ĉiujn sekvojn, kiujn povus kaŭzi nuklearmila milito por la homaro kaj la medio. Sed ni scias precize, ke certaj tutmondaj sekvoj en neniu kazo permesos persisti en la iluzio, ke iuj malproksimaj mondregionoj havos senzorgan „postmilitan" estontecon. Nuklearmila milito signifas katastrofon por ĉiuj – sen escepto, ĉar la Tero estas tro vundigebla.
Nun ni parolu pri la faktoj. La atmosfero, unu el la plej gravaj komponantoj de la medio, estas vivnecesa por la homoj kaj ĉiu vivo sur la Tero. Same kiel ĉiu alia organismo la homo spiras aeron, konsumas oksigenon. La karbona dioksido de la atmosfero kaj la sunradioj atingantaj la tersurfacon garantias la fotosintezon, kiu provizas la homon kaj la tutan faŭnon per nutraĵo. La ozontavolo de la stratosfero (en alto de pli ol 15 ĝis 20 km) ŝirmas la vivon kontraŭ la mortigaj ultraviolaj radioj.
La suna energio estas absorbata de la tersurfaco, de akvoj kaj de la atmosfero kaj varmigas ilin en diversa grado, depende de la latitudo kaj la jarsezono. Tiu ĉi diferenca varmigo movas la atmosferon kaj la akvojn kaj formas la klimaton, al kiu adaptiĝis la ekologiaj komunumoj kaj la homo.
Esploroj de la naturaj klimataj ŝanĝoj montris, ke la evoluproceso de la klimata sistemo de la Tero (akvoj, tersurfaco, atmosfero, glacio, biosfero) progresas sufiĉe malrapide – en la daŭro de jardekoj aŭ de ankoraŭ pli longa tempospaco. Tutmondaj katastrofoj, kiel ekzemple mondvasta nuklea konflikto, kondukus al multe pli grandaj ŝanĝoj en la atmosfero kaj aliaj komponantoj de la klimata sistemo, ol tio okazus sub normalaj kondiĉoj, kaj endanĝerigus tiamaniere ĉiujn vivestaĵojn.
La komencaj kondiĉoj por detala scienca analizo estas klaraj. La uzo de nur malgranda parto de la ekzistanta nuklea forto (10 ĝis 20 %) kondukus al incendioj de arbaroj sur teritorio de pli ol 1 miliono da km^2. Urboj, uzinoj, instalaĵoj de nafta kaj tergasa ekspluatado kaj la respektivaj tavoloj samtempe ekbrulus. La detonacio jetus en la atmosferon amasegojn da polvo kaj da aliaj etaj eroj. La tie estiĝanta ĉeno de kemiaj reakcioj detruus la ozontavolon de la stratosfero en alto de 20 ĝis 30 km.
Laŭ la eksplodoj de atombomboj super Hiroŝima kaj Nagasaki kaj laŭ la rezulto de atmosferaj testoj en la 50aj kaj 60aj jaroj oni ekkonis, ke dum la eksplodo estiĝas temperaturoj ĝis 2 000 gradoj C, kiuj kaŭzas fajron kaj fajroŝtormojn kun ventrapideco ĝis 50–100 km/h. La vento disŝutas polvon kaj brulrestaĵojn (cindron, fulgon ktp.) tra vastaj distancoj. En la regiono, kie furiozas la detonacioj kaj la fajro, la sunradioj apenaŭ atingas la tersurfacon. La nubo, kiu estiĝas rezulte de la detonacio, kovrus dum du ĝis tri semajnoj la tutan terglobon. La homaro estus sen suno.
Ju pli malmulte da sunradioj atingas la tersurfacon, des pli malvarme estos sur ĝi. Se poste ĉiuj sunradioj estas absorbitaj de la fum- kaj polvonubo, kiu disvastiĝis super la tuta Tero, la tersurfaco malvarmiĝus je kelkaj dekduoj da gradoj.

La esploroj de Carl Sagan

La esploroj, kiujn faris Carl Sagan kaj liaj kunlaborantoj (Usono, 1983), montris, ke la detonacio de eksplodserio de kelkmiloj da megatunoj de TNT faligus la temperaturon sur la tersurfaco dum unu aŭ du semajnoj al –15 ĝis –25 gradoj C. Laŭ pli precizaj kalkuloj de prof. Schneider kaj liaj kunlaborantoj de la Nacia Akademio de Sciencoj (Usono, 1984), nur kelkaj tagoj post nuklea konflikto la temperaturoj de la aero proksime de la tersurfaco falus je meze 20 gradoj C.
Farante pli longdaŭran prognozon, prof. V. Aleksandrov kaj liaj kunlaborantoj (USSR, 1983) priskribas, kiel jam unu aŭ du semajnoj post la eksplodo de la konflikto fluegoj de malpurigita aero el la norda hemisfero penetros en la sudan hemisferon, kio ankaŭ estas ligita kun falo de temperaturo. Laŭ tiu prognozo la temperaturo estus falinta jam en la 40a tago post la komenco de nuklea konflikto, super Alasko je 35 gradoj, super Eŭropo je 50 gradoj kaj super la duoninsulo Kamĉatko je 40 gradoj C. La frostoondo kovrus ne nur la mezajn latitudojn, sed ankaŭ la tropikan zonon kaj la sudan hemisferon: sur la araba duoninsulo oni povus registri temperaturfalon je 51 gradoj kaj en Meza Ameriko je 20 gradoj C.
En la tropikoj kaj en la suda hemisfero la malvarmiĝo povus havi ankoraŭ pli drastan realan efekton. La tera atmosfero havas du ĉefajn centrojn de la cirkulado, ĉe kio la aeramasoj de ambaŭ hemisferoj estas dinamike disigitaj unu de alia. En kazo de forta malpurigo de la aero en la norda hemisfero estus rimarkebla kontrasto de temperaturo inter ambaŭ hemisferoj. Laŭ konformaj prognozoj ŝanĝiĝus la moviĝado de la atmosfero, kaj formiĝus stabila, grandega centro de cirkulado, dum kio la aero el la norda hemisfero fluas en la sudan hemisferon. Plue la aero estus ĉi tie ege ŝarĝita de fulgo kaj polvo, kio kondukas al ĝia kroma malvarmiĝo super la kontinentoj de la suda hemisfero.

Glaciigaj temperaturoj ĉe la ekvatoro

Resumante la rezultojn de la esploroj faritaj sendepende unu de la alia en diversaj landoj, oni povas diri kun certeco, ke la malvarmiĝo varius inter 30 ĝis 50 gradoj C. Tio signifas, ke eĉ en la tropikoj la temperaturo falos sub la nulopunkton. Estas vere paradokse, ke incendioj en la militaj operacaj teritorioj povas kaŭzi nul-temperaturojn aŭ frostveteron en foraj regionoj – eĉ dum somero kaj ĉe la ekvatoro.
Se la supraj tavoloj de la malpurigita atmosfero troviĝas en la radia sfero de la suno, ili estus varmigitaj pli intensive ol nun, kio kaŭzus malrapidan malaperon de la troposfero – la suba tavolo de la atmosfero, en kiu la temperaturo malkreskas laŭ la alteco. Per tio la atmosfero estus trostabiligita. La malapero de la troposfero subpremus la vertikalan moviĝon de la akvovaporo, kio kaŭzus drastajn ŝanĝojn en la akvocirkulado de la atmosfero – ni baraktus kontraŭ ega frostsekeco sur ĉiuj kontinentoj. Okazus konsiderinda malrapidiĝo en la forlavado de la nuklea malpuraĵo el la atmosfero. Tial oni supozas, ke sub la kondiĉoj de forta nuklea malpurigo la natura mempurigado de la atmosfero ankaŭ okazos pli malrapide ol nun.
Pro sia granda varmoinerteco la maroj malvarmiĝos pli malrapide. Laŭ taksoj falus la temperaturoj de la marsurfaco dek monatoj post la estiĝo de nuklea konflikto je meznombre 1,2 gradoj C. Sekve la aero malvarmiĝus super la marsurfaco je „nur" kelkaj gradoj, kio tute sufiĉas por estiĝo de longtempdaŭra nebulo. La enormaj temperaturdiferencoj

inter la malvarmiĝinta tersurfaco kaj la nur malrapide malvarmiĝantaj akvoj kaŭzus super vastaj marbordaj regionoj fortajn ŝtormojn, akompanatajn de forta neĝado. Tio aliflanke signifus, ke ekestus longa „nuklea vintro" sur la tuta Tero, sendepende de la jarsezono.
En la interno de la kontinentoj okazus pluvoj proksime de frostopunkto, la kultivejoj estus detruitaj kaj dombestoj, kiuj eble povus transvivi la frostoondon, mortus pro soifo, ĉar la trinkakvo estus en la regulo frostiĝinta.

Mortado de tropikaj arbaroj

La formortado de la tropikaj arbaroj dum „nuklea vintro" estas ligita kun multobla altiĝo de la reflekta kapablo de la teritorioj okupataj de ili. Kaj eĉ post kiam la atmosfero restarigis ilian originan diafanecon, tiuj ĉi regionoj ricevus daŭre pli malmulte da sunenergio. Sekve la energibilanco de la klimata sistemo de la Tero ŝanĝiĝus laŭkvalite kaj longdaŭre, kaj la klimato same kiel poste ankaŭ la biosfero, alprenus novan formon, kies karakterizaĵoj tamen estas malfacile antaŭvideblaj. Verŝajne mankos en tiu ĉi nova formo antaŭ ĉio pli altaj formoj de la vivo, kaj tio supozigas, ke la homo ne havos lokon en tiu ĉi bildo.
La jam priskribitaj sekvoj montras nur malgrandajn diferencojn ĉe la unuopaj formoj de nuklea militado. Eĉ se eksplodilo de 100 megatunoj eksplodus super grandaj urboj, la temperaturo de la aero ĉe la tersurfaco en la mezaj latitudoj falus dum monatoj sub la frostopunkton ĝis −23 gradoj C. Ankaŭ la situo de la batalejo iomete gravas. Okaze de eksplodo de mondvasta nuklea konflikto ekaperus la klimataj sekvoj en la norda hemisfero post kelkaj tagoj kaj en la suda hemisfero post kelkaj semajnoj. Sed se eksplodos loka nuklea konflikto ie sur la Tero, la aerfluoj disĵetus la nuklean polvon dum unu monato super la nordan hemisferon, kaj post unu plia monato la suda hemisfero estus same trafita.

Morto per radioaktiva precipitaĵo

Nuntempaj imagoj pri la ĝenerala cirkulado en la atmosfero estis ankaŭ la fundamento por la kalkuloj rilate al la disvastiĝo de la radioaktiva precipitaĵo el diversaj nukleaj militscenejoj. Oni taksas, ke la radioaktiva kontaminado estas pli granda ol antaŭe supozite, kaj ke la precipitaĵo disvastiĝos dum multaj tagoj kaj semajnoj super vastaj teritorioj. Ekzistus ankaŭ „ardaj lokoj" en kiuj la radiado multoble superas la mezan valoron. La detruo de nukle-energiaj centraloj kaj instalaĵoj por prilaborado kaj stokado de nukleaj brulaĵoj sekvigus preskaŭ duobligon de la meznombraj radiodozoj en la norda hemisfero, kio signifus la morton de la postvivintoj.
Ĉio tio signifas, ke – en kiu ajn formo estus gvidata nuklearmila milito – la postvivintoj de la unua bato devus vivi en terura malvarmo, povus disponi nek pri akvo, nek pri nutraĵoj kaj brulaĵoj, estus elmetitaj al forta radiado, damaĝaj substancoj kaj malsanoj kaj devus ekzisti sub ega psikologia streso – kaj ĉio tio en krepuska lumo aŭ eĉ en tuta mallumo. Nuklearmila milito signifus aŭ neniigon de la homa raso aŭ la degradadon de postvivantoj al antaŭhistoria ŝtupo.

El „Neue Perspektiven" n-ro 1/85
tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Jan Kafka

Quo vadis genus humanum?

Dum la lastaj jaroj la materia progreso multege superigis la moralan sferon de la homa pensado. La mondo estas plenigita per arsenaloj plenŝtopitaj kun danĝera armilaro kaj la monda industrio fabrikas senĉese armilojn pluajn. Problemoj en la mondo amasiĝas. Malgraŭ la plena ĉirkaŭigo de socialismaj ŝtatoj, USONO liveras al Eŭropo pluajn raketojn. Nun ĝi lanĉas eĉ kampanjon por armigado de la kosma spaco. Oni perfortigas la moralajn nociojn donante al ili tute alian signifon. La nunaj disĉiploj de Goebbels jam superas la iaman majstron de la mistifika propagando. „Historia – vitae magister" registras: „Generacio, kiu travivis la imperiisman militon ne scias jam imagi la vivon sen mensogo. Fakte, ili ne toleras la imagon, kiom multe da homoj devis perei nur pro tio, ĉar kelke da ekspluatistoj volis havi la merkatojn kaj vivigi la negocojn. Tial oni devis surdigadi ĝin per grandaj vortoj kiel nacio, demokratio, libereco." Jen la vortoj de fama germana verkisto Lion Feuchtwanger skribitaj ĝuste antaŭ 45 jaroj.[1]
Nuntempe denove la samaj fortoj volas eksplodigi novan militon kaj denove en la nomo de Dio, demokratio kaj libereco! Tiuj ĉi fortoj ne strebas bonfarton de ĉiuj homoj, ĉar ĝuste en tiu ĉi sociala sfero ili multe ŝparas por povi pligrandigi la jam tre enormajn sumojn eldonatajn por la superflua vetarmado. Ili planas ne la feliĉan vivon de ĉiu homo sur nia planedo, sed tute male, ili preferas elspezi la monon por nemoralaj krimaj planoj de la armigado de la kosma spaco! Ĉion ĉi – nur por la superrego de la mondo! Por akiri tiun ĉi celon ili ne hontas praktiki eĉ terorismon en la servoj de la ŝtato!
Ĉu la homo vivu sub tiaj perspektivoj? Ne, tute ne! Ĉiam pli kaj pli da racie pensantaj homoj sin defendas, protestas, avertas emfazante, ke ne eblas plu solvadi la problemojn per uzo de milito. La sorto de la homaro dependas nun nur de la malarmado kaj de la paca kunlaboro, ĉar en kazo de uzo de la nukleaj armiloj minacas al la homaro pereigo de ĝia tuta civilizacio kaj de ĉia vivo sur nia terglobo! Mem Goethe kreante sian unikan verkon pri Faust, kvazaŭ li antaŭsentus minacantan danĝeron en la estonta evoluo de la homa socio, jam tiam li skribis jenajn avertajn versojn:

Pensu, al kiu
Vi apartenas!
Kia ĉagreno,
Se vi distrenas
Bele gajnitan
Ordon ĉe ni.[2]

Kion Goethe antaŭ 150 jaroj en sia poeta vizio nur parte antaŭsentis, tio en nia tempo tutplene realiĝas kaj la nunan danĝeran situacion de la homaro trafe konkretigis nia elstara poeto Raymond Schwarz:

Kial vivon plilongigi
kiu estas duontomb',
se minacas nin mortigi
morgaŭ jam la atoma bomb'?[3]

Ni do demandas: Kien vi iras homa gento? Ĉu al sia propra pereigo aŭ al paca internacia kunlaboro? Ĉu ne sufiĉis la doloraj suferoj de milionoj da viktimoj en la dua mondmilito? Ni vokas tial: Homoj, haltiĝu! Konsciiĝu, ke al la fundamentaj homaj rajtoj apartenas ĉefe la rajto je la vivo, la rajto je laboro kaj la rajto je paco! Konsciiĝu, ke la riĉaĵo de la mondo devas servi al la la bono de la homoj, ne al ilia pereo! Ni ĉiuj ja volas pacon! Ni do preparu ne la militon, sed la pacon! La pacon por ni kaj por niaj generacioj! Jen nia respondeca tasko antaŭ la historio! Plenuminte ĝin, ni povos poste tute kontentige diri kun Goethe:

Ĉi tie, rajte, homas mi![4]

[1]) Lion Feuchtwanger: **Exil**, Aufbau-Verlag, Berlin 1963
[2]) El Faŭst II, Helena: Versoj 3–8
[3]) R. Schwarz: ĝis cent kvindek! E-Antologio p. 270
[4]) Traduko de d-ro Karl Schulze

AKVON, MI PETAS!

Tiel nomiĝas broŝuro, kiun eldonis Hukuoka Esperanto-Societo, Ĉe Nisida Mitunori, Heiwa 2-2-206, Minami-ku, Hukuoka-si, 815 Japanio, 64 p., 21 × 14 cm. La vortoj de la tradukinto je la lasta paĝo klarigas ĉion. Mi citas:

„Post s-ano YUI brulmortigis sin, baldaŭ niaj volontuloj ekpensis pri traduko de la travivaĵoj de atomviktimoj por ekzerci. Post nelonge en 1972, okaze ni trovis la broŝuron, „Mizu o kudasai", kaj ni komencis traduki dividante la laboron. Ĝi feliĉe procedis glate kaj proksimiĝis al la fino, kiam HUKUNAGA-Isao kaj aliaj proponis pri ĝia eldono. Tiel la plano eldoni komenciĝis. La aŭtoro ĝojis kaj eĉ kuraĝigis nin. Tamen baldaŭ bedaŭrinde ĉefaj koncernantoj falis en malsanon unu post alia kaj ni devis forĵeti la planon. Sed post longa tempo ili fine reprenis viglecon, do ni refoje planis.

Nu, dum ĉi tiu longa tempo monda situacio multe ŝanĝiĝis, pro tio ni bezonis denove reekzameni pri praveco de publikigo. Rezulte de tio ni decidis la publikigon pro jenaj kialoj:

1. La teksto havas elstaran originalecon: 1) freŝa metodo pri ĝia redakto 2) supereco de ĉiu legaĵo 3) preciza kritiko, kiu estas en pasinteco, sed tre valora eĉ nun.
2. En Esperantaj eldonaĵoj ne ekzistas tiu de la sama speco, tiel ni devas nepre eldoni.
3. Ĉe nuna maltrankvila situacio en la mondo pro nuklearmiloj nenio estas pli taŭga ol ĉi tiu broŝuro por alvoki pri la terurego de nuklearmiloj al eŭropanoj kaj amerikanoj.

Estas tre ĝoje, ke nun ni povas publikigi la tradukon post longaj zigzagoj. En tia tempo, se nia traduko rezultus kontribui por gardi mondpacon, tio estas nia granda feliĉo kune kun la animoj de atomviktimoj.

Laste ni kore dankas s-ron SAKA-Tadasi por la kunlaboro kaj s-rojn UEYAMA-Masao kaj TANAKA-Sadami respektive por la traduko de la poemo.

Hukuoka Esperanto-Societo
Prezidanto UMEZU-Sumitaka
Aŭgusto, 1984"

Por pli bone montri la karakteron de la broŝuro mi citas unu atestaĵon:

OGINO-Mitiko
knabino, tiam 10-jara,
bombita en loko 1,5 km
for de la eksplodocentro.

Estis sennuba kaj bela tago. Mi estis ludanta ‚kuiradon' kun miaj fratinoj en la unua etaĝo de nia domo. Tiam Panjo jam iris al la legomĝardeno preni melongenojn. Ĉe la ekiro ŝi ordonis al ni, „Je la 11-a faru fajron en la portebla forneto". La ludo estis tiel plezura, ke neniu el ni sin levis, kiam la horloĝo batis dek unu fojojn. Ni estis daŭre absorbitaj en la ludo.

Senintence mi levis la kapon kaj vidis la fenestron. Ĝuste tiam ekbrilis fulmo: „Oho . . ." mi diris. Mia korpo ŝanceliĝis. Post momento mi estis jam enfermita sub la falinta domo kaj ne povis moveti. Ju pli mi provis eliĝi, des pli mi sentis doloron. Do mi ne havis rimedon, krom resti senmove kaj observadi eksteran staton . . . Figuroj de la du pliaĝaj fratinoj vidiĝis ekstere. Mi estis tre ĝoja. „Helpu, helpu min!" Mi kriegis en granda ĝojo. La voĉo atingis la orelojn de la fratinoj. Ili tuj alkuris al mi kaj provis eltiri min el tie. Sed plektitaj bambuoj en tera muro apartigis nin, kaj ne cedis al puŝo aŭ tiro de miaj fratinoj. La plej aĝa fratino kuraĝigis min per tremanta voĉo. „Eltenu, tuj Paĉjo kaj Panjo revenos ĉi tien. Mi iru venigi iun helpanton."

Ŝi foriris. Mi fikse rigardis eksteron apenaŭ travideblan tra la interspaco de la plektitaj bambuoj, atentadis, ĉu venos Paĉjo, ĉu venos Panjo.

Baldaŭ la plej aĝa fratino revenis kun kelkaj marsoldatoj, kaj dank' al ilia forto mi estis liberigita.

Elirinte eksteren, antaŭ ĉio mi estis konsternita. Malgraŭ ke la tago estis tiel bela ĉe la mateno, nun ĝi havas tian teruran aspekton kun nigraj nuboj erupciantaj kaj moviĝantaj en la tuta ĉielo. Mi ŝanceliĝis kaj ekiris al la ŝirmejo, tiam aŭdiĝis el sub la domo malforta krio „Helpon . . . Oĉjo!"

Tiu estis voĉo de nia juna frato. La plej aĝa fratino, kiu eble aŭdis la krion unua, tuj kuris al la loko kaj sukcesis eltiri lin forigante multajn tegolojn. Tiam apenaŭ aŭdiĝis plorado de alia loko. Tiu estis dujara fratino premata sub la falinta domo. Ni rapide iris tien kaj trovis la freneze ploregantan fratinon premata inter grandaj traboj. Ni ĉiuj kune, helpataj ankaŭ de la marsoldatoj, provis forigi la grandegajn trabojn, tamen ili tute ne moviĝis pro tio, ke la trabaro konsistas el kvar traboj sinsekve alligitaj. La fratino baraktis svingante ambaŭ manojn, ĉar la piedo premata de la grandaj traboj dolorigis ŝin. Kion ni faru? La marsoldatoj fine diris: „Ni ne povas." Tiam alia homo venis peti helpon de la marsoldatoj, kaj ili forkuris savi homon el alia falinta domo. Poste restis ni gefratoj, nur geknaboj.

Kion Panjo faras malrapideme en la legomĝardeno? Frue revenu al ni! Kial Paĉjo ne revenas? Piedo de la fratineto deŝiriĝus . . . Mi estis en granda embaraso, kaj nur ĉirkaŭrigardis starante sur la piedpintoj . . . Tiam mi rimarkis homon sagrapide alkuranta de malproksime kun la hararo hirta, kaj tiu estis virino. Ŝajne senvesta. Korpo violeta. Ŝi laŭte alvokis nin. Ho! Tiu estis Panjo. „Panjo!" Ankaŭ ni laŭte vokis al ŝi. Nur tiam ni sentis nin sekuraj.

Tie kaj ĉi tie ekbrulis. Najbara onklo aperis de ie kaj penis kun sia tuta forto forpreni la trabojn, kiuj kaptis la piedon de la fratino, sed ili ne moviĝis kiel antaŭe. La onklo ĝemis senespere kaj bedaŭre diris al ni, „Estas nenia helpo . . . mi rezignu." Li kapoklinis kaj foriris. Tute proksime ekbrulis. La vizaĝo de Panjo fariĝis morte pala. Paĉjo ankoraŭ ne revenis. Panjo rigardis de supre la fratineton, kies malgrandaj okuloj ankaŭ rigardis supren.

Panjo movis okulojn kaj esploris kiamaniere la traboj kuŝas unu sur alia. Post nelonge Panjo enŝoviĝis en aperturon sub la traboj kaj metis sian ŝultron sub unu parton de la trabo. Mordante la malsupran lipon ŝi streĉis fortojn de la tuta korpo, „Unu . . ." Kun grinco la traboj leviĝis supren. La piedo de la fratineto liberiĝis, kaj la plej aĝa fratino tuj eltiris la fratineton. Ankaŭ Panjo suprenvenis kaj la fratineton forte ĉirkaŭpremis en siajn brakojn.


Nur post kelka tempo ni komencis ploregi. Aŭdante la ploradon Panjo senforte kaŭriĝis tie, ĉu pro malstreĉiĝo. Nur tiam por la unua fojo mi povis trankvile rigardi la staton de Panjo. Panjo estis bombita en la legomĝardeno, kiam ŝi deŝiris melongenojn por doni al ni kiel tagmanĝon. La bluzo kaj pantalono de Panjo brulŝiriĝis kaj ŝi estis preskaŭ nuda. La hararo krispiĝis kaj ŝiriĝis mallonge kaj ruĝiĝis, kvazaŭ ĝi estus frizita tro forte. La haŭto de la tuta korpo difektiĝis pro brulvundego. Nur ĉe la dekstra ŝultro puŝlevinte la trabojn, la haŭto deŝiriĝis, karno vidiĝis kaj ruĝa sango eksudis senĉese.

Panjo senforte falis. Tiam Paĉjo alkuris ŝanceliĝe. Ankaŭ Paĉjo brulvundiĝis.

Panjo komencis suferi kaj post agonio mortis en tiu nokto.

Prezentite de Ludwig Schödl

„Astromilitoj" – Haltigenda ĉielira komando



de prof. d-ro rer. nat. h.c., d-ro med. h.c., d-ro paed. h.c. Manfred Baron von Ardenne

Nia aŭtoro: Profesoro d-ro rer. nat. h.c., d-ro med. h.c., d-ro paed. h.c. Manfred Baron von Ardenne (Barono de Ardenne) estas direktoro de la „Instituto Manfred von Ardenne" en Dresdeno. Manfred von Ardenne naskiĝis en 1907. Jam kiel 16-jarulo li ricevis sian unuan patenton. Li estas unu el la pioniroj de la radiofonia tekniko, de la radartekniko kaj de la elektrona televido. En 1937 li inventis la rastadan elektronan mikroskopon. De 1945 ĝis 1955 li laboris en Sovetunio kaj organizis kiel ĉefo de esplorinstituto pri nuklea fiziko ĉe Suĥumi la evoluigon de metodoj por industrinivela disigo de izotopoj komune kun Gustav Hertz, Max Steenbeck kaj Peter Adolf Thiessen. El la dresdena esplorinstituto ekde 1955 venis i.a. la plurkamera elektronradia forno, elektronkanonoj de plej alta radiokapacito kaj plasmo-instalaĵoj, krome la plurpaŝa oksigenterapio. La nomo de Barono de Ardenne ligiĝas kun 600 sciencaj publicaĵoj kaj kun pli ol 500 patentoj, li skribis pli ol 30 sciencajn librojn.

Ankoraŭ sub la senpera impreso de la eksplodoj de atombomboj super Hiroŝimo kaj Nagasako Albert Einstein en la jaro 1946 sin turnis al la publiko per deklaro, kiu nuntempe minimume same aktualas kiel antaŭ 39 jaroj. „Neniam ĝis nun eblis, ke unu popolo povis militi kontraŭ alia sen sendi sian armeon trans siajn landlimojn", li skribis. „Sed nun pro la invento de raketoj kaj atomboboj jam neniu loĝantara centro sur la tuta tersurfaco estas sekura kontraŭ subita detruo per ununura atako."

1. Einstein opiniis perfektan ŝirmilon neebla

Eĉ se post multjara esplorlaboro oni povus produkti „defendilon" kontraŭ alflugantaj raketoj, tiu „tute ne povus esti perfekta". „Se nuntempe ununura raketo kun nuklea eksplodkapo atakus Minneapolis-on, tiu urbo estus preskaŭ samgrade detruita kiel Nagasako. Kugloj mortigas homojn, sed atombomboj mortigas urbojn. Kirasaŭto povas rezisti al hajlo de kugloj, sed kontraŭ armilo, kiu kapablas detrui la tutan civilizacion, la naturscienco konas nenian ŝirmilon." Elirante de tio, la patro de la teorio de relativeco pledis por la neceso de „nova speco de pensado, se la homaro pluekzistu kaj evoluu ĝis pli alta nivelo".[1] Tio estis skribita en tempo, dum kiu Usono kiel sola lando posedis atombombojn kaj tiujn ankaŭ nur malgrandnombre. Tiom pli akre prezentiĝas tiu problemo nuntempe, kiam en la arsenaloj de la atompotencoj troviĝas laŭtakse 50 000 ĝis 60 000 nukleaj eksplodiloj, kiuj sufiĉas por neniigi 7 000 urbojn de la grandeco de Hiroŝimo. Alie dirite: Per la ekzistanta neniiga potenco eblus fari 6 000 militojn kiel la Duan Mondmiliton, kondiĉe ke la homaro transvivus eĉ nur la unuan „batinterŝanĝon". Pli kaj pli preme elformiĝas la profundeco de la abismo inter tio, kio estas farebla por la bonfarto de la homoj kaj la malŝparado de homaj riĉfontoj por pli kaj pli da armiloj, rezultigantaj malpli kaj malpli da sekureco. Tiun tragikan misproporcion mi travivas en la individua sfero preskaŭ ĉiutage sekve de la larĝa spektro de niaj esploroj sur fizika-teknologia, sur naturscienca kaj sur medicina kampo.

2. Pri devigo al pli altgrada armado kulpas Usono

La ĉefa kaŭzo por tiu ĉi doloriga fakto verŝajne kuŝas en tio, ke la altarmada politiko de imperiismaj rondoj, motivita en la profitstrebado kaj dezirego je regado de la mondo, devigas Sovetunion kaj ties aliancanojn fari ĉion necesan por la konservo de la militstrategia ekvilibro kaj per tio por la stabileco en la mondo. Estas historie pruvita fakto, kontestita eĉ de neniu serioza okcidenta scienculo, ke la militista-industria komplekso de Usono estis kaj ĝis nun estas la „antaŭrajdanto" de la vetarmado. Dum simpozio de Max-Planck-Societo en majo 1984 en la kastelo Ringberg ĉe Tegern-lago prof. d-ro Wolfgang K.-H. Panofsky, direktoro de Stanford Linear Accelerator Center (Usono) pruvis, ke Usono ekde la invento de la atom- kaj hidrogenbombo tra per atomraketoj armitaj submarŝipoj ĝis mezdistancaj raketoj kaj raketoj kun pluraj sendepende celprogrameblaj nukleaj eksplodkapoj ĉiam denove turnis la armadan spiralon.[2] Ĉiun novan paŝon de la evoluigo de armiloj oni pravigis per la tezo, ke Usono perdis terenon kontraŭ Sovetunio kaj ke oni per asigno de pli kaj pli grandaj monsumoj de miliardoj por armadaj programoj devus fermi la „fenestron de vundebleco". Poste ĉiam evidentiĝis, ke tia fenestro neniam ekzistis, sed ke la sekreta servo CIA intence alte taksis la sovetian potencon por klarigi la laŭdiran necesecon de usona „postarmado".

3. Kontribuo al nuklearmila pato

Posedante dumtempan kaj partan avantaĝon Usono faris ĉion por ludi tiun atuton kontraŭ Sovetunio en intertraktadoj kaj por ĉantaĝi koncesiojn de ĝi. Trotaksante siajn verajn eblojn kaj samtempe negante la sovetiajn la strategoj de Pentagon ne atentis, ke Sovetunio tamen kapablas restabiligi la ŝanceliĝintan ekvilibron. Tion ĝi pruvas hodiaŭ kaj tion ĝi pruvis dum la malfacilaj jaroj post la Dua Mondmilito, kiam estis grava rompi la usonan monopolon pri atombomboj. Kiel sciencisto, tiutempe laborinta en So-

vetunio, mi same kiel kelkaj el miaj germanaj kolegoj komprenis la neceson rapide atingi la nuklearmilan paton kaj uzis miajn scion kaj povon por la solvado de tiu ĉi tasko, de kiu esence dependis la konservo de la paco. Ne laste pro la sperto el tiuj jaroj mi plene konsentas la pritakson, kiun donis Erich Honecker en februaro ĉijare dum parolado al la ĉefsekretarioj de subdistriktaj partiestraroj de SUPG: La decidigan kontribuon por malhelpo de nuklearmila infero faras USSR. Estas unuavice ĝia merito, ke la militstrategia ekvilibro estis atingita kaj restas konservata. Senlace USSR komune kun la aliaj socialismaj ŝtatoj agadas cele al ĉesigo de la vetarmado, al malaltigo de la nivelo de armea konfrontado kaj al porĉiama forigo de la nuklearmila militdanĝero.[3]

4. Defio de la monda konscienco

Kun eksterordinara malkvieto ni, ĉiuj pacamaj homoj, nun sekvas la planojn de gvidaj rondoj de Usono eskaladi la vetarmadon ne nur sur la tero, sed ankaŭ en la kosmon, kvazaŭ fari la ĉielon antaŭkorto de la infero. Tiu intenco de la plej agresemaj rondoj de la imperiismo, konata kiel „astromilita programo", nuntempe prezentiĝas kiel la plej granda defio de la monda konscienco. 40 jarojn post la venko super la hitlera faŝismo kaj post la liberigo de la germana popolo de sub la nazia barbareco ni, la tuta homaro, staras antaŭ la plej severa minaco al la mondpaco. La ekzistado de ĉia vivo sur nia tero estas endanĝerigita kiel neniam antaŭe. Temas pri la ekzisto de la popoloj, pri la ekzisto de ĉiu individuo. Aŭtoritataj politikistoj en Vaŝingtono ne laciĝas oferti tiun – kiel ili oficiale nomas ĝin – „Strategian Defendiniciativon" (SDI) kiel miraklan drogon, kiu laŭdire liberigus la homaron de ĉiuj malbonoj. Ĉe tio ili celas al la en Usono vidalvide al la senbrida antaŭarmigo pli kaj pli disvastiĝantaj timo kaj necerteco. Tiu timo estas formulita en la episkopa letero de la usonaj episkopoj, en kiu ili malakceptas la koncepton de nuklearmila unua bato kiel senmoralan same kiel en la tutlanda kampanjo por fridigo de la nuklearmilaj armadoj (Freeze). Enketo, farita de Public Agenda Foundation 1984 en Usono, i.a. donis jenan interesan rezulton: 96 % de la usonanoj opinias, ke „batalo kontraŭ Sovetunio en nuklearmila mondo estus tro danĝera". 89 % kredas, ke post totala nuklearmila milito „kaj Usono kaj Sovetunio estus detruitaj". 83 % deklaras, ke „ni ne povas esti certaj, ĉu eblas daŭrigi la vivon sur la tero post nuklearmila milito". Fine 68 % de la demanditaj usonanoj refutas la aserton, ke Usono povus „gajni" ĉiun nuklearmilan militon kontraŭ Sovetunio.[4]

5. La plej multekosta armada projekto en la historio

Tio estas la psikologia fono, antaŭ kiu la usona prezidento en marto 1983 faris sian paroladon, en kiu li pledis por degrado de la malamikaj raketoj al „malnoviĝintaj kaj malaktualiĝintaj" bataliloj per efika defendo. Tiucele oni volas krei dum la venontaj jaroj, eble jardekoj, per taksitaj monrimedoj de 500 miliardoj ĝis unu biliono da dolaroj „defendan ŝirmilon", konsistantan el profunde gradita sistemo en la kosmo kaj sur la tero. Ĉe tio Usono koncentriĝas al la evoluigo de tute novaj armilsistemoj, ekz. laserkanonoj, kiel ankaŭ al la plukonstruado de sia militsatelita reto, al la instalo de pilotitaj armestacioj kosmaj por povi elektrone kunordigi, helpe de satelitoj, unue ĉiujn aktivecojn en la kosmo kaj poste ĉiujn strategiajn aktivecojn sur akvo kaj tero, en la aero kaj en la kosmo.[5]

6. Vendita per falsa etikedo

Necesas nemiskompreneble diri, ke SDI tutsimple estas trompo per falsa etikedo. La komuna inter defendo kaj la t.n. „Strategia Defendiniciativo" estas maksimume la nomo. La „astromilita programo" estas laŭ esenco kaj celo klare agresiva koncepto. Se oni forviŝas la ŝaŭmon de propagando, tiam klare reliefiĝas la konturoj. Fakte temas pri tio, malantaŭ la „defenda ŝirmilo" plue kaj samrapide evoluigi la strategiajn ofensivajn fortojn de Usono kaj tion kun la klare fiksita celo de kreo de nuklearmila kapacito por la unua bato. Sub tiuj premisoj Pentagono volas certigi al si la eblecon helpe de kontraŭraketaj defendarmiloj detrui aŭ minimume neŭtraligi la analogajn strategiajn sistemojn de la alia flanko. Malebligante venĝan rebaton, la generaloj de Pentagono kalkulas la eblecon malarmigi Sovetunion konsidere al la nuklearmila minaco far Usono. Cetere gvidaj militistoj ne kaŝas tiun intencon. Tiel generalmajoro John H. Storrie de Air Force, direktoro pri kosmaj aferoj, laŭ la gazeto „Washington Post" deklaris en marto 1983 antaŭ komisiono de la usona parlamento: „Ni faros en la kosmo same ĉion, kion ni faras en la atmosfero, sur la tero kaj sur la akvo, t.e. ni preparas nin fari kaj gajni militojn".[6] Studo, ellaborita de stabestroj de la aerarmeo, titolita „Air Force 2000", klare postulas „kosman superecon", al kio necesas „potencoj por la detruo de malamikaj kosmaj sistemoj".

7. Nekalkuleblo de nuklea milito

Ne necesas esti fakulo por ekkoni, ke la realigo de tiu ĉi koncepto potencigas la danĝeron de nuklea infero. La malstabiligan efikon de tia evoluo oni povas ilustri per la ekzemplo de la antaŭaverta tempo. Por la strategiaj nukleaj armiloj ĝi sumiĝas je ĉ. 45 minutoj. Per la lokigo de novaj mezdistancaj nukleaj armiloj de Usono en okcidenta Eŭropo ĝi reduktiĝas ĝis ĉ. 7 minutoj. La SDI-projekto kuraĝigus la atakanton al unua bato, ĉar tiu kredas eviti la venĝan rebaton. La nura ekzisto de tia sistemo do pligrandigas la reciprokan malfidon kaj terure subfosas la stabilecon de la internaciaj rilatoj. Nek nuklea milito estas kalkulebla, nek ties sekvoj antaŭvideblaj. Ankaŭ pro tio ni neniam permesu, ke ĝi okazas. Ĉefe tio estas la punkto, al kiu ligiĝas la kritiko de aŭtoritataj politikaj rondoj en Usono kaj okcidenta Eŭropo, de gvidaj sciencistoj el la Malnova kaj Nova Mondoj. Tiel ekz. George Bundy, George F. Kennan, Robert McNamara kaj Gerald Smith – iamaj altrangaj oficistoj de la vaŝingtona administracio – esprimis „egajn dubojn kontraŭ tiu entrepreno, kiu alportas por nia lando nemezureblajn novajn kostojn kaj riskon, se oni ne haltigas ĝin".[7] La kvar renomaj aŭtoroj en sensacia studo riproĉas al la prezidento malatenton de la realo. „La neevitebla realeco", ili skribas, „aspektas tiel, ke efektive ne ekzistas espero, ke la nukleaj armiloj malnoviĝas pro la astromilita programo. La unua kaj plej grava tasko por tiuj, kiuj volas gardi la landon kontraŭ multekosta kaj danĝera ĉasado de iluzio eble konsistas en tio, klarigi tiun bazan ekkonon."

8. Stabileco estas la fundamento de la paco

Kiom ajn ni kiel natursciencistoj estas konvinkitaj pri la ebloj de la homa kreoforto, ni tamen klare devas diri: La imago, ke per progreso en scienco kaj tekniko oni povus senefikigi nukleajn armilojn aŭ balistikajn raketojn, estas fatala herezo. Mi ĉi-rilate tute samopinias kun la konata atomfizikisto d-ro Hans Bethe. La defendantoj de la astromilitaj planoj „volas elimini la danĝeron, elirantan de la nukleaj armiloj, per teknikaj rimedoj. Mi opinias tion senŝanca. Tiu danĝero povas esti eliminata tutsole per prudenta politiko". Aliokaze la nobelpremiito pri fiziko emfazis: „Ni nun vivas en paco nur pro tio, ĉar ĉiu flanko scias, ke ĝi ne povas gajni nuklean militon." Se oni ĝenus la ekzistantan ekvilibron per instalo de kontraŭbalistika raketsistemo, tiam estiĝus nefiniĝanta spiralo de armado kaj pliiĝanta nestabileco.[8]

9. Ne ĉiuj utopioj estas realigeblaj

Jam Albert Einstein antaŭvidis, ke perfekta protekto kontraŭ alflugantaj rake-

tondoj ne eblas. Kvankam dum la lastaj jardekoj realiĝis kelkspecaj aferoj, kiujn oni antaŭe opiniis utopiaj, tamen tiu pritakso ne ŝanĝiĝis, eĉ se eblas, ke kelkaj raketoj en certa fazo estas detruataj. La granda plimulto de la sciencistoj samopinias, ke senmanka defenda ŝirmilo neniam atingeblas. Konsiderante la hodiaŭan proporcion de fortoj eĉ 95 %-a detruado ne sufiĉus, por kaze de granda nuklea milito gardi la homojn sur ambaŭ flankoj kontraŭ la pereo. Kaj laŭaŭde ekzistas eĉ ne unu teknika konsilanto de Reagan, kiu opinias tiel altgradan protektadon ebla – tutsimple, ĉar ili scias tion pli bone.

10. Pli da armiloj ol necesas por memmortigo

La fakto, ke la homaro hodiaŭ unuafoje en sia historio disponas pri pli da armiloj ol necesus por sia memneniigo, vidigas la rolon de la sciencisto en nova lumo, donas al lia respondeco pri la utiligo de la rezultoj de la homa kreoforto pluan dimension. Estas ĝuste, ke ekde la ekzisto de la scienco la scienculoj konsentis ankaŭ pri la evoluigo de armiloj. Pri Arkimedo oni raportas, ke li jam en la 3-a jarcento antaŭ nia erao ludis decidigan rolon en la defendo de Sirakuzo kontraŭ la romia armeo. Kiam la romianoj fine tamen enmarŝis en la urbon, ili trovis a scienculon, desegnantan figurojn en la sablon. „Ne detruu miajn cirklojn!", Arkimedo riproĉis al romia soldato, kiu surprizis lin ĉe tio kaj kiu poste tamen mortigis lin. En la lastjara simpozio de Max-Planck-Societo profesoro Panofsky atentigis pri tio, ke nuntempe preskaŭ la duono de ĉiuj sciencistoj laboras en la milita sfero kaj nomis tion „vere deprima statistiko". Li demandas sin, kiujn rezultojn tiuj fortoj povus alporti, se oni utiligus ilin por la progresigo de la homaro.

11. Letero de la posta vicprezidento Hubert Humphrey

Ĉi-konekse mi memoras leteron, kiun mi ricevis en 1960 de la tiama senatano kaj posta vicprezidento de Usono, Hubert H. Humphrey. La letero estis kaŭzo por interparolado, kiun mi havis en Prago kun d-ro Zworykin, amiko de Humphrey, kaj kiu temis pri la problemo de aliprofiligo de la prefere por militaj celoj laboranta elektronika industrio al medicina elektroniko, servanta por la bonfarto de la homaro. (Zworykin tiutempe estis prezidanto de Internacia Federacio pri Medicina Elektroniko.) Klare mi memoras, kiel ĝoje ni streĉis nian fantazion kaj kreis vizion pri tio, kio povus esti. Ankaŭ ekstere de nia fako – la medicina elektroniko – ni diskutis pri la atingebla progreso en la batalo kontraŭ la ĉefaj malsanoj kaj suferoj de la homoj, en la publika instruado, en la produktado de energio (nuklea fuzio, utiligo de la amasigita provizo de nukleaj eksplodaĵoj por pacaj celoj en nukleo-energiaj centraloj, utiligo de la sunradiado ktp.), por la modernigo de la infrastrukturo de niaj urboj. Nuntempe aldoniĝas la grandaj taskoj rilate al medioprotekto kaj batalo kontraŭ la malsato en multaj partoj de la mondo.

12. La demagogia artifiko pri la „esplorado"

Malpli ol iam ajn scienculo hodiaŭ povas retiriĝi sur la rezignacian starpunkton de Arkimedo: Ne detruu miajn cirklojn! Malhelpi la misuzon de la scienco estas des pli necese, ĉar certaj rondoj en Usono nuntempe klopodegas meti la ekonomian, sciencan kaj produktan potencojn de la evoluintaj kapitalismaj landoj tute en la servon por la fortigo de la milita potenco de la usona imperiismo. Nuntempe en la propaganda nebulo, farita ĉirkaŭ la astromilita projekto, la nocio „esplorado" ludas gravan rolon. Unuflanke oni per tio volas forigi la malkvieton de la NATO-aliancanoj, ke ili sen propra kunago hodiaŭ jam povus fariĝi objektoj kaj morgaŭ unuaj viktimoj de la usonaj astromilitaj ambicioj. Trompante la internacian publikon oni demagogie akcentas, ke unue temus nur pri esplorado por la projekto, ke temas pri scienca projekto, servanta al la redukto de la nuklea armado kaj celanta al enkonduko de nova fazo de malstreĉiĝo. Al la dua ĉapitro de tiu ĉi demagogio apartenas la kiel logaĵo prenita aserto, ke kadre de la esploro por instalo de armiloj en la kosmo estiĝus amaso da novspecaj teknologioj, kio konsiderinde plivastigus la kadron por ekonomiaj kaj sociaj progresoj de ĉiuj partoprenantoj. La faktoj, kompreneble estas diametre kontraŭaj al tiuj demagogiaj promesoj. Per tiaj eldiroj la iniciatoroj de la astromilitaj planoj intencas alproprigi al si la potencojn de ĉiuj siaj konsilantoj kaj aliancanoj por realigi la strategion pri supereco de Usono. En sian same gigantan kiel iluzian projekton Vaŝingtono volas inkludi la kapacitojn de la gvidaj kapitalismaj ŝtatoj de okcidenta Eŭropo kaj de Japanio, la tutajn intelektajn kaj ekonomiajn potencojn, la ideoriĉecon, la scion kaj kapablon de la esploristoj, inĝenieroj kaj laboristoj por misuzi ilin por la realigo de aventurecaj celoj.

13. La profiton la usonaj monopoloj mem volas forpreni

Ĉar en okcidenta Eŭropo kreskas la rezisto kontraŭ instalo de armiloj en la kosmo kaj ankaŭ gvidaj politikistoj de tiuj ĉi landoj sub la premo de la publika opinio esprimas sin skeptike, la pledantoj por la „astromilitoj" nun blovas la pacoŝalmon. La komisiitoj de Vaŝingtono anoncas sur ministrokonferencoj kaj sciencaj simpozioj, ke por okcidenteŭropanoj kaj japanoj jam estas plej urĝa tempo por ankoraŭ salti sur la veturantan trajnon. La usona ministro de defendado Weinberger verkis tiusencan skribaĵon, en kiu li, por tiel diri, devigas la aliancanojn per minacoj. Krome la letero, kiel aŭdeblas el la landoj de la adresatoj, apenaŭ plenumas la kriteriojn de serioza oferto. „Ĝi pli sonas kiel la bruska peto de konzernĉefo al siaj filinaj kompanioj, malplenigi la patentotirkestojn", skribis semajngazeto en FRG.[9] Tio estas „maldeca konduto inter aliancanoj" kaj ne taŭgas por disigi la en okcidenta Eŭropo rilate al la teknika realigebleco kaj politika celkonformeco de la astromilitaj planoj superregantan skeptikon. La spertoj de la pasintaj jardekoj instruas, ke ĉiu partopreno en la usona armado nur estis malavantaĝa por la interesoj de la popoloj kaj de la homoj. Pli ol unufoje okcidentaj scienculoj kaj komercistoj plendis, ke por Usono tio ĉiam estis nur unudirekta strato, ke la partneroj ja povis prilabori flankajn problemojn, sed ke la usonanoj rezervis por si la avangardan teknologion. Jam nun eblas ekkoni, ke Usono volas prilaborigi de la partoprenantaj landoj certajn partajn taskojn, ĝenerale sendependajn unu de la alia, unuflanke, ĉar la koncernaj ŝtatoj ĉi-kampe superis Usonon, aliflanke por ne informi la partoprenantojn pri la tuta amplekso de la projekto. Garantiante por si la monopolon pri la tuta ellaborita scio, la gvidaj usonaj armadkonzernoj samtempe elmerkatigas la neŝatatajn okcidenteŭropajn kaj japanajn konkurantojn. Same estas fakto, ke Usono jam de jaroj per sia altintereza politiko kaj manipulado de la kurzo de dolaro metis la aliajn kapitalismajn ŝtatojn en dependecon kaj ŝarĝas ilin per granda parto de la kostoj por la armado. Analoge oni nun volas subordigi la scienc-teknikajn kapacitojn de kapitalismaj ŝtatoj, de Japanio kaj FRG ĝis Aŭstrio kaj Svisio sub tiujn fatalajn planojn, minacantajn la sekurecon de ĉiuj popoloj. Tio estas energie subtenata per la celkonscia forlogado de scienc-teknikaj specialistoj, per kio oni kaŭzas nemezureblajn damaĝojn kaj perdojn al la unuopaj naciaj ekonomioj.

14. Tute nova kategorio de armiloj

Jam hodiaŭ tute klare videblas, ke la partopreno en la ĉielira komando de Usono ne donas al la aliancanoj konsiderindan avantaĝon por ilia propra esploro. Tio, kion la defendantoj de la

astromilitaj programoj reklamas kiel „miraklan saketon", envere estas skatolo de Pandora, enhavanta sole malbonon por la homaro. Objektive ĉiu lando, ja, ĉiu unuopa sciencisto per partopreno en la esploroj por ataksistemo en la kosmo kunkulpas novan etapon de vetarmado. Devas esti klare, ke per la disvastigo de la vetarmado en la kosmon ekaperus tute nova kategorio de armiloj, kio estus komparebla nur kun la enkonduko de la nukleaj armiloj. Tutsole per la en Ĝenevo komencitaj sovetaj-usonaj intertraktadoj eblas malhelpi la armadan vetkuradon en la kosmo kaj fini ĝin sur la tero. Antaŭkondiĉo tamen estas, ke oni laŭ la atingitaj interkonsentoj pri temo kaj celo de la intertraktadoj parolas pri la tuta komplekso de la armado – de la limigo kaj reduktado de la strategiaj kaj mezdistancaj nukleaj armiloj ĝis la malhelpo de la aventureca usona koncepto pri kosmoarmado.

15. Kuraĝiga akceptemo de USSR en Ĝenevo

Estas por mi, por ĉiu objektiva observanto kuraĝige, per kiaj bonvolemaj ofertoj Sovetunio en Ĝenevo strebas al ambaŭflanke akceptebla rezulto. Sendube tio estas gravaj intertraktoj, ĉar nun estas decidate pri la evoludirekto en la sovetiaj – usonaj rilatoj kaj en la mondo entute: ĉu al intensigo de la vetarmado kaj kresko de la militdanĝero, ĉu al firmigo de la ĝenerala sekureco kaj pli stabila paco. Por ĉiu prudenta homo la decido devus esti klara. Li nur povas konsenti al tio, kion Miĥail Gorbaĉov deklaris en la gazeto „Pravda": Se ni jam altabliĝas por interkonsenti pri redukto de la armadoj, ni do minimume devas eviti ties kreskon. Tio signifas, kiel USSR proponas, ke Sovetunio kaj Usono por la tuta tempodaŭro de la intertraktoj kreu moratorion pri la evoluigo de kosmaj atakarmiloj, inkluzive de esplorlaboroj, pri ties testado kaj lokigo kaj ke ili fridigu siajn strategiajn ofensivajn armilojn.[10] Sian bonvolon Sovetunio montras denove, proklamante tujan unuflankan moratorion por la lokigo de siaj mezdistancaj raketoj kaj interrompante kontraŭajn agadojn en Eŭropo. Miaopinie tio estas pli ol nura gesto, tio estas decidiga paŝo al sukcesigo de limigo de la armado kaj al malarmado. Ĉar la moratorio validas ĝis novembro, restas espero kaj deziro, ke Usono pozitive reagu, ĉar tio kreus progresfavoran atmosferon por la ĝenevaj interparoloj, al kiuj ligiĝas la esperoj de la homaro. La „nova speco de pensado", pri kiu parolis Albert Einstein, estas nuntempe pli necesa ol iam ajn, se la homaro pluekzistu kaj pluevoluu al pli alta nivelo. Temas ja pri la plej alta celo, por kies efektivigo ni ne rajtas eviti eĉ la plej grandan strečadon, temas pri tio, ŝpari al la nunaj kaj estontaj generacioj la terurojn de milito, kiu tutcerte estus la lasta epidemio de la homaro.

Kiel diri: „Milito" aŭ „Katastrofo"?

Kiam ni legas nun ĵurnalojn en kiu ajn lingvo, ni ĉiupaŝe renkontas en ili la vorton „milito" uzitan substantive, adjektive, verbe, adverbe, participe, gerundie kaj en ĉiaj kunmetaĵoj. Tiom oftega uzado de tiu vorto por eventuala nuklea kataklismo atestas pri tio, ke homoj neniom lernis pensi laŭ nova maniero, kiun sugestas al ili la Einstein-Russel-Deklaracio, kiu estas manifesto de la XX jarcento.
Tiu manifesto, proklamita en 1955 jaro kaj subskribita de dek unu elstaraj sciencistoj de mezo de la jarcento, severe avertas homojn, ke en okazo de uzo de hidrogena bombo, antaŭ ili ekestos „la risko de universala morto". Skrupulaj esploroj de eksterma povo de ekzistanta armilaro kaj de ĝia kvanto donas senduban konkludon: tiu armilaro povas dudek fojojn mortigi ĉion vivan sur nia planedo. Do, nur 5-procenta ekfunkciigo de la mortigiloj ĉesigus vivon sur Tero, ĉian vivon – pereus ĉiuj homoj, ĉiuj animaloj, ĉiuj plantoj. Eble nur kelkiuj specioj de mikroboj kaj virusoj, kiuj adaptiĝas vivi en ekstremaj kondiĉoj, restus sur la Tero, sed vivo eĉ de tiaj mikroboj kaj virusoj estas duba.
Eĉ limigita uzo de nuntempaj armiloj estus tutplaneda katastrofo por ĉio viva. Kial do ĉialingva gazetaro, radio, televido ĉiam plu uzas la vorton „milito" kaj nur malofte la vorton „katastrofo"?
Ni opinias, ke uzado mem de la vorto „milito" en projekcio sur estonton estas danĝera. Ĝi alkutimigas homojn al la penso, ke termonuklea milito estas ne nur ebla, sed ke ĝi, simile al estintaj militoj, lasas al iu ŝancon saviĝi kaj resti viva.

Ni proponas, ke pacbatalantoj en siaj deklaracioj, alvokoj, apeloj, paroloj, artikoloj, sloganoj de manifestacioj evitu la vorton „milito" kaj uzadu la vorton „katastrofo".

Verkis kaj subskribis:

V. V. BAĴAN – kandidato de filozofiaj sciencoj, V. I. GUSEV – kandidato de pedagogiaj sciencoj, A. V. LEŜĈENKO – kandidato de historiaj sciencoj, N. M. LIPSKIJ – kandidato de medicinaj sciencoj, A. P. MJAĤĈENKO – kandidato de kemiaj sciencoj, M. T. POPOV – kandidato de fiziko-matematikaj sciencoj, M. Ja. SAVĈUK – kandidato de biologiaj sciencoj, M. G. SERDJUK – kandidato de filologiaj sciencoj, G. Ĥ. ULJUKAJEV – kandidato de teknikaj sciencoj.
La docentoj de Pedagogia Instituto. Berdjansk. USSR. (11. 11. 1984)

Komento de la redakcio

Ŝajnas, ke temas pri iom pseŭda problemo. La vorto ‚milito' elvokas konkretan imagon en la menso de leganto depende de propraj spertoj, scioj, konvinkoj kaj supozoj. Same pri ‚katastrofo'. Sendube la vorto ‚katastrofo' ankaŭ estas uzata ĉiutage en normalaj konversacioj por ne ĉiam gravaj aferoj. Multaj bagatelaj misaĵoj kaj malfacíloj en la personaj vivoj ofte estas deklaritaj „granda katastrofo" k.s. Do – gravas la esenco, ke oni metu en la konscion de la homaro la **katastrofajn** sekvojn de la tria (= lasta) nuklea mond**milito**.

Fontoj:

1) Tiu ĉi deklaro estas publikigita en 1946 en deklaro de la danĝerkomisiono de la atomsciencistoj, kies prezidanto estis Albert Einstein
2) En: Verantwortung und Ethik in der Wissenschaft (Respondeco kaj etiko en la scienco), Max-Planck-Gesellschaft/Berichte und Mitteilungen 3/84
3) „Neues Deutschland", 2-a/3-a de februaro 1985
4) „The Times", 15-a de februaro 1985
5) Prof. d-ro Heinz Stiller: „Die Verhinderung der Militarisierung des Weltraums – Schlüsselfrage im Kampf für Frieden, Rüstungsbegrenzung und Abrüstung" („La malhelpo de la instalo de armiloj en la kosmo – baza problemo en la batalo por paco, armadlimigo kaj malarmado"). Referaĵo sur pliamplekslgita konferenco de la konsilanta komitato pri kosmaj problemoj ĉe Packonsilantaro de GDR.
6) „Washington Post", 16-a de oktobro 1983
7) „La prezidento devas elekti: astromilito aŭ armadlimigo", „Foreign Affairs", vintro 1984
8) „International Herald Tribune", 14-a de junio 1984
9) „Die Zeit", 5-a de aprilo 1985
10) „Neues Deutschland", 8-a de aprilo 1985

Trad. D. Dungert
el „Neues Deutschland" de 9. 4. 1985

Canko Murgin

La Minaco Kontraŭ Monda Paco

Monopola, Grandsinjora land' Usono
aspiranta esti nepre kun rekono
de la Mondregisto –
donis vergon al polico kaj kanonon
al armeo, kaj disŝutis la malbonon
kontraŭ laboristo.

Post kanonplugado – zorga – en Koreo
tuj burĝonis en abundo grandpereo
kaj disdon'... de justo:
al popol' malriĉa donis kugloboron,
prenis por si bazon kaj la tutan oron –
jen socia rusto.

En la golfo apud Vjetnamio
grandprovokon faris grandnacio
kaj komencis vergi –
Ho Chi Minh – la Prezidanto de popolo –
agresulon kaptis forte je la kolo
kaj lin jetis... mergi.

Al Batist-vasalo la Usono helpis,
tamen la popol' de Kubo tiun erpis
kaj sen ĝen' ekvivis –
dum invad' sur maran Strandon de Ĥirono
la dungit-soldatoj de la grandfripono
al Bermudoj[1]... drivis.

Estis lando sur Grenad' Insulo,
pro Uson-atako ĝi fariĝis nulo –
ĉu ĉi – grandsukceso?
Nun minac' al Nikaragvo pugne ardas,
sed popolo de Sandino brave gardas
sian jurpromeson.

En la bravaj Mozambiko kaj Angolo
de armiloj Industria Monopolo
buĉas, rabas, predas –
en Libano bela – Lando de la Cedro –
juda general' – sendit' de Pentaedro[2] –
plagas kaj ne kredas...

La homaramaso de popolo – mito –
kun hararo hirta timas la militon,
sed kolektas forton –
en protest' per strik', sieĝo kaj mitingo
ĝi demonstras sian pacdefend-atingon –
peli la Perforton.

(En Bulgario, Sofio; 3. 10. 1985)

Klarigoj de la aŭtoro:

[1]) Al mar-abismo apud Bermudaj Insuloj, kiu altiras kaj englutas la pretere navigantajn ŝipojn; al la Monda Tombejo de Ŝipoj; al morto, al pereo.
[2]) Sinonim' de Pentagono.

Noto: Tiu ĉi poemo estis jus verkita, kiam mi eksciis pri la subita morto de k-do Konstanteno Ustinoviĉ Ĉernenko, ĝenerala sekretario de KPSU kaj Prezidanto de Prezidio de USoSoR'a Supera Soveto (Parlamento), tial mi dediĉas ĝin al li.

Canko Murgin

La Perlo Homara

Post longa terura hombuĉa milito
pli forta ol ĉiu socia tempesto –
la paco revenis samkiel pelito
de pli ol ses-jara elmonda foresto.

Ĝi paŝas ĝojiga printempa kaj suna –
neniam ĝin vidis la hom' pli vivpova...
Sed estas ankoraŭ en mond' ul' maljuna
revanta konservon de tempo malnova.

Manio de tiu ĉi ul' senhomeca
kaj lia deziro rabia nur estas,
ke ekspluatado – pasio maldeca –
kaj verŝ' de homsango por ĉiam ĝisrestas.

Ho fi-enviulo, sufiĉe ni scias
pri via intenco mortiga kaj stulto –
al paca afero vi ĉiel envias,
sed tiel montriĝas nur fal' de burĝ-kulto.

Mondpaco nuntempa – ho perlo homara,
vi, revo intima el dum la bataloj –
potence nin tenu defendi vin kara,
ĉar brilas vi inter la hom-idealoj.

Vi estu longdaŭra kreiga kaj nia!
Ni gardos vin brave de ĉies invado,
ĉar scias ni kiel – kun forto pasia –
aspiris pri vi dum la mond-militado.

Neniun permesos ni pacon submini,
nur falsan sukceson atingas perforto –
la celoj homecaj ne povas difini
agadon „el la pozicio de l'forto".

Mondpaca tendaro, vi daŭre fervoru!
Vi signu sukceson tuj post la sukceso!
En landoj de ĉiuj ni plue laboru
venigi finvenkon de lukt' por progreso!

Kiam ni ekvidos?

Kiam ni ekvidos la finon de armeoj,
kiam ni ekvidos la finon de larmoj,
la finon de senutilaj bataloj,
la finon de malsaĝuloj.
Kiam ni ekvidos
la kunligon de la koro kaj menso,
de scienco kaj filozofio,
de veraj homoj de nia Okcidento
kun la saĝuloj de Oriento,
de ĉiuj diversaj religioj
kun sola celo: la saĝo.
Kiam ni komprenos
la muzikon de ĉielaj sferoj,
kiam ni ekvidos la pacon sur la Tero?

Albert Chantraine

La deklaro de la Gubernio Kanagaŭa kontraŭ nukleaj armiloj

La abolicio de nukleaj armiloj kaj realigo de la eterna paco estas sincera deziro komuna de ĉiuj de la popolo de Japanio, la unusola lando en la mondo suferinta pro nukleaj bombadoj. Ankaŭ ni, la gubernianoj de Kanagaŭa, asertas ĉi tiun fortan deziron de la japana popolo.

Hodiaŭ, kreskantaj internaciaj streĉiĝoj pro plifortiĝo de nukleaj armiloj minacadas la mondpacon kaj eĉ la travivadon de la homaro. Ni do ne povas ne apelacii al popolo tra la mondo por la abolicio de nukleaj armiloj kaj por malarmado.

Protekti ĉi tiun belan landon por niaj infanoj kaj nepoj kaj postlasi al ili ĝuindan vivon estas niaj devoj.

Ni, la gubernianoj de Kanagaŭa, tial deklaras, ke la tri sennukleaj principoj, „ne posedi, nek fabriki, nek enlasi nukleajn armilojn en Japanion", adoptitaj de la Japana Registaro kiel fundamenta politiko de la nacio, fariĝis ankaŭ la politiko de nia gubernio.

la 5-an de julio, 1984

Mihai Eminescu

Da centopaj ŝipaj mastoj

Da centopaj ŝipaj mastoj
Forlasintaj bordsignalojn,
Kiom rompos tra la vastoj
La marventoj, la ondfaloj?

Da birdetoj elflugontaj
Are sub ĉieltegmentoj,
Kiom mortos endronontaj
Pro l'ondfaloj, pro l'marventoj?

Se postkuros vi l'bonŝancon
Aŭ la altajn idealojn,
Ĉien sekvos vin la danco
De l'marventoj, de l'ondfaloj.

Senkomprenaj restas penso
Poemita, viaj sentoj,
Ĉiam bruas ilin denso
De ondfaloj, de marventoj.

1880

Esperantigis: C. D.
1977

Adrian Păunescu

PENSO PRI LA TERO

Homara esto en danĝer' – turmenta sent'
Ĉefine de dudeka la jarcent',
Ne sole pro la teruraĵ' de l'armilar'
Sed ĉar konceptis ilin la homar'.

Signifas, ke en ni jam kuŝas la mizer',
Envane prokrastiĝas la danĝer'.
Forestos, homoj, la milito tiam nur,
Kiam de l'cerbo mem fariĝos pur'.

Ne luktu fumon – kontraŭas vin la ŝanc' –
Al flam' pripenson postulas fajrodanc'.
Ne domojn, landojn, homojn minacas la terur':
Homec' ekzekutotas kontraŭ mur'.

Mortas la homo mem kaj mortas spite sin,
Neniu ajn simptom' avertis lin.
Konstante trompis nin la civilizaci',
Ke l'hom' ĉiele ŝajnas lasta di'.

Korekte vestas, jen – donac' por ina form' –
Ĝojo-ondan, nun, milita uniform'.
Odoras je pafita kuglo nia Ter',
Surdmutas voĉkonkuroj en aer'.

Malsanas pro la fikondiĉoj la natur',
Pezas sur mond' hierarkia tur',
Tondita en kondamno, kalvas nia Ter',
Inkvizici' ĝin puŝas al ofer'.

Tulip' mortinta revivos eble iam,
Pafita la tulip'-ide', neniam.
Malbon' ne gravas vipanta min aŭ vin,
Sed ke al vip' alkutimigis nin.

Ni plu ribelas nur post la permesopet',
Nur per aprob' vizitas nin sonĝet';
Pro surogatoj, malkuraĝa la spirit'
Postvivos en la korp' de homa id'.

Tuj venu ambulanc' al la planeto Ter',
Esplori la restontojn en infer',
Venu per l'ambulanc' mansperta klinikan'
Disigi la frenezon de la san'.

Multegas ja ankoraŭ estonta farendar',
Ne finis sian rolon la homar',
Ni volas aŭdi kokojn kun la herolda kri'
Pri la maten' unua de la jarmilo tri'.

Tradukis Anonymus Timisiensis kaj Tudor Denectin.

Noto: Adrian Păunescu (n. 1943) estas unu el la plej grandaj poetoj de la nuntempa rumana literaturo. Liaj prestiĝo kaj populareco, precipe inter la junularo, estas unikaj. La gigantajn spektaklojn (poezio, kanto ktp.) gvidatajn de li mem partoprenis ĝis nun pli ol kvin milionoj da homoj. En unu el liaj porpacaj poeziaĵoj („O sansă păcii" – Ŝancon al la paco"), muzikigita kaj vaste konata, kelkaj versoj estas dediĉitaj al Esperanto.

Elisabeth Wesuls

Tri konjektoj kaj unu fino

Konjektite, ekestus milito,
(la tria, la timata)
kaj vi devus foriri,
kaj pli poste ankaŭ mi,
for el la urbo.
Konjektite, ni perdus el la vido
unu la alian.

Neverŝajne, sed eble tamen,
ke iu trupo revenus
post la fino.
Kaj vi ĉeestus.

Kaj – kial ne –
mi vivus ankoraŭ
kiam la trupo venas,
irus ĝuste sur la sama strato!
Kial ne?

Mi timas, ke ni preterirus unu la alian,
ŝultro apud ŝultro.
Ĉar ne scios mi
kiel via vizaĝo aspektos tiam,
post la timado,
kaj ĉu ni entute ankoraŭ havos
ion vizaĝsimilan.

Mi timas
ni preterirus unu la alian,
escepte ke – nia hundo postkurus vin.

Trad. Wilfried Hofmann

Sur la bordo

La tria mondmilito, eksplodinta inter ŝtatoj sur la norda duono de nia planedo, finiĝis post nur mallonga daŭro. Ekscesa, nekontrolita uzo de nukleaj bomboj paralizis ne nur la militantajn fortojn ambaŭflanke, sed neniigis ĉiun homan vivon sur la tuta norda hemisfero pro estiĝinta tro alta atmosfera radioaktiveco.

Tio estas la elira bazo de la fikcia romano „Sur la bordo" de la angla verkisto Nevil Shute. La Aŭstralia Esperanto-Asocio prezentas tiun tragikan publicaĵon. La Esperantan tradukon prizorgis majstre la antaŭa prezidanto de la asocio, K. G. Linton.

Nekutime kiel la enhavo estas jam la titolo de tiu libro. „Sur la bordo" devenas el la ĵargono de anglaj kaj usonaj maristoj, signifante – ne sur la ŝipo – sen laboro – je la fino de sia kariero –. Simbole volas esprimi Nevil Shute per tiu titolo, ke la planedo Tero atingis periodon de mortiga viva krizo.

La scenejo de la romano estas Aŭstralio, kontinento kiun la norda katastrofo ankoraŭ ne domaĝis. Hazarde en la haveno Melburno troviĝanta usona submarŝipo perdis ĉiun kontakton kun sia hejmlando. Esploraj krozoj far ĝi tra la nordaj maroj konstatis la ruinigon de la tuta norda hemisfero. Vivdanĝera radioaktiveco malhelpis forlasi la ŝipon. Konstateble estis nur malmultaj bombeksplodaj detruoj en la alŝipitaj havenurboj sed la foresto de ĉiu homa vivanta estaĵo.

Emociige pentras Nevil Shute drastan, realan bildon pri la vivo en tiu lasta aŭstralia homa vivospaco sub la premantaj cirkonstancoj. Inter timo kaj espero turmentis malcerteco la homojn, ĉu la mortiga radioaktiveco propagiĝos suden ĝis Aŭstralio aŭ ne. Fine la provokita kataklismo ne haltis antaŭ Aŭstralio. En la drameca agonia fazo, atendante la neeviteblan kruelan finon, anstataŭ mortaĉi kaŭze de la abomena radiada malsano, preferis sennombraj homoj la sinmortigon. La tero ne pereis, la suno brilis ankoraŭ kiel iam ajn, sed la homa gento malaperis el la mondscenejo. Sole la kunikloj pli longe eltenis pro pli granda rezistforto kontraŭ radioaktiva infektiĝo.

La tradukinto laŭdas „la sagacan manieron, laŭ kiu la aŭtoro prezentas la imigitan komencon de la tria mondmilito, sen sugesti kulpigon de iu ajn nacio". Kiel aspektas tiu afero? Sur la paĝo 19 de la libro estas legeble laŭvorte:

„Tie li eksciis la unuan fojon pri la sovetia – ĉinia milito . . . Li eksciis, ke Sovetio kaj Ĉinio uzis kobaltbombojn, . . ."

La bombado de la rusa teritorio fare de Usono okazis erare pro miskompreno. (Paĝo 76) Sur la paĝo 246 troviĝas denove aludo pri la militkaŭzo:

„. . . kial ĉi tio okazas al ni? Ĉu ĉar Rusio kaj Ĉinio komencis militon unu kontraŭ la alia?" Li kapjesis. „Proksimume tio", li diris. „Sed tio ne estas la tuto. Usono, Britio kaj Rusio komencis bombadon antaŭ tio."

Evidente niaj spertoj kaj konvinkoj ne konformas al tiu vizio de la aŭtoro. Ni scias pri la veraj militkaŭzoj, pri la kapitalistaj hegemoniaj strebadoj, kiujn la aŭtoro ne mencias. Tamen, Nevil Shute nerefuteble montriĝas avertante, ke eventuala tria mondmilito signifus la finon de ĉiu tera vivo. Nepre necesas forigi nukleajn armilojn, ĉar radiologia milito detruus la tutan homaron.

Tiamaniere la romano ne nur informas sed samgrade instigas pliintensivigi la porpacan batalon. Konsiderante la minacantan kosman militpreparon temas pri tio, ke „Sur la bordo" devas resti nura averto kaj ne fariĝu horora profetaĵo.

Erich Würker

Hans-Dieter Schütt

NBC[1]-novaĵoj

La pentagono instigas lastfoje:
Civitanoj, vizitu
la florantan Eŭropon!
antaŭ ol ni komencas defendi ĝin.

trad. Wilfried Holmann

(anglalingva mallongigo por „nukleaj, biologiaj, kemiaj" armiloj)

Fulvio Tomizza: MATERADA.

Eldonis: Edistudio, Pizo, 1983.
El la itala tradukis Pier Giorgio Soranzo. 160 p.

De tempo al tempo ebligas al ni Esperanto legi librojn, kiuj ne ekzistas en nia lingvo. Al ili apartenas ankaŭ la romano de Fulvio Tomizza, kiu kondukas nin al istria vilaĝo post la dua mondmilito. Tie, en la landlima regiono inter Italio kaj Jugoslavio, vivas kune kroatoj kaj italoj. Por pli bone kompreni la enhavon de la romano necesas prezenti kelkajn historiajn faktojn. En 1946 la kvar potencoj fiksis novan landlimon inter Italio kaj Jugoslavio. La Libera Teritorio de Triesto estis dividita en du partojn. Zono A restis sub anglo-usona administrado kaj Zono B sub jugoslavia. Tial multaj italoj, kiuj loĝis en Zono B elmigris Italion. En 1954 estis subskribita Interkonsenta Memorando, laŭ kiu Zono A estis submetita al italia administrado. La loĝantoj de Zono B povis elekti ĉu resti aŭ elmigri. Dum tiu ĉi tempo ludas la romano. La familio Coslovich el la vilaĝo Materada estas ne nur trafita de tiuj historiaj eventoj sed samtempe luktas kun internaj familiaj problemoj.

La verkisto, kiu mem devenas el tiu ĉi regiono profunde konas la landon, la kutimojn kaj la problemojn de la loĝantoj. Li detale priskribas la konfliktojn en la familio kaj en la vilaĝo.

La traduko de Pier Giorgio Soranzo estas vere bona. Oni trovas preskaŭ nenion kritikindan, nur kelkfoje mi preferus alian prepozicion ol la tradukinto. Ankaŭ kelkaj preseraroj de tempo al tempo ĝenas la legadon.

Entute interesa libro. Ĝi estas la unua parto de „Istria trilogio". Ĉu ni iam havos ankaŭ eblecon legi la aliajn du volumojn en Esperanto?

Dieter Berndt

Barbara Sokalowna: Viro en nigra mantelo kaj aliaj rakontoj.

Pola Esperanto-Asocio
Varsovio 1984. 96 pĝ.

Kolekton de ok rakontoj aperigis niaj polaj amikoj. Tiuj rakontoj estas simplaj kaj ravaj – sen altaj pretendoj, sed tamen kaptaj kaj streĉaj: „La hedero" raportas pri la aventuroj de juna virino, al kiu la edzo donacis hederon kun misteraj ecoj. La „Viro en nigra mantelo" estas poŝŝtelisto. Sed je la Tago de la Virino li sin montras vera kavaliro.

En tiu stilo ĉiuj rakontoj ŝvebas inter fabelo, mistero kaj iom romantika realismo. Barbara Sokalowna debutas per ĉi tiu verko, kaj mi esperas iam legi pliajn prozaĵojn el ŝia plumo. Ŝi povus esti gajno por nia literaturo.

Michael Lennartz

Kurt Pätzold

La ŝanco de la liberigo

Por la plimulto el la germanoj en la jaro 1945 dispartiĝis la realeco kaj la konscio pri ilia liberigo. Ili estis liberigitaj, sed ili ne kapablis kompreni, kio okazis kun ili, kaj ili havis nur malklaran imagon pri la okazoj kies partoprenantoj kaj atestantoj ili fariĝis. En tio troveblas la ĝenerala historia antaŭkondiĉo por trompokampanjo kiun nun jam dum semajnoj kaj monatoj, transe de nia okcidenta limo, aranĝis politikistoj, ĵurnalistoj, ankaŭ historiistoj, kontraŭ germanoj, kontraŭ tiuj malmultaj kiuj posedas ankoraŭ proprajn memorojn pri la majo de 1945, kaj kontraŭ tiuj multaj kiuj apartenas al la „poste naskiĝintaj" generacioj.

Oni tie diras kaj instruas ke la germanoj celebru la 8-an de majo alimaniere ol la proksimaj kaj malproksimaj najbaroj en Eŭropo. Diference de tiuj-ĉi, ili povus revoki tiun tagon en la memoron nur kiel tagon de malvenko aŭ de kapitulaco. Eventuale permeseblus dividitaj sentoj kaj rememoroj – parta koncesio pro la nekontestebla fakto ke la plimulto el la germanoj en tiu frusomero de la jaro 1945 estis ĝistede saturita de la milito, ke ĝi mem sopiris finon de mortado kaj suferado kaj do tamen sin sentis liberigita de ŝarĝo kiam estis pasinta la mortbruo de la milito kaj estiĝis la propra certeco ke oni postvivis ĝin.

La menciita maniero rigardi la historion konsentas nur al malplimulto el la germanoj celebri la tagon de la senkondiĉa kapitulaco de la faŝisma germana imperiismo kiel ilian tagon de liberigo: al la germanaj kontraŭfaŝistoj kaj al aliaj kontraŭuloj de Hitler, al kiuj ĝi alportis liberigon el pundomoj kaj koncentrejoj, eblon de reveno el ekzilejo al ilia turmentita patrio. Videblas ĉe tia rigardo al la historio ankoraŭfoja, kvazaŭ nevola, posta distancigo de la plimulto el la tiutempa loĝantaro de Germanio disde tiu parto de la popolo kiu kiel ĝia plej bona batalis kontraŭ la nazia reĝimo kaj kiel parto de la kontraŭhitlera koalicio kunvenkis kaj kunakiris la unuan tagon de paco.

De kio do estis liberigita la plimulto el la germanoj en 1945? Nur de la kripligoj kaj de la mortado de la propraj homoj ĉe la frontoj de la milito kaj en la hajlo da bomboj? En kio troveblas la apartaĵo de tiu liberigo okazinta al la plej granda parto de la germana popolo? La respondo al tiu demando konkludiĝas, se oni atentas ke tiu popolamaso, dum malsamaj tempoj kaj sub tre diferencaj cirkonstancoj, fariĝis kaj estis instrumento de la faŝisma diktaturo. Libervole aŭ ne, kun entuziasmo aŭ kontraŭvole, fidinde aŭ ŝanceliĝante ĝi lasis sin formi al amasbazo de tiu reĝimo, kiu sen tiu apogo estus restinta malkapabla disvolvi en tia grado sian agresem-imperiisman naturon, kiel okazis dum la militjaroj.

Certe, la plimulto el la germanoj ne voĉdonis por la faŝisma regadsistemo. Meze de 1932, kiam la nazia partio atingis dum elektoj por Reichstag sian plej bonan rezulton, ĝi altiris 37,4 procentojn de la elektantaro. Tio estis milionoj da erarigitaj kaj trompitaj homoj, sed ili ja ankoraŭ ne estis la plimulto el la popolo. Laŭ opinio de ĉiuj (ankaŭ laŭ ĝia propra), la partio direktita de Hitler ne havis veran ŝancon proksimiĝi al la 50 procentoj aŭ eĉ transpaŝi ilin. Nur kiam la nazifaŝisma gvidantaro transloĝiĝis al Berlina Wilhelmstrato, senkompate direktis ĉiujn rimedojn de teroro kontraŭ siaj antagonistoj kaj posedigis al si la opiniforman monopolon, lerte uzante ĉiujn eblojn kaj limojn de tiama komunikada tekniko, ĝi atingis pligrandiĝon de sia sekvantaro ĝis tiu amplekso ke la plej granda parto de la germana popolo subtenis la reĝimon en ĉiam pli senkritika maniero kaj kun senbazaj ekspektoj.

Kaj tio signifis ke ĝi pli kaj pli adaptiĝis al la krima unudirektigo de ŝtata aparato preparanta militon, fine elvokanta ĝin, tretante landon post landon sub la boton de la germana militarismo, murdante kaj en plej diversa maniero mortigante milionojn da homoj, anojn de preskaŭ ĉiuj popoloj kaj nacioj de Eŭropo. Kiom veras ke denove nur malplimulto el la faŝisma sekvantaro (tamen dekmiloj) rekte partoprenis al la efektivigo de la plej abomenaj krimfaroj de la ĝisnuna mondhistorio, tiom ja ankaŭ veras ke nur la faŝisma milito farita de milionoj da germanoj havigis landojn kaj viktimojn al la potenco de la germanaj imperiistoj.

Kiel la plimulto el la germanoj, dum longaj jaroj spirite kaj praktike miskondukita de la faŝismo ankaŭ kontraŭ siaj propraj nekomprenitaj bazaj interesoj, estus ja povinta jam en majo 1945 akiri la konscion de s i a liberigo? Post la tiel longdaŭra sukcesa faŝisma manipulado, kiu efikis kaj postefikis, regis en tiu popolo ĝis la lastaj tagoj de la milito malĝusta, nun jam favoranta la postmilitajn planojn de la germana financkapitalo ni-sento, esprimiĝanta en la tiam ofte pensata kaj eldirata frazo: „Ni malvenkis en la milito."

Tiu-ĉi animstato, alkateniganta ankoraŭ tiom da homoj al la regintoj, eĉ se ili jam malbenis Hitler kaj liajn „brunulojn" kaj „nigrulojn", esprimis kaj la persistemon de la disvastigita de la nazioj ideologio de popola komuneco kaj la grandecon de la tasko kiun ekprenis sur sin tiuj kontraŭfaŝismaj fortoj de la germana popolo. Ili antaŭiris la anojn de ilia popolo sur nova vojo kaj provis peri al ili novan kaj veran ni-konscion, la kunigantan konscion de la kontraŭfaŝismaj demokratoj. Ĝi inkluzivis la nepopularan konfeson de propra devojiĝo kaj malhonoro – kaj la pretecon akcepti la principon de reparacio, eĉ se ĝi estis apenaŭ realigebla en iu konvena maniero.

Liberigo – de kio? Tio estis por la plej granda parto de la germanoj (sendepende de tio kion ili el tiu ago poste kapablis fari) precipe liberigo el la impliko de ilia propra vivo en la plej kriman reĝimon sub kiu iam ajn vivis germanoj kaj el kiu ili sin mem, el propraj fortoj, liberigi ne kapablis. Liberigo alportis ŝancon por nova komenco, per kiu eblis reakiri nacian estimon per paca laboro kaj plenumo, por la vojo en novan socion. La liberigo el nazia faŝismo estis daŭrigenda de la popolo, ĝis liberigo en plej multampleksa mondhistoria senco.

En la grado en kiu tio en GDR okazis antaŭ kaj post ĝia fondiĝo, la ĉi-tie vivantaj germanoj faris la paŝon de la realeco de la liberigo al la konscio pri ilia liberigo. Perlabore eliĝintaj el ilia pasinteco, ili tiun-ĉi nur nun vere komencis kompreni kaj ankaŭ spirite superi. Kiel disvolviĝis tiu procedo entute kaj detale, tio interesos historiistojn ankoraŭ por longa tempo. Necesos multo da fontkritika laboro kaj spursento por kompreni procedon, kies rezultoj fariĝis al ni kelkfoje tro memkompreneblaj. Sed memorigas ankaŭ amikoj el eksterlando, kiuj en kapitalismaj ŝtatoj de Eŭropo devas ankoraŭ lukti kontraŭ nuntempa faŝismo kaj la inerteco de ĝiaj malkonsekvencaj kontraŭuloj, antaŭenigi tiun necesan laboron por ĉies utilo.

(El „Weltbühne" 17/1985, trad. Ulrich Becker)

Tadeusz Ejsmont

Ligoj inter la Esperanto-movado

1. La nuntempo kaj la Esperantista pacagado

La Esperanto-movado apartenas al tiuj sociaj internaciaj movadoj, kiuj karakteriziĝas per integrado de homaj pensoj kaj agoj ĉirkaŭ la aferoj de la paco kaj reciproka kompreniĝo. La simpla Zamenhofa devizo „unu lingvo, unu religio, unu mondo" fundamentis la specifecon el la Esperanto-movado. Neŭtrala lingvo kaj koncepto pri neŭtrala religio devis krei kondiĉojn de la paco en la homaj mensoj, sentoj kaj agoj, por finrezulte alkonduki al harmonia integriĝo de la tuta mondo, malgraŭ estantaj aliecoj lingvaj, religiaj, kulturaj, rasaj, politikaj k.t.p.

Ankaŭ nuntempe oni akcentas, ke la Esperanto-movado povas kaj devas:

- ligi unuopulajn interesiĝojn kaj mediajn motivojn de paca kunlaboro pere de neŭtrala internacia lingvo;
- profundigi motivon krei pontojn de interkompreno inter reprezentantoj de la samaj pensoj kaj agoj, kiujn en idealisma formo iniciatis L. Zamenhof, kaj kiuj aktuale konkretiĝas en novtipaj rilatoj[1].

La postulo de la nuntempo estas aspiro atingi la konscion, ke:

- estas pli multe da bezonoj, kiuj ĉiujn homojn kunligas ol ilin dividas;
- nacioj ligiĝantaj ĉirkaŭ komunaj problemoj povas kaj devas ilin solvi en la intereso de la tuta homaro;
- oni devas koncentri sian atenton al efikaj rimedoj kaj instrumentoj de reciproka kompreniĝo kaj proksimiĝo, kie tre povas helpi Esperanto kaj ties socia movado.

El la vidpunkto de la soci-politikaj sciencoj oni devas konsenti kun la aserto de N. S. Podkaminer, ke Esperanto kiel instrumento de komunikado estis uzata por diversaj celoj, kaj kongruaj kaj malkongruaj kun la logiko de packreaj procezoj.[2] Sed ne en la historiaj cirkonstancoj ni vidu ĝian allogon. Pri ĝi decidas la kultura fakto, ke Esperanto transdaŭris la provperiodon kaj kunligiĝis daŭre kun movadoj, kiuj neniam aprobis principojn neantajn la egalecon inter la homoj kaj egalecon inter nacioj. En tio en Pollando kaj en aliaj socialismaj landoj estas rimarkata ŝanco transformi la lingvistikan Esperanto-movadon al movado servanta formi kaj disvastigi universalajn valorojn de diversaj kulturoj.

Tiun ĉi supran aspiron forte inspiras aferoj de:

- edukado por libereco, paco kaj reciproka kompreniĝo de nacioj,
- disvolvo de interŝanĝinformaj procezoj en la nuntempaj kaj estontaj fazoj de la sciencteknika revolucio,
- celado al objektivigo de nocioj, pensoj kaj ideoj devenantaj el etnolingvoj pere de internacia lingvo, kiu posedas grandan leksikan potencon kaj racian strukturon.

La Esperanto-movado en la tempo de la paca kunekzistado povas estiĝi unu el multaj traflukanaloj de veraj informoj pri konstruivaj manieroj profitigi homajn kapablojn, fortojn kaj aspirojn en naciaj kaj internacia interesoj. Kiel opinias Nguyen Van Kinh tio ebligas kreskigi la signifon de Esperanto „sur diversaj kampoj de kulturo, literaturo, scienco kaj sociagado, ne kiel armilo de konkero de tiu nacio kontraŭ alia nacio, sed kiel armilo de justa memdefendo, samtempe vera ligilo inter la justaj kaj pacamaj koroj sur nia blukolora tero, kie devos fine regi nur paco kaj amikeco de ĉiuj popoloj"[3]. Oni devas substreki, ke la agado kaj aspiroj de la Esperanto-movado precipe korespondas kun la aferoj priskribitaj en la IIIa parto de la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo titolita „Kunlaboro en humanaj kaj aliaj sferoj". Apartenas al ĝi:

- kontaktoj inter homoj
- informoj
- kunlaboro kaj interŝanĝoj en la sfero de kulturo kaj klerigo.[4]

La aktiva aliĝo de la Esperanto-movado al la kunlaboro en ĉi tiuj supraj sferoj servos al la pliriĉigo de la spirita kaj socia vivo de ĉiuj nacioj kaj al la kreo de nova konscio en individua kaj globala dimensio. Ĉar kiel asertas la aŭtoroj de la IIa raporto de la „Roma Klubo" oni devas disvolvi la konscion de la tutmonda komunumo tiel, ke ĉiu homunuo konsciu sian rolon kiel ano de la monda socio. Se la homa gento estu daŭra, homo devas disvolvi en si senton de komuneco kun la estontaj generacioj[5].

Kreante kondiĉojn por realigi la progreson en internaciaj rilatoj la Esperanto-movado devas malkaŝi kaj neniigi fikciajn verojn pri disvolvo de internacia socio. Unu el tiaj „veroj" estas la konvinko, ke militojn igas naturaj sociaj mekanismoj. Ĝi elfontas el la pesimismaj determinismaj teorioj, kiuj baziĝas interalie sur historiaj statistikoj.[6] En ĉi supra koncepto la vetkurado armila estas kiel io memkomprenebla kaj tute natura. Tial L. Brejnew en sia parolo dum la Monda Kongreso de la Fortoj de Paco en Moskvo jam en la 1973 j. forte substrekis, ke „tiun ĉi danĝeran psikologian inercion oni devas trarompi".[7]

La paca agado de la Esperanto-movado ligita kun reflektiĝo pri internaciaj spertoj kaj procezoj de packreado montras bezonon:

- trakti la Esperanto-movadon kiel formon kaj rimedon de reciproka kulturinfluado de diversaj nacioj;
- trakti Esperanton kiel unu el integrigaj iloj kunformantaj novan globalan konscion baziĝantan sur valoroj de la kreata universala kulturo;
- vidi la Esperanto-movadon en kunteksto de direktagadoj de internaciaj organizajoj kiel UN, UNESKO kaj aliaj.

2. Esperantista pacagado kaj homaj rajtoj

Post la dua mondmilito pli kaj pli aprobata estas la principo de egaleco (demokrateco) en internaciaj rilatoj. Subtenas ĝin nova branĉo de internacia juro, tio estas internaciaj homaj rajtoj. En la plej nova, tiel nomata „tria generacio de la homaj rajtoj" troviĝas jenaj homaj rajtoj:

- rajto je disvolvo
- rajto je paco
- rajto je medio
- rajto je propreco de komuna heredajo de la homaro
- rajto je komunikado.[8]

Ĉi suprajn rajtojn oni traktas kiel gravajn kondiĉojn realigi ideon de edukado por la paco. Krome oni akcentas, ke la disvolvo bezonigas trakti homon kiel subjekton kaj ne nur objekton en la kreadprocezo de la internaciaj rilatoj.

Sufiĉe pli frue la bezonon de egaleco (demokrateco) mondskale inter ĉiuj homoj kaj nacioj postulis la kreinto de Esperanto protestante kontraŭ „la regado de unuj gentoj super aliaj gentoj".[9] Nuntempe proksiman interrilaton de egaleco, homaj rajtoj kaj Esperanto forte substrekis P. Balkanyi aldonante al la Zamenhofaj revoj: „Liberigon de subpremo, vasta progreso kaj solidara kun-

kaj edukado por la paco

laboro kreante veran internaciismon de samrangaj popoloj kaj homoj, nepre respektante la homajn rajtojn." Ĉi-fone Esperanton li traktas kiel „. . . utilan kaj gravan rimedon por realigi tiujn celojn . . ." kaj sekve asertas ke „per tio – apartenante aŭ ne apartenante al iu ajn ideologio – ni servos la homaron . . ."[10]

En la Esperanto-movado paco estas traktata kiel baza kondiĉo de profitado el la rajto por vivo. Kaj kontraŭe, militojn kaj konfliktojn oni traktas kiel ĉefan danĝeron de tiu-ĉi homo rajto. Tial en pacistaj revuoj *rajton je paco* ofte oni anstataŭas per *rajto je vivo en la paco*. Realigado de la ideo de la paco el la vidpunkto de homaj rajtoj postulas la konvinkon, ke pacon ne eblas atingi pere de simpla elimino de militoj, ke bezonata estas aktiva, krea iro de internacia socio al formado de la monda ordo en kiu dominos paco-konscio kaj motivado. Kiel prave rimarkas M. Dobrosielski: „hodiaŭ la problemo de la mondo sen militoj, mondo de daŭra paco ne povas jam esti plu traktata kiel abstrakta vizio, utopio, sed ĝi fariĝas praktika, konkreta neceso".[11] Neceso – ni aldonu – realigebla.

3. Problemo de la homa packonscio

3.1. Socia faktoro

Analizo de la nuntempa situacio kondukas al konkludo, ke ni ekstaris antaŭ la alternativo: aŭ paco – ebliganta daŭran disvolvon kaj progreson de la homaro, aŭ nuklea milito – signifanta totalan pereon. Tial antaŭ sociaj kaj kultur-klerigaj movadoj – en ĝi ankaŭ la Esperanto-movado – staras la grava tasko ellabori kompleksan, integran teorion kaj praktikon de la paco, indan je universalaj homaj rajtoj. Kontinuante siajn pozitivajn tradiciojn la *Esperanto-movado devas aspiri al la disvolvado de konscio en la socio, ke globalaj krizoj kaj problemoj bezonas globalan aliron al ilia solvo.* Komunaj por tuta homaro danĝeroj devas esti solvataj nur pere de kunlaboro, dialogo kaj volo de reciproka kompreniĝo. Tiu ĉi koncepto estis klare elmontrita flanke de esperantistaj reprezentantoj dum la „Monda Asembleo por Paco kaj Vivo" en Praha, 21.–26. 4. 1983, kie ili konstatis, ke „estas necese serĉi tion, kio homojn kunligas kaj ne tion, kio ilin disigas"[12]. Dum tiu ĉi Monda Asembleo oni konstatis, ke ne estas sufiĉa tia paco kia estis post la IIa mondmilito. Ni devas scii, ke *post* la dua mondmilito pereis pli ol 50 milionoj da homoj, dum ĉirkaŭ 170 militoj, kiujn partoprenis preskaŭ 100 ŝtatoj de la mondo. Tia „paco" ne estas kontentiga ankaŭ pro aliaj kialoj. Ĝi estas atingata pere de tiel nomata dinamika ekvilibro de armado inter opaj militistaj blokoj kaj taktiko de la reciproka timigado. Kiel montras statistikoj, la kresko de la armilproduktado kreskigas interalie rekte aŭ nerekte malriĉegon, malsaton, malsanojn, malpurigadon kaj toksadon de la natura medio, k.t.p. En la mondo ekzistas pli ol 500 milionoj da malsatantoj, 600 milionoj da senlaboruloj, 900 milionoj da analfabetoj. Sed la registaroj de 32 ŝtatoj elspezas por armiloj pli ol por klerigado kaj sanigado kune. Jare oni elspezas meznombre por 1 soldato ĉirkaŭ 20 mil da dolaroj, dum por infano lernejaĝa 380 dolarojn.

La esperantista koncepto de edukado por la paco ĉefe akcentas la aktivan rolon de la socia konscio vidante en ĝi bazan kaj nepre bezonan rimedon de la efika antimilita agado. Tio ĉi korespondas proksime kun la principoj de la pacbatalo, kiujn jam en la 1949a jaro formulis la pola psikologo Tadeusz Tomaszewski. Li postulis:

- principon de konscio, tendencantan al tio, ke homoj ne iru partopreni militon propravole;
- principon de organizo, signifantan ke ne estu ebla devigi homojn al milito;
- principon de forto, ebligantan por homoj kontraŭstarigi militon.[13]

Ĉi supra koncepto kontraŭas la psikobiologiajn teoriojn pri la natura homa „militemo" (emo al agreso).

J. Piaget substrekas, ke imagoj pri aliaj landoj kaj socioj forte kaj profunde enradikiĝas dum infanaĝo.[14] Povas okazi tiam la sekva mekanismo psiko-ekkona: dum edukprocezo akcentita kultura alieco naskas senton de fremdeco rilate la aliajn sociojn, kiu facile povas transformiĝi – kaj ofte tio okazas – en simplan malamon. Kultura alieco reflektiĝas ofte en formo de stereotipoj rasaj, naciaj, ideologiaj, religiaj, lingvaj. Krom tio antipatioj kaj antaŭjuĝoj rilate aliajn naciojn elfontas ne nur el kulturaj aliecoj sed ankaŭ el simpla nescio.[15]

3.2. Lingva faktoro de homa konscio

La esperantista koncepto de edukado por la paco eliras el la premiso, ke kulturedukajn mekanismojn de aperado de la malamo eblas venki influante konsekvence kaj sisteme la socian konscion. Unu el la gravaj „kuraciloj" de „neplana" konscio – laŭ esperantistoj – estas la raciigita internacia lingva komunikado. Tiu konvinko bazas je konstatoj de antropologoj (ekz. F. Boas, M. Mead, B. L. Whorf), ke lingva diverseco strikte ligiĝas kun ekkonaj diferencoj ĉe homoj el diversaj kulturaj terenoj. Ekzemple J. S. Bruner substrekas la ekkonan signifon de lingvo, konstatante, ke ĝi aperas kiel „ilo kaj samtempe kiel limigo de ekkona evoluo".[16] La konvinko, ke lingva interpreto de la mondo ĉiam antaŭas penson kaj ekkonon, instigas trakti la lingvon kiel iaspecan filtrilon aŭ ŝirmilon, tra kiu infanoj lernas rimarki la ĉirkaŭan realon. Tio signifas, ke persono edukita en difinita lingva sistemo vidos la mondon „akorde kun denotacioj kaj konotacioj de tiu ĉi lingvo".[17] El tio rezultas praktika konkludo, ke por la bezonoj de la plena homa disvolvo avantaĝe estus ekkoni laŭeble plej grandan nombron de lingvoj, ĉar tio ebligas ekkonon de novaj interpretaĵoj de la realo kaj sekve pli objektivan kaj pli multaspektan ekkonon de la mondo. Ion similan pri socia ekkono kaj disvolvo asertas J. Conrad, konstatante ke la historio de civilizacio „estas historio de kultura difuzo, dum la historio de primitivaj triboj estas historio de izolo".[18]

3.3. Esperantista metodiko de la pacedukado

La problemon de pacedukado la Esperanto-movado pritraktas en universalaj kaj ĝeneralsociaj kategorioj. La scion pri la paco kaj la principoj elfontantaj el ĝi la Esperanto-movado traktas kiel ideojn direktantajn la organizadon de homa konscio kaj la metodojn de praktika agado. En sia metodiko de la pacedukado la Esperanto-movado aspiras:

- disvolvadi konscion pri tutmonda homa komunumo kaj rolo kaj loko de homunuo kiel ano de monda socio;
- inspiradi homan memreflekton pri tio, kia homo estas, kia li volas esti kaj kia li devas esti, por ke estu ebla – kiel tion deziras J. Krishnamurti – vidi la „vivon kiel tuton".[19]

La procezo de sociigado de personeco dank' al la agado direktita pere de Esperanta aksologio kaj partopreno en la Esperanta kulturo estas komplika kaj malfacila por objektiva scienca esploro. Sed multaj premisoj montras, ke ĝi ĉefe realiĝas dum ligado de individuaj motivoj de Esperanto-lernanto kun konscio pri disvolva ŝanco, kiun la Esperantista

(daŭrigo p. 17)

Generalkolonelo Ĥristo Dobrev, Unua vicministro pri popola defendo de Popola Respubliko Bulgario:

Multaj fortoj partoprenis la venkon super la faŝismo – Sovetunio portis la ĉefan ŝarĝon

En 1945 nova paĝo en la libro de la homara historio estis malfermita. La faŝisma-militarisma bloko kun Hitler-Germanio, faŝisma Italio kaj militarisma Japanio ĉekape estis frakasita. La ĝis tiam plej detrua milito estis finita, milito, kiu inkludis la teritoriojn de 40 landoj en Eŭropo, Azio kaj Afriko kaj kvar kvinonojn de monda loĝantaro, kiu daŭris preskaŭ ses jarojn kaj estingis la vivojn de kvindek milionoj da loĝantoj de nia planedo.

La socipolitika karaktero de la Dua Mondmilito montriĝis iom post iom. Ĝi rezultis – ankaŭ por la okcidentaj landoj, kiuj fariĝis objekto de agresio – el la reakciaj celoj, kiujn la ŝtatoj de la faŝisma-militarisma bloko intencis: la kompletan sklavigadon de la popoloj kaj la starigon de faŝisma mondregado. Tiuj klopodoj kaŭzis kreskantan partoprenon de la popolamasoj en la milito kontraŭ la faŝismo.

Konforme kun la komunaj interesoj de Sovetunio, Usono kaj Granda Britio kaj dank' al aktivaj klopodoj de la sovetia regado la kontraŭ-Hitler-koalicio estis fondita. La ekzisto de tia koalicio ludis ekstraordinaran rolon por la detruado de militfortoj de la faŝisma-militarisma bloko.

La progresema socipolitika karaktero, kiun la batalo de la pli malfruaj venkofortoj havis, la partopreno de la popolamasoj kaj de tiuj ĉi landoj kaj de la okupitaj ŝtatoj, sed precipe la decida rolo de Sovetunio je la disbatado de militfortoj de la faŝisma-militarisma bloko donis al venko de kontraŭ-Hitler-koalicio jam antaŭe grandan historian signifon. Ĝi ŝanĝis ĝisfunde la militpolitikan situacion; ĝi samtempe akcelis la batalon de la laboruloj en la kapitalismaj landoj kaj la batalon de la kolonie subpremitaj kaj dependaj popoloj pri nacia kaj socia liberigo. La spertoj, kiujn la homaro kolektis dum la Dua Mondmilito per plej grandaj viktimoj en la batalo kontraŭ la fortoj de agreso, de la monda reakcio kaj de la kontraŭrevolucio, havas decidan signifon ankoraŭ hodiaŭ.

Multnombraj provoj por falsi la historion

Ĉar la defendantoj de la imperiismo intencas miskreditigi la grandan aŭtoritaton de Sovetunio, kiun ĝi akiris kiel liberiganto de la popoloj kontraŭ la faŝismo kaj kiel portanto de la standardo en la batalo por paco kaj socia progreso, ili grave falsas la historion de la Dua Mondmilito: per ĉiuj rimedoj ili provas malglori kaj refuti la decidan rolon de Sovetunio je la venko super la faŝisma-militarisma bloko. Precipe evidente tiuj klopodoj montriĝis okaze de la 40-a datreveno de la albordiĝo en Normandio.

Tia interpreto de la okazintaĵoj de la Dua Mondmilito konformas al opinioj de la plej reakciaj historiistoj de Usono. Ili parte reprezentas diferencajn vidpunktojn, sed ili ĉiuj penas subtaksi la decidan rolon de Sovetunio por la rezulto de la Dua Mondmilito. Ekzemple en la „Westpoint"-atlaso, eldonita en Usono, nur 23 el entute 168 mapoj pri la Dua Mondmilito rilatas al la sovetia-germana fronto. Multaj batalegoj de la Granda Patrolanda Milito de USSR tute ne estas menciitaj, aliaj estas priskribitaj sufiĉe mallongaj kaj subjektivaj. Kelkaj britaj aŭtoroj volas apologii la strategion de la angla regado, eviti rektajn renkontojn kun decidaj fortoj de la malamiko. Ili pro tio faras ridindan asertȯn, ke la „strategio de la nerektaj operacioj" – tiuj estas deflankigaj operacioj sur duarangaj militejoj respektive la prokrasto je la malfermo de la dua fronto – ludis pozitivan rolon. Senbaza ankaŭ estis la aserto de Churchill, ke la batalego ĉe El Alamein kaj la albordiĝo de la trupoj de generalo Eisenhower en norda Afriko decide ŝanĝis la sinsekvon de la milito.

Letero de Churchill al Stalin en marto 1943

La batalagoj de la angla-usonaj trupoj en norda Afriko kaj en Pacifika Oceano estis realigitaj per tre limigitaj fortoj kaj ne povis influi decide la sinsekvon de la milito. Ekzemple vidalvide de la angla-usonaj trupoj en norda Afriko nur staris 4 ĝis 5 divizioj de la germana armeo, dume samtempe ĉe la sovetia-germana fronto 197 divizioj de Hitler estis enbataligitaj. Krome trupoj de la germanaj satelitoj. En la sinsekvo de ĉiuj nordafrikaj batalagoj ekde junio 1940 ĝis majo 1943 12 germanaj kaj italaj divizioj estis neniigitaj, sed sole dum la batalegoj ĉe Stalingrad kaj Kursk la malamiko perdis pli ol 65 diviziojn. En letero de Churchill al Stalin en marto 1943 la brita ĉefministro devis konfesi, ke „la skaloj de tiu ĉi operacio ne estas granda, kiam oni komparas ĝin kun la grandiozaj operacioj, kiujn vi gvidas".

Dum la lastaj 20 jaroj en okcidento fariĝis modo, disvastigi teoriojn pri la „decidaj batalegoj kaj turnopunktoj" de la Dua Mondmilito. Unue Pentagono fabrikis tian teorion kune kun State Department de Usono komence de la sesdekaj jaroj. Laŭ ĝi al la plej decidaj batalegoj de la Dua Mondmilito apartenis: la batalegoj en Pollando 1939, la batalo pri Anglio kaj Kreto, la defendo de la usona fortreso Corregidor sur Luzon, la batalego en Stalingrad, la batalo pri la atolo Tarava, la albordiĝaj operacioj de la okcidentaj aliancanoj en Sicilio kaj en Normandio, la bataloj en la Ardenoj kaj la konkero de la japana insulo Okinava.

Laŭdira translokiĝo de la pezocentro al okcidento

Similaj estas spekuladoj pri la dua fronto. La plimulto de la okcidentaj burĝaj historiistoj indikas la agadojn de la aliancitaj trupoj post la albordiĝo en Normandio je la 6-a de junio 1944 kiel decidaj por la malvenko de Hitler-Germanio. Laŭ iliaj asertoj post la malfermo de la dua fronto la pezopunkto de la militagoj kontraŭ Germanio ŝanĝis al okcidenta Eŭropo. La dua fronto fariĝintus

la plej grava kaj plej decida dum Dua Mondmilito. Historiistoj el Usono kaj ankaŭ el FRG asertas, ke la fina rezulto de la milito kontraŭ Germanio estis „rekta sinsekvo" de la albordiĝo de la aliancitaj trupoj en Normandio.
Certe la dua fronto ligis parton de la germanaj militfortoj kaj ludis certan rolon je la frakaso de Hitler-Germanio. Tiu ĉi fakto ne estas kontestata, sed la dua fronto multe pli forte efektiviĝintus, kiam oni malfermintus ĝin pli frue. La sovetia gvidado urĝigis ĝin, kaj la okcidentaj aliancanoj ĉiam denove promesis ĝin. Sed nenio okazis. La ĉefkaŭzo de tio estis la strebado de reakciaj fortoj en Usono kaj Anglio, doni ĉiujn ŝarĝojn de la milito al Sovetunio, por iom post iom eluzi ĝin.
Tial Sovetunio dum tri jaroj devis batali sola kontraŭ Hitler-Germanio. La aeratakoj de Usono kaj Anglio kontraŭ germanaj urboj dum tiu ĉi periodo ne kapablis decide influi la sinsekvon de la milito. Ili eĉ ne rezultigis seriozan malfortigon de la militekonomio de Germanio. Laŭ konstato de speciala komisiono de usonaj ekspertoj la germana ekonomio en 1943 rezulte de la bombadoj nur perdis 9 procentojn de sia produktado, kaj en 1944 estis 17 procentoj. Tiuj ĉi perdoj ne kaŭzis decidajn efikojn koncerne la kapablecon de la germana ekonomio, produkti la necesan por la strategio de militado. La okcidentaj potencoj malfermis la duan fronton, post kiam la sovetia armeo rompis la spinon de la militfortoj de la germana faŝisma bloko, liberigis la plej grandan parton de la sovetia teritorio kaj preparis grandajn operaciojn por la decida atako al okcidento kaj al Balkano. Ĝenerale estis klare, ke USSR povintus disbati sole la faŝismajn okupintojn sur ties teritorio kaj liberigi la tutan Eŭropon.

Provoj por purigi la responsulojn

En FRG du absurdaj deklaroj pri la malvenko de Hitler-Germanio rondiras inter la venkitaj generaloj kaj reakciaj historiistoj. La unua deklaro atribuas ĉion al la individuaj mankoj de Hitler kaj al lia nekapableco kiel gvidanto, la dua al la malfavoraj geografiaj kaj klimataj kondiĉoj, precipe sur la orienta militejo. Al tiuj ĉi versioj ankaŭ multaj historiistoj de Usono, Grandbritio kaj Francio aliĝis. Per tio la germanaj monopoloj, kiuj surtronigis la faŝismon, kaj la germanaj revenĝistoj estu malŝarĝitaj de ilia respondeco pri la malvenko de Germanio. Certe la individuaj ecoj de Hitler ludis certan rolon je la maniero de militado. Sed oni neniam forgesu, ke Hitler kaj la Hitlerismo estis leĝokonformaj kreitaĵoj de la germana militarismo kaj revenĝismo kaj ĉiuj agadoj de Hitler estis esprimo de la strebado de la germanaj monopoloj al mondregado.
Ĉiuj menciitaj teorioj kaj asertoj celas malgrandigi la rolon de USSR je la disbato de Hitlerfaŝismo kaj de ĝiaj aliancanoj. Sed tio neniel estas konforma kun la historia vero. Sendube la venko super la faŝisma-militarisma bloko dum la Dua Mondmilito estis la rezulto de komunaj penadoj de la ŝtatoj aliancitaj en la kontraŭ-Hitler-koalicio kaj de la rezistmovado de la sklavigitaj popoloj en Eŭropo kaj Azio. Sed la sovetia popolo portis la plej grandajn ŝarĝojn de la milito kaj USSR ludis la decidan rolon je la disbato de la faŝisma-militarisma bloko.

(Traduko el „Horizont", n-ro 4/1985 de Manfred Arnold

(Daŭrigo de p. 15)

metodologio de edukado por la paco traktas tiun ĉi procezon en du etapoj. Unue ĝi aspiras elimini negativajn stereotipojn kaj sintenojn, kiuj povas enigi aŭ helpi agresivajn tendencojn. Due, temas pri disvolvo de amiksentoj, estimo kaj toleremo al aliaj nacioj, iliaj kulturvaloroj kaj atingoj. En ambaŭ etapoj tre pozitivan rolon povas ludi internacia lingvo ebliganta rapidan, nedeformitan far perantoj, senperan informfluon internaciskale kaj multdirektan interŝanĝon de pensoj, ideoj kaj valoroj. Eblas diri, ke la Esperantista metodologio de la paco premisas influadon al du sferoj de homa konscio je:

- *scio*, kio signifas: plilarĝigado de scio pri aliaj socioj, pri militmekanismoj, pri pacneceso, kaj pri kondiĉoj de packreado,
- *sistemo de valoroj*, kunligita kun decid-vola sfero kiam estas aspirata la disvolvo de sintenoj de la engaĝeco kaj respondeco je pacaferoj de la mondo.

La integrado de ĉi supraj influoj estas necesa faktoro de efektivigo de la edukado por la paco, sed ankoraŭ ne sufiĉa. Sekva faktoro estas la kreo de soci-organiz-jura porpaca infrastrukturo ne nur en enŝtataj kadroj sed ankaŭ internaciskale. Precipan funkcion ĉi-rilate plenumas kultur-edukaj internaciaj neregistaraj organizoj, kiel pli kaj pli grava faktoro de internaciaj rilatoj. Sur tiu ĉi fono la esperantistoj ne nur postulas sian lingvon kiel racian kaj neŭtralan pacigan komunikilon, sed per propra pacagada aktiveco kaj reala realigado de la homaj rajtoj. Tiun ĉi interligon akcentas aganto de UEA, S. Milojeviĉ: „Kiam ni do laboras por Esperanto ni jam per tio troviĝas en la mezo de la batalkampo por la homaj rajtoj."[20] Simile traktas la aferon la honora prezidanto de MEM, N. Aleksiev, skribante: „Ni, esperantistoj, devas bone kompreni, ke hodiaŭ bolas batalo por *defendo de la rajto de l'homoj vivi.* (subst. T. E.) En tiu batalo ne estas loko por indiferentaj personoj."[21]

Notoj:

[1]) Komp.: I. Lapenna/U. Lins/T. Carlevaro: Esperanto en perspektivo, London–Rotterdam, 1974, p. 564–568
[2]) Komp.: N. S. Podkaminer: Lenin kaj Esperanto, en: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, red. D. Blanke, Budapest 1978, p. 31–50; W. Gilbert, Esperanto servu al la paco, en: Kio estas MEM? Praha 1968, p. 4–5
[3]) Nguyen Van Kinh: Esperanto serve al internacia amikeco kaj mondpaco, en: Esperanto. Lingvo, movado, instruado, red. D. Blanke, Berlin 1977, p. 111
[4]) Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, Bratislava 1976, p. 53–79
[5]) M. Mesaroviĉ, E. Pestel: Ludzkość w punkcie zwrotnym, Warszawa 1977, p. 164–165
[6]) Komp.: Folozofia i pokój, Warszawa 1971
[7]) L. Breżniev: O sprawiedliwy pokój, obezpieczeństwo narodów i współpracę międzynarodową, Warszawa 1973
[8]) J. Stefanowicz: Motywy polityki zagranicznej, „Sprawy Międzynarodowe" 1980/10, p. 97–108
[9]) L. L. Zamenhof: Originala Verkaro, Leipzig 1929, p. 357
[10]) P. Balkanyi: Ĉu ekzistas ideologio de Esperanto?, „Paco", Berlin 1977, p. 31
[11]) M. Dobrosielski: O twórczy rouwój marksistowskiej filozofii pokoju, „Nowe Drogi" 1983/10, p. 87
[12]) M. Hemerková: Monda Asembleo por paco kaj vivo, kontraŭ nuklea milito, „der esperantist" 1983/5, p. 98
[13]) T. Tomaszewski: Wojna jako zagadnienie psychologiczne, „Przegląd Filozoficzny" 1949/3–4, p. 325–326
[14]) J. Piaget/A. M. Veil: The Development in Children of the idea of the Homeland and Relations with Other Countries, en: „International Social Science Bulletin" 1951/3, p. 561
[15]) Komp.: E. L. Hartley: Problems in Prijudice, New York 1946
[16]) J. S. Bruner: Poza dostarczone informacje, Warszawa 1978, p. 613
[17]) J. Conrad: Człowiek, rasa, kultura, Warszawa 1971, p. 150
[18]) samloke, p. 126
[19]) J. Krishnamurti: Eduko kaj vivsignifo, Laroque Timbaut 1980, p. 8
[20]) S. Milojeviĉ: Esperanto mem estas homa rajto, „Esperanto" 1978/11, p. 189
[21]) N. Aleksiev: La vivinteresoj de la homaro metitaj sur karton, „Paco" 1981/6, p. 2

Wolfgang Kohlhaase

Invento de lingvo

Laŭtparolilo vokas dek numerojn, la deka estas lia. Straat sentas nek timon nek esperon. Li paŝas el la vico, ŝancelas inter dorsoj kaj vizaĝoj ĝis la fino de sia bloko, turniĝas dekstren kaj alproksimiĝas trenpaŝe la viron, kiu estis alvokinta lin kaj kiu staras sur podio, antaŭ si pupitron kun paperoj kaj mikrofonon.
Estas aprilo, en la jaro kvardek kvar. Straat, la deka en la formiĝanta vico, vizaĝo muren, estas mortlaca, kvankam la tago fruas, kvankam li estas tiel juna. La ĉielo, kiun li vidas, se li levas la rigardon super la tegmenton de la gardista domo, estas malalta kaj malseka. Iom laŭlonge de la nuboj, iom ĉirkaŭ la terglobon, situas Nederlando. De tie oni alportis lin, Straat, kune kun kvin aliaj, antaŭ cent tagoj, antaŭ long-longa tempo. Kial? Por ke li ŝvitu, por ke li frostu, por ke li portu ŝtonojn, suferu batojn, kuŝu en la koto, dormu sur bretoj, manĝaĉu putrintan legomon kaj fine ĉesu ekzisti. Sed antaŭe, ankoraŭ spirante, li forgesu, kiu li estis. Li eĉ jam preskaŭ forgesis. Ne imageble, ke tie, laŭlonge de la ĉielo, ankoraŭ ĉiam ekzistas lia naskiĝloko, tero kaj akvo, la gepatroj, la vesperoj, la alispeca odoro de la knabina klaso, la aparatoj malantaŭ la vitra ŝrankopordo, la fiziko. Ses semestrojn da ĝi! Ne imageble! La leĝo de la konservado de la energio ja ne plu validas. Ne validas por tiuj, kiuj kuras kun ŝtonoj trans la grandan ŝtuparon, sub la bastonoj, antaŭ la celiloj, de malhelo al malhelo. Ses studentoj de fiziko; kvin pereis. La lasta, mortlacega, estas Straat. Kaj ĉi-tage li ne iras en la ŝtonrompejon, ĉar lia numero estas alvokata.
Dek viroj, sed kien ili iras? Ĉu en la bunkron? Ĉu en la malsanulejon? Ĉepinte iras Kapo en blanka jako, li gvidas ilin en la kuirejon. Domo el ŝtono, ene kahelita. Ses brilantaj kaldronoj, en ili la mefitanta supo estas kuirata. Sed ne pro la supo oni venigas ilin. Oni venigas ilin pro la terpomoj. La komandestro aranĝas amuzan vesperon por la kamaradoj. La postenoj, la batmortigantoj, la kvestoroj, la kontrolistoj, la materialadministrantoj, la torturistoj, la skribĉambruloj, la kuracisto dum tiaj okazoj hejmece sidas kune ĉe longaj tabloj. Kaj la vespero baziĝas sur tri kolonoj: unue kamaradeco, due biero, trie rostita porkaĵo kun terpoma salato. Pro tio dek skabeloj staras en la koncentreja kuirejo, apude dek korboj kun terpomoj, antaŭe dek pelvoj por forjetaĵoj, en la mezo metala kuvo, kaj sur unu el la skabeloj kaŭre sidas Straat.
En la kuirejo estas varme kaj silente. La proksima ŝtonrompejo estas for. En apartejo apud la pordo sidas SS-ano kaj legas. Nur la Kapo foje alpaŝas la senŝeligantojn de terpomoj kaj spektas. Nenia malico, nur faka intereso. Tamen la fingroj de Straat ektremas, mankas sperto, la ŝeloj trodikiĝas, li estas tro malrapida en la ombro de la Kapo, kiu rigardas sur liajn manojn. Li foriras kaj revenas. Straat laboras pli haste, sed tio ne helpas. Li jam aŭdas la demandon: „Kion do vi faris pli frue, vi?"
„Studento", diras Straat, kaj ne rigardas supren kaj ne ĉesas manotreme senŝeligi. Tuj li ricevos piedpuŝon. La SS-ano malantaŭ la fenestro ekrigardas de sia libro. Kaj poste? Sed la Kapo nur diras „Ĉeso de studado, ĉu?"
Tagmeze ili ricevas pelvon kun vaporanta supo, de supre, kie naĝas kelkaj viandofibroj. Poste duan pelvon, plena ĝis la rando. Straat apogas sin ekstere al la muro de la kuireja konstruaĵo, kun ĉiom da supo en la skeleto, trankvila. Subite sen malsato. Ne la ŝtonrompejon. Nenia kriado. Malproksime, sub la elektra barilo, kien neniu rajtas iri, li rimarkas brileton de verdaĵo kaj li memoras: aprilas ja.
La Kapo observas lin kaj alpromenadas kaj demandas: „Kion do vi studis, ulo?" „Fizikon." „Mi komprenas", diras la Kapo en tono de komplico.
Posttagmeze Straat malpli timas, kiam tiu staras apud li. Iom da suno diagonale transas la kuirejon, la terpomoj falas peze en la akvon, la konstanta kuireja taĉmento, en blankaj antaŭtukoj, tranĉas panon por la sekvonta tago. Kiu povas kredi, ke ĉi-momente iu mortas, en la sablo, ne malproksime. La Kapo denove staras ĉe Straat kaj sentas bezonon komunikiĝi. „Damne, se mi povas eliri de ĉi-tie", li diras, „post la milito, tiam mi iros al Persio."
Nome, la Kapo havas fraton en Persio, li rakontas al Straat, kiu foriris ĵus ankoraŭ ĝustatempe, tridek naŭ. Li nun sidas tie kaj estas granda komercisto, kaj la Kapo sidas ĉi-tie kaj estas idioto.
„Vi estas nederlandano", diras la Kapo. „Kion vi opinias, ĉu Persio estas bona?"
„Certe bona", diras Straat. Li senŝeligas kaj senŝeligas, nur ne plu tiel rapide. La Kapo, en la mola posttagmeza lumo, kapjesas kiel ulo, kiu sentas sin komprenata, kaj eksuspiras.
„Domaĝe nur pro la tempo, la bela tempo. Se oni ĉi-tie almenaŭ povus lerni la persan." Li rigardas zorgoplene, honestajn kunul-sulkojn en la vizaĝo, viro de preskaŭ kvardek kaj sufiĉe nutrita, kompare al la ruinoj sidantaj tie en cirklo. La fato ĵetis kaj poste altigis lin, sed tamen li sidas en la merdo. Jes, jes, mia bonulo.
Straat subite aŭdas sin diri: „Mi scipovas la persan!" La Kapo longe rigardas lin el palaj bluaj okuloj, komence nekredeme, poste skeptike, poste preskaŭ kareseme. „Vi scipovas la persan?" Straat kapjesas rigid-trajte. „Kunvenu!"
La Kapo ekkuras, Straat sekvas lin stumblante en la buroan apartejon. „Bone, kaj nun diru al mi, de kie vi scipovas la persan!"
Nun jam ne plu ekzistas returna vojo por Straat. Kun Kapoj oni ne aŭdacas ŝerci, des malpli, se oni bezonas nur unu plian puŝon por fali kaj neniam plu ekstari. Straat ja ne volas ŝerci, li nur ne plu volas iri en la ŝtonrompejon, kie li pereos. Li volas resti en la kuirejo, kie li sidas kiel homo sur skabelo kaj senŝeligas terpomojn, kaj kie li ricevas supon. Li nur timas, ke lia voĉo ne funkcios. Sed ĝi ne forlasas lin, ĝi estas nur tre mallaŭta. Li diras: „Mi estis en Persio. Antaŭ la milito."
„Homo, ĉu vi scias, kio okazas kun vi, se tio ne estas vera?" Straat rigardas tiel terurigite, ke la Kapo certas: tiu-ĉi scias, kio okazos kun li.
„Ek, kio estas Bonan Tagon?"
„Dalam", diras Straat.
„Kaj merdo?"
Straat pripensas tro longe, la Kapo tuj fariĝas senpacienca. „Devas do ekzisti vorto por merdo!" „Tupa", diras Straat. „Tupa", la Kapo ripetas kortuŝita. Tiam li diras: „Nun vi senŝeligos pro via vivo!"
Tiom, kion ili parolas. Ĝi efikas multon. Ekzemple, ke la kuireja Kapo Battenbach haltigas la rotestron Roeder, kiu reaperas post abunda paŭzo. Li klarigas al li, ke li jam delonge bezonas kroman viron en la kuireja taĉmento, neniam

troviĝis taŭgulo, sed nun iu frapis lian atenton per aparta lerteco. La rotestro kapjesas al tiu parolado. Li eĉ ne kontraŭas foje rigardi tiel elstaran personon. Battenbach-on malantaŭ si li papave stilziras transen al la senŝeligantoj kaj tie rigardas la duonmortan pro malsato nederlandanon, antaŭe studento de fiziko, ses semestrojn, sed kion tio interesas Roederon. Kio lin interesas, tion li jam vidas. Kaj tio estas, ke al tiu viro mankas eĉ imageto kiel senŝeligi terpomojn, malgraŭ ties malesperaj klopodoj. Sed tio ne gravas, ĉar la rotestro dufoje semajne kunprenas pecon da kolbaso, dimanĉe rostaĵon kaj de tempo al tempo kubon da margarino. Ĉi-ĉio venas de Battenbach. Sekve Roeder kapjesas duan fojon kaj returnas sin al sia apartejo kaj skribas nomon kaj numeron sur slipon.
Tiu alvenas samtage en la laborstatistiko. De tie al la estro de la laborservoj. Kaj la sekvantan matenon, kiu ŝvebas malseke super la apelplaco, Straat kiel sola el dek senŝeligintoj revenas en la kuirejon, kie Battenbach afable frapas lian ŝultron.
Straat nun estas ŝirmitulo de Battenbach. Li ne forbrulu al osta cindro. Li ricevas supon kaj panon, por ke li refortiĝu. Domaĝe je tia kapo, diras al si Battenbach, kaj frotas siajn manojn. Ili enkarcerigis lin ja pro prostituistado, nepolitike, sed ke li nun lernas la persan tion ili ne malhelpas. Tion ankaŭ Roeder ne povas scii, kiu ĉirkaŭrampas Straat-on la unuajn tagojn kaj provas ion diveni. Tion li ne povas scii, ke aparta lingvo ligas la satan Kapon kaj la malsatan nederlandanon. Sed ke tiu lingvo tute ne ekzistas, tion eĉ Battenbach ne povas scii. Tion scias nur Straat. Nur li mem decidas pri reguloj kaj vortoj. Kiom da vortoj li bezonos? Dum kiom da tagoj?
Tagmeze, kiam la rotestro Roeder foriras manĝi, Battenbach tuj vokas Straat-on en la skriboĉambron kaj sidiĝas koncentriĝinte malantaŭ la tablon, antaŭ si glatigitan paperon kaj stumpon de krajono, preta, alpropriĝi al si la persan. La unuan tagon li volas aŭdi ankaŭ ĝeneralaĵojn pri Persio. Straat tie lasas esti varmege, kaj lasas la virinojn esti belaj kaj la povrulojn povraj kaj la riĉulojn riĉaj. Battenbach estas kontenta; estas, kiel li imagis. Li mem venas el la amuza branĉo, ĉu tio ankaŭ ekzistas? Bordeloj? Straat ne tuj scias. Battenbach komprenigas sin. Jes, kompreneble, nepre, diras Straat. Kaj Battenbach kapjesas, estas, kiel li supozis.
Sed nun li volas scii kelkajn vortojn: brando, polico, dankon, mi petas, tablo, seĝo, lito, kantino, kotleto. Straat ne darfas heziti, ne la unuan tagon. Li nomas ĉion laŭvice: alan, monato, laps, nam, toki, sol, oltok, runidam, kotelett. Tio estas prunteprenita vorto, diras Straat. Tio estas internacia.
Pezamane Battenbach ĉion notas. Vespere, sub la ĉifona kovrilo, ŝultro-al-ŝultro kun najbaro, kiu dividas kun li la tabulkuŝejon, paralizantan lacecon malantaŭ la okuloj, vespere Straat serĉas vortojn, sed antaŭ ĉio sistemon, helpe de kiu li povu memorteni la vortojn. La peza spiro de la elĉerpituloj ĉirkaŭas lin, la viro apud li ĝemas en dormo. La lipoj de Straat formas signifojn, kiujn neniu iam estas aŭdinta: or, tal, mel, met, meb. Tio estas: mi, vi, li, ŝi, ĝi.
Battenbach puŝas sian pugnon inter liajn okulojn, tretas lin antaŭ la tibion, ŝovegas lin kontraŭ muron. Battenbach tremas pro kolero kaj seniluziiĝo. Estas pro runidam, la persa vorto por kantino. Straat estis inventinta ĝin la unuan tagon kaj nun, kiam Battenbach denove demandas, li estas forgesinta ĝin. Kaj Straat sciis, ke io eskapis el lia memoro, sed Battenbach ne ebligis al li rigardon sur sian slipon kaj atendis du tagojn kaj notis novajn vortojn kaj igis lin literumi la vortojn, nur por ke Straat ne rigardu trans lian ŝultron. Kaj nun li havas lin inter siaj pugnoj kaj konviktos tiun nederlandan porkon ankoraŭ antaŭ fino de la tagmeza paŭzo. Dek jaroj, krias Straat malespere, antaŭ dek jaroj li estis en Persio, li estis ankoraŭ infano kaj runidam estas malofta vorto, li ekmemoris ĝin nur hazarde. Kantino fakte nomiĝas mardam, sed se li ne ricevas paperon kaj krajonon li ne povas refreŝigi siajn memorojn post tiom da tempo.
„Mi lasos vin mortaĉi", diras Battenbach. Tiam ili silentas. Straat apogas sin je la muro kaj rigardas la Kapon per timemaj okuloj, kaj tiu gapas sur la knaban frunton, super kiu sin grize streĉas la haŭto. Li vidas la vejnon frapantan en la tempio. Damne, se li povus vidi en la kapon de tiu! Dubo rampas en lian malfidon, dubo, al kiu li emas cedi. Ĉar jam post malmultaj tagoj la lingvo estas enhokiĝinta en lia menso. Dum la malplenaj vesperoj, kiam li rigardas el sia fenestro trans la apelplacon, plenigita kun inerta malamo kontraŭ la mondo, trafita de memoroj al inaĉoj, li per helpo de la malfacile lerneblaj persaj vortoj subite fariĝis viro, kiu utiligas la horojn kaj pensas perspektive kaj havas siajn sekretajn ambiciajn planojn.
„Knabo, se vi trompas min! Se vi ne scipovas la persan", diras Battenbach, kaj la monstreco de la penso tremigas lian voĉon. „Mi scipovas", diras Straat. „Mi scipovas la persan. Pasis nur longa tempo." Ekde tiam Straat disponas pri krajono kaj papero, riĉaĵoj, por kiuj oni povas puniri en la bunkron. Se ili trovas ion ĉe li, Battenbach scias pri nenio. Straat kaŝas la krajonon en la ŝuo kaj la paperon en la ĉapo. Super la cerbo, inter la tondita hararo kaj la ĉapa ŝtofo, li portas la lingvon. Dum apelo li devas atenti, ĉefe dum la ordono „Ĉapojn for!" La lingvo povas elfali. Ĝi povas esti trovata kaj forprenata de li. Tiam li estas perdita, kio ajn okazos. Liaj gardistoj aŭ lia disĉiplo mortbatos lin. Ĉiuvespere li kaŝas ankaŭ panon aŭ kelkajn terpomojn en sia vestaĵo. Li donas ilin al kuŝtavola kamarado, elektristo el Groningen, ŝtonrompeja taĉmento. Li pezas ankoraŭ naŭdek funtojn.
Sian lingvon Straat perlaboras nokte. Li turnigas literojn kaj silabojn, tiamaniere li inventas vortojn. La specialaj germanaj ekipaĵoj, kiuj ĉirkaŭas lin, fluas en lian lingvon. Se li donas al ili sonon, kiu forportas lin, ne al Persio, sed al fremda kaj mallaŭta mondo, en tiuj momentoj li eskapas el ilia terura signifo. Riom, rema, matori, mero, kemato, ikre, tame, mori, rotam, kretom, orite, mekor, komo, emati, kato, tamko, taritora.
Ĉion-ĉi li gajnas el krematorio. Tiel okazas kun aresto kaj barako, kun ŝtonrompejo kaj pikildrato, kaj eĉ kun Battenbach, lia ŝirmulo, kiu tiamaniere lernas el si mem.
El la grasa nigra fumo fariĝas omfu, la vento.
Straat notas siajn vortojn en la malhelo sur sia papero, kiel eble plej malgrande. Li kaŝas la paperon en la ĉapo kaj pakas la ĉapon sub la pajlosakon. Li inventas ne pli ol kvin vortojn po nokto, tridek po semajno, tio sufiĉas ankaŭ por Battenbach. La dimanĉon li ellasas. Straat manĝas du telerojn da supo ĉiutage, li fariĝas pli forta, li rimarkas, kiel eksomeriĝas. De foraj kampoj venas odoro de florantaj lupinoj. Nederlandano el la laborstatistiko atendas lin en la latrino.
„Kion vi faras kun la Kapo en ties apartejo, ĉiutagmeze?" „Tio vin ne koncernas", diras Straat malfideme. La alia rigardas lin indulge. Li diras: „Vi ne hazarde iris senŝeligi terpomojn. Ni metis vin sur la liston, ĉar vi estis la lasta el la studentoj. Por ke vi refreŝiĝu unu tagon." Li faras paŭzon, li diras: „Kaj poste Battenbach postulis vin. Kial?"
Silento, nur la zumado de la verdbrilantaj muŝoj. Kaj Straat vidas en la okuloj de la alia ne nur suspekton, sed timon kaj kunsenton, tamen ankaŭ senindulgecon kaj severecon. En tiu momento li sentas, ke la nur al li konata lingvo ne nur kapablas gardi sed ankaŭ detrui lin, ĉar ĝi levas lin super liajn proksimulojn. Sed li timas malkaŝi sian sekreton, ankaŭ al tiu, kiu povus esti lia amiko. Kiu do estas vere lia amiko? Plej verŝajne eble la knabo el Groningen, sur la tavolkuŝejo apud li, al kiu li portas panon, terpomojn kaj kuraĝon. Sed eĉ al tiu li konfidas nenion.
Somero kvardek kvar. La arĝentaj ŝnuroj de la bombaviadiloj tiriĝas laŭ la germana ĉielo. Straat faras vorton por vivo, li nomas ĝin: saval. Kaj vorton por pomarbo, pro plezuro, tio estas pollimolli. Ne por amuzi Battenbach-on. Tiu lernas ciferojn kaj parolturnojn kaj ilojn el la amuziga branĉo, je propra deziro. Se Battenbach montriĝas kaprica Straat in-

ventas venĝo-vortojn. Unu el ili estas suliduladornatlam. Battenbach volas rifuzi; kolere li diras, ke li bezonas praktikan persan, por ĉiutage. Sed Straat klarigas al li, ke tio estas la kutima tutlanda saluto. Oni ne povas paŝi tra pordo en Persio sen suliduladornatlam.

„Tupa", diris Battenbach, kvazaŭ denaska perso.

Cetere, dum la menso de Straat, klerigita pro la fiziko, ne plu paralizita pro malsato, ne plu narkotita pro timo, dum ĝi elpensas la skeleton de la lingvo, ĉirkaŭe mortas ĉiutage kvindek-kelkaj viroj, semajnon post semajno. Ilia karno forbrulas, ilia cerbo forviŝiĝas, iliaj animoj flugas al la ĉielo de ilia kredo. Antaŭe ilia buŝo eble parolis lastan vorton, kiu ekvojaĝas longan vojon, tra homoj, tra landoj. Finfine ĝi eble atingos tiujn, kiuj atendas ĝin.

La lingvo de Straat atingos neniun krom Battenbach, ĝi ne portas mesaĝon, ĝi reprezentas nenion krom si mem. Ĉi savas tiun, kiu inventis ĝin kaj tiun, kiu pene lernas ĝin, homan hundon, ne sangavidan hundon, plimildigas ilin. Krom tio ĝi estas senutila. Sed Straat bezonas por sia lingvo la fantazion de la grandaj malkovroj, la kuraĝon de la grandaj hipotezoj, la penojn de la grandaj eksperimentoj. Kaj Battenbach, kuireja Kapo, prostituisto el Hamburgo, bezonas la saman diligentan naivan stultecon, kun kiu li sidis antaŭ longa tempo sur la lerneja benko.

Iun aŭgustan matenon oni portas Straaton de la apelplaco, kie li falegis teren, al la malsanulejo. Lia vizaĝo estas makulplena, la ŝvelinta lango pendas el la buŝo. Tri tagojn li kuŝas febrante sur la pajlo, sur la planko. La flegistoj aŭdas lin paroli konfuzan nederlandan, sed li balbutas ankaŭ nekompreneblajn sonojn, vortĉenojn sen senco. Tiam estas antaŭvideble, ke li ne pereos. Li estas pli forta ol aliaj, sed ĉu li ankoraŭ havas sanan menson? La koncentreja sanitaristo kun injektilo trapaŝas la vicojn. Per aero li kuracas ĉiujn dolorojn. Kiu mortas, tiu ne plu malsanas. Se li aŭdos Straat-on krii, li deklaros lin freneza, li notos lian numeron, tiam li suprenŝovas al li la manikon kaj serĉos la vejnon. La flegisto tiras Straat, la piedojn antaŭen en apudan ejon. Tie kuŝas la mortintoj, tie lin aŭdos neniu, tie lin serĉos neniu. Tie Straat rekonsciiĝas. En varma sunlumo, kiu penetras tra du fenestroj, li vidas siajn egalulojn, rigidiĝintajn en la strangaj movoj de la lasta momento. Pupiloj, por ĉiam fiksitaj. Buŝoj, vaste malfermitaj, sen krio. Ĉu li mem do vivas? Li havas voĉon, per kiu li povas hurli kiel lupo, kaj li povas per ĝi elparoli vortojn, pri kiuj ĉiu miras, krom liaj silentaj kunuloj. Ĉu li do jam apartenas al ili?

Antaŭ ol venas la interne per zinklado kovrita kadavra ĉaro kaj veturas reen ĝis la fenestroj, oni portas la pro febro ĉirkaŭ si batantan Straat-on en liton. Alitage li estas pli trankvila. La flegisto, germano, rigardas lin kapskue. „Kamarado, kiajn strangaĵojn vi nur kriis? Ni pensis, ke vi freneziĝis." Kaj li tuŝetas sian frunton. Straat estas tre malforta, li forgesas ĉian singardon. „Estas perse", li diras. „Sed ne estas vere la persa. Mi elpensas ĝin." „Kion vi elpensas?" „Lingvon", diras Straat.

Do, ili tamen savis mense difektitan ulon, tiel ŝajnas al la flegisto. La fato estas blinda, grandaj geniuloj pereas, tiu nederlandano havas feliĉon. Havas pli ol feliĉon, ĉar la kuireja Kapo utiligas siajn rilatojn kaj sendas al li plurfoje panon. Straat plisaniĝas, kaj kiam la flegisto ankoraŭfoje demandas pri la lingvo, Straat ŝajnigas nenian memoron. Kaj ankaŭ la ektimon Straat kaŝas, ektimon pro la perdo de sia ĉapo. Li revenas al sia bloko, homo releviĝinta el la morto, li vidas novajn vizaĝojn, ankaŭ sur sia tavolkuŝejo. Li atendas la blokestron, tiu manpremas lin. „Venu, mi havas ion por vi." En la blokestra ĉambro plankobreto estas malfiksita, de sub ĝi la blokestro tiras malpuran ĉifonon; ne ĉifonon, estas ĉapo. Straat ĝin turnas inter la manoj kaj sentas la paperon, sur kiu troviĝas lia lingvo.

„Tiu, kiu kuŝis apud vi, la elektristo, kunportis ĝin de la apelplaco." „Kie li estas?" demandas Straat. „Li malsaniĝis post vi", diras la blokestro. „Li ne plu revenos." La blokestro spiras siblante, io en lia nazo ŝajnas rompita. Li diras: „Kunportu ankaŭ estonte ion el la kuirejo. Estas multaj, kiuj ĝin bezonas."

Tiel ĉio kontinuas. Straat denove ekservas en la kuireja taĉmento. En la palbluaj okuloj de Battenbach brilas kontentiĝo. Battenbach neniun lasas perei. Tagmeze, kiam rotestro Roeder estas foririnta, li sidiĝas malantaŭ la tablon, la krajonstumpon en la mano, en la vizaĝo la humileco de lernanto. Lerni nomiĝas lifu.

Kaj Straat kontrabandas paperon kaj krajonon kaj panon kaj terpomojn tra la kriado de la apeloj, kaj vespere, ŝultron al ŝultro kun nova apudulo, li elpensas parolturnojn kaj frazojn kaj konstruas konjugacion kaj deklinacion. Jam ne plu nur pro Battenbach, al kiu sufiĉas la laborkvanto. Nun estas la lingvo mem, kiu pelas lin.

Ankoraŭ unufoje minacas al li malkaŝiĝo. Battenbach estis eksciinta, ke oni liveris person en la koncentrejon. Vivantan person! Kia okazo! Du tagojn Battenbach vagadas tra la koncentrejo. Helpe de ĉiuj al li konataj trukoj li provas lin trovi. Fine li sukcesas, tamen ne estas perso, sed hindo. Pluan tagon Battenbach insultas. Kia koncentrejaĉo! Inter la tuta fiularo neniu perso! „La Führer nur ne venis ĝis tie", Straat diras konsolante. Kaj li pensas: bedaŭrinda soleca viro el Hindio.

Fariĝas aŭtuno kaj fariĝas vintro. Trans la apelplacon blovas glacia vento kaj kirlas malprofundan neĝon sur la frostitan teron. Tra la pordego treniĝas ĉifonvestita kolono, senfine malrapide, piedon post piedo, venas el aliaj koncentrejoj en tiun-ĉi, transvivis ankoraŭ tiun marŝadon kaj nun ekloĝas en la tendoj, ĉirkaŭitaj per dratkradoj, por trankvile perei, nokte sub la alte lumantaj steloj, tage sub rapide flugantaj nuboj, foje brilas la suno.

Malantaŭ la fenestroj de la kuireja konstruaĵo, kie estas varme, Straat kun Battenbach perse ekzercas elpensitan situacion. „Mi estas sinjoro el eksterlando. Mi estas komercisto. Ĉu mi rajtas danci kun la damo? Ta muli asa okadir. Ta muli lem basarmelko. Neli ta ramadamda donga?"

Venos maja tago, kiam la pordegoj estos malfermitaj. En la stratoj floras la kaŝtanoj. Kiu vivas, tiu iras kien li volas. Straat revenos al Nederlando, li finos sian fizikon, fariĝos instruisto. Li dum la tuta vivo rapide laciĝos. Neniam plu li efektivigos ion tiel grandan kiel li faris: li inventis lingvon, kiun li iom post iom forgesas.

Battenbach atingos Persion, la imperiestran regnon Irano, mirigite pri la stranga persa lingvo, kiun oni tie parolas.

(El: W. Kohlhaase: Silvester mit Balzac. Aufbau Verlag Berlin, 1981, 4. Auflage, p. 60–74. Trad.: L. Knöschke, GDREA. Reviziis: K.-D. Dungert, M. Lennartz, GDREA)

Recenzo

Nemero, Istvan: La Monto. Originala Romano. Eld. Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1984. 166 pĝ. Prezo: 75 Ft.

Soleca, preskaŭ ekstermonda vilaĝo sur montopinto. Homoj kun vivstilo simila al tiu de prahomoj. Kvar malaperintaj soldatoj. Kaj majoro Reman, kiu serĉas tiujn kvar soldatojn en la menciita vilaĝeto.

Tiu estas la situacio, en kiun kondukas nin Istvan Nemere. Tiu lia ĝis nun lasta romano estas fikcio pri la kunpuŝiĝo de simpla, naturproksima vivo kaj la „civilizacio", sed ankaŭ iomete pri la elformiĝo de realigita justa, komunaĵ-fundamenta socio el la ruinoj de burĝa progresismo. Kiel Reman malkovras la sorton de la soldatoj, lian vivon kun la vilaĝanoj, kian amon – tion Vi mem legu. Tio estas „tipa" Nemere-romano, en kiu estas ligitaj humanismaj politikaj sinteno kaj diskutado kun kreskanta streĉo, kiu fikse tenas la leganton ĝis la iom-post-ioma solvo en tamen surpriza kulmino. „La Monto" certe provokas meditadon kaj opini-interŝanĝon, des pli, ĉar la aŭtoro denove brilas per stilo kaj lerta regado de la lingvo.

Michael Lennartz




Walter Bartel, iama prezidanto de la Internacia Barakara Komitato de Buchenwald

Nelegala barakara komitato donis signalon por ribelo

Nia afero estas justa – ni estos la venkantoj! Tiun diron, plenan de konvinka forto kaj de historia optimismo, – tiun diron kunportis la sovetiaj militkaptitoj en la faŝisman koncentrejon Buchenwald. Tiu devizo same validis por kontraŭfaŝistoj alportitaj perforte al Buchenwald el 32 landoj. „Nia afero estas justa – la venko devas esti la nia!" Tiel poste tekstis en la ĵuro, per kiu la liberigitaj arestitoj promesis plue batali kontraŭ la faŝismo. Ekde la unua tago, la germanaj komunistoj kaj aliaj kontraŭfaŝistoj gvidis la justan batalon kontraŭ la bruna terora reĝimo. Ili ja estis kvazaŭ la unuaj militkaptitoj de la nazia regno, ĵetitaj en pundomojn kaj koncentrejojn.
Kiam pli poste la botoj de la faŝismaj trupoj disfrapis la teron de eŭropaj landoj, tiam la nombro de la eksterlandaj arestitoj en Buchenwald kreskis. Baldaŭ la germanoj formis eĉ nur minoritaton en la koncentrejo. Nun estis grava tasko pruvi al la eksterlandanoj per solidareca helpo, ke la germanaj kunarestitoj vere estis kunbatalantaj kamaradoj, escepte de malgranda nombro da krimuloj.
La 18a de oktobro 1941 estiĝis kulmino de la internacia solidareco pro la enarestigo de 2 000 ruĝarmeanoj falintaj en militkaptecon. Antaŭvespere la SS-estraranoj estis minacintaj, ke ĉiu kontaktanto kun ili estos grave punata. La sovetiaj soldatoj devis vivi en ses lignaj barakoj apartigitaj de la cetera koncentrejo. Rigardante ilin, la arestitoj forte eksentis la volon al la solidareco, al la humanisma konfeso, al la defendo de la homaj rajtoj. Ili venis el la loĝblokoj, donis al la militkaptitoj pecon da pano, cigaredon rezervitan por la dimanĉo, pomon, koltukon, ŝtrumpojn – do, ĉion doneblan de arestito. Tiun solidarecan kampanjon partoprenis ĉiuj nacioj ĉeestintaj en la koncentrejo.
Tio metis la bazon por la fondo de la Nelegala Barakara Komitato. En julio 1943 okazis renkonto de reprezentantoj el naŭ komunistaj partioj, bone ŝirmita kontraŭ la SS-anoj. La celoj estis la plukonduko kaj pligrandigo de la solidareco, la plivastigo de la informsistemo per sekreta aŭskultado de la sendostacioj en Moskvo, Londono kaj Beromünster, la memproduktado de radioaparatoj, la konstruo de Nelegala Internacia Militara Organizo kaj ties armado.
Tiu plano ne restis peco da papero. Ĉiu nacia grupo de komunistoj organizis rondon de simpatiantoj, kiuj agadis solidare kaj partoprenis la plivastiĝantan sabotadon en la armadaj laborejoj. El la tie produktitaj infanteriaj pafiloj, la arestitoj forprenis 96 pafilojn sub vivdanĝeraj kondiĉoj kaj portis ilin en la koncentrejon. Tie ili kaŝis la pafilojn kune kun aliaj armiloj – brulboteloj, mangrenadoj, pistoloj, ponardoj – en certaj lokoj ĝis la tago de la liberigo.
En aprilo 1945, kiam la Ruĝa Armeo preparis sin por la liberigo de Berlin, la amerikaj trupoj antaŭenmarŝis en Turingio. La 3an de aprilo, la 3a Usona Armeo kun tankoj staris antaŭ Gotha, la 4an de aprilo ĝi konkeris tiun urbon situantan en distanco de nur 40 km ĝis Buchenwald, sed nur post ses tagoj ĝi pluiris. La SS-anoj uzis tiun intertempon por komencigi la mortmarŝon por pli ol 25 000 arestitoj. Ilia intenco evakui ĉiujn ne sukcesis pro nia prokrastiga taktiko.
La 10an de aprilo la SS-gvidantaro fuĝis el la koncentrejo. Sed la gardoturoj plue restis okupataj, kaj la postenĉeno el SS-anoj ĉirkaŭ la koncentrejo ankaŭ restis.
Hodiaŭ antaŭ 40 jaroj, la 11an de aprilo 1945, mallonge post la 14a horo, la gvidanto de la Internacia Militara Organizo donis la signalon por la ribelo, post interkonsento kun la Prezidanto de la Internacia Barakara Komitato. La armiloj jam estis disdonitaj, ĉiuj batalantoj troviĝis en la eliraj pozicioj. Ankoraŭ hodiaŭ mi vidas internokule ilian sturmon al la ĉefpordego kun la fia enskribo „Al ĉiu la sia", ilian multfojan disŝiron de la dornodratoj. La „herooj" de SS panike fuĝis, kaj 220 el ili fariĝis niaj kaptitoj en la koncentrejo.
Ni estis liberigintaj nin mem. Cetere ankaŭ la ĵus publicita milita taglibro de la 4a Usona Tankodivizio raportis tion.
Jam dum la batalo, la Barakara Komitato fariĝis legala. Kiel unusola organo ĝi transprenis la potencon en la liberiĝinta Buchenwald. La ĝisdata prezidanto estis konfirmita en sia funkcio, kaj la unua t.n. Barakara Responsulo estis nomumita kiel komandanto. La 13an de aprilo fine aperis malgranda taĉmento de la Usona Armeo kaj estis salutata de la Barakara Komitato.
La 19an de aprilo, la liberiĝintaj arestitoj honoris iliajn pli ol 65 000 murditajn kaj mortintajn kamaradojn per funebra manifestacio. Komune ni ĵuris: „La neniigo de la faŝismo kun ties radikoj estas nia devizo. La konstruo de nova mondo de la paco kaj libereco estas nia celo."

(Trad. Michael Behr el „Neues Deutschland", Berlin, 11. 4. 85)



La liberigitaj arestitoj de Buchenwald sur apelejo la 11-an de majo 1945.

Foto: Zentralbild

La ĵuro de Buchenwald

„Ni ĵuras sur tiu ĉi apelejo antaŭ la tuta mondo, sur tiu ejo de faŝisma teroro:
Ni nur finos la batalon, se antaŭ la juĝisto de la popoloj staros ankaŭ la lasta kulpulo. La detruo de la naziismo kun siaj radikoj estas nia slogano. La konstruo de nova mondo de paco kaj amikeco estas nia celo. Tion ni ŝuldas al niaj murditaj kamaradoj, al iliaj kunuloj. Kiel signo de via preteco por ĉi-tiu batalo levu la manon al ĵuro kaj parolu kiel mi: Ni ĵuras!"

Ruĝarmeanoj malfermis la pordegon

Hans Biereigel,
direktoro de la Nacia Memorejo kaj Admonejo Sachsenhausen

„Dimanĉon, la 22-an de aprilo 1945, matene. Unuafoje en la koncentrejo: neniu vekado, neniuj SS-anoj[1]. Ĉe la pordego gardostaras arestito", rememoris la antifaŝistoj, restintaj en la koncentrejo Sachsenhausen, eskapintaj el mortiga marŝo. „Je la 11-a horo subite kriado en la koncentrejo, la rusoj alvenis. Ĉiuj rapidegas eksteren, al la apela placo. Tie, ĉe la pordego, ruĝarmeanoj! Kun bonanimaj vizaĝoj kaj bonaj okuloj, en uniformoj trivitaj dum la bataloj, polvokovritaj, sovetian stelon sur la ĉapo, la mitraleton ĉirkaŭpendigita. Ni brakumis, kisis, karesis ilin; ni levis ilin sur la ŝultrojn; ili ricevis florojn. Ni eksciis, ke alvenis nur patrolo da 12 personoj. En la koncentrejo regas granda ĝojo . . . Estas apenaŭ kredeble. Ni estas liberaj, ni ne plu estas arestitoj." Kiom longe, kun kiom da espero, optimismo kaj batalvolo oni estis sopirinta tiun ĉi tagon!

Nelegala rezistado malgraŭ teroro kaj murdo

Sachsenhausen, la plej granda koncentrejo en la nordo de Germanio, ĉirkaŭ 35 kilomentrojn de Berlino, komencis sian kruelan laboron en la jaro 1936. Ĝis 1945 pli ol 200 000 arestitoj estis torturataj ĉi tie. La koncentrejo proksime de Oranienburg estis unu el la plej malbonfamaj ejoj en Hitler-Germanio, ĝi estis loko de multnombraj ekzekutoj kaj timigaj „laborkomandoj". En septembro 1941 en Sachsenhausen komenciĝis la amasaj pafmortigoj de sovetiaj militkaptitoj. 18 000 civitanoj el USSR malvarmsange estis murdataj dum nur tri monatoj, inter septembro kaj novembro 1941. Tiam faŝistaj statistikoj cinike rimarkis, ke dum aŭtuno 1941 en la koncentrejo Sachsenhausen ĉiujn 90 sekundojn unu sovetia militkaptito estis murdata.

Ĉirkaŭ 100 000 homoj, tio estas duono de la ĉi tie arestitoj, estis murditaj. Ili mortis pro senfortiĝo, pro subnutriĝo kaj malsanoj aŭ ili estis bestece masakritaj de la SS-anoj en la koncentrejo aŭ dum transportado. Sed eĉ en tiu brutala faŝista infero nelegale forta internacia rezistmovado evoluis kaj ekde 1942 Internacia Koncentreja Komitato aktive laboris. Demonstraciaj solenaĵoj, kiel okaze de la datreveno de la murdo de Karl Liebknecht kaj Rosa Luxemburg, de la 1-a de majo kaj de la 7-a de novembro, pruvis, ke la ideoj de internaciismo ne estis sufokeblaj eĉ sub la plej malbonaj kondiĉoj. Ekzemple post la batalo apud Stalingrad la junaj, 15- ĝis 18-jaraj arestitoj – precipe civitanoj de Sovetunio kaj Francio – organizis celebradon de venko honore al la Ruĝa Armeo.

Militproduktado de la nazioj sabotita

Krom diskutoj pri politikaj ĉiutagaj kaj principaj problemoj en la paso de la jaroj ankaŭ demandoj pri la aktiva rezistado kaj la ellaborado de plano pri armita ribelo pli kaj pli staris en la centro de la nelegala aktiveco de la arestitoj. En eksteraj taĉmentoj multnombraj kolonoj da arestitoj devis helpi ĉe la militproduktado, ekzemple en la ŝtaluzino Hennigsdorf kaj la metalfandejo Kayser en Oranienburg. Tie por la spertaj antifaŝistoj validis la instrukcioj de la Internacia Koncentreja Komitato, saboti la militmaŝinaron de la nazioj aplikante ĉiujn eblajn rimedojn.

La arestitoj sukcesis organizi stabilajn interrilatojn al laboristoj, kiuj pretis riskante siajn vivojn kontrabandi materialojn el la koncentrejo al Berlin kaj inverse. Tiamaniere la koncentrejon atingis interalie flugfolioj kaj libretoj de la Nacia Komitato „Libera Germanio" kaj ankaŭ agoprogramo de la Saefkow-Jakob-Bästlein-Organizo, kiu estis atente studata de arestitaj funkciuloj de la Komunista Partio de Germanio kaj, provizita per rimarkoj, estis rekontrabandita.

La 20-an/21-an de aprilo 1945, du tagoj antaŭ ol antaŭtaĉmento de la 47-a Sovetia Armeo alvenis, la SS-anoj kunpelis pli ol 33 000 arestitojn en marŝkolonojn. Brutale la arestitoj estis kurigitaj tra la stratojn de Mecklenburg, en la direkto al Balta Maro, kie oni planis ilin transporti per ŝipoj kaj sinkigi en la profundan maron. Miloj ne transvivis tiujn „evakuadmarŝojn". Kiu falis teren, tiu rigore estis pafmortigita de SS-anoj. Sed el tiu mortiga marŝo finfine fariĝis vojo al libereco. Sovetiaj kaj angloamerikaj armepartoj liberigis la arestitojn en la regiono Mecklenburg dum la tagoj inter la unua kaj tria de majo.

La lasta kolono da arestitoj estis forlasinta la koncentrejon la 21-an de aprilo 1945 ĉirkaŭ je la 23.30 horo. En la „hospitala stacio" ankoraŭ troviĝis preskaŭ 3 000 tute elĉerpitaj kaj senfortaj viroj, virinoj kaj infanoj. Ili ne sciis, kion la sekva tago alportos. Kuraĝe kontraŭstarante al la ordonoj de la SS-anoj, laŭ decido de la nelegala Internacia Koncentreja Komitato komunistoj kaj sinceraj antifaŝistoj estis restantaj por zorgi pri la malsanaj kaj malfortaj homoj. Kiom granda estis la ĝojo, kiam la unuaj sovetiaj soldatoj alvenis la 22-an de aprilo! Plia patrolo aperis dum la vesperaj horoj de tiu signifa 22-a de aprilo. Tio estis polaj soldatoj de la 2-a Infanteria Divizio „Henryk Dąbrowski". La regulaj partoj de la Ruĝa Armeo atingis la estintan koncentrejon dum la fruaj matenaj horoj de la sekva tago. Sovetiaj kaj polaj kuracistoj kaj flegistinoj tuj komencis sian laboron por doni la necesan helpon al la postvivintoj.

Arestitoj apartenis al la organizantoj de la novkomenco

Dum kiam oni ankoraŭ batalis en Sachsenhausen, Friedenthal kaj aliaj lokoj, en Oranienburg kun subteno de la sovetia komandanto naskiĝis la novkomenco. Estis estintaj politikaj arestitoj de Sachsenhausen, kiuj kiel unuaj helpis normaligi la vivon en la detruita urbo. „Ni komunistoj el la koncentrejo petis la sovetian komandanton permesi al ni disdoni al la civila loĝantaro de Oranienburg manĝaĵojn (el la deponejoj de SS). La komandanto tuj permesis tion kaj la 25-an de aprilo vespere ni veturis al Oranienburg kaj disdonis 1 000 litrojn da bongusta pizosupo kun lardo al virinoj, infanoj kaj viroj tie restintaj", tekstas la raporto de la postvivintoj de la koncentrejo skribita en 1945. Kia granda humanismo! Viroj, kiuj tra jaroj devis suferi malhumanajn turmentojn kaj torturojn, donis la manojn al germanoj, el kiuj multaj estis silentintaj pri la nazia diktaturo kaj ties terurajoj.

„Dum tiu okazo ni ne preterlasis", ni plu-

legas, „paroli kun ili kaj klarigi al ili la eventojn en la koncentrejo sub la regado de SS." La komunistoj en Oranienburg fiksis afiŝojn rigardi la koncentrejon dimanĉon, la 29-an de aprilo 1945. Ili intencis informi la homojn pri tio, kio estis okazinta ĉi tie. Multaj loĝantoj de Oranienburg ne volis kredi la kortimigajon. Sed ili komencis aliopinii kaj kompreni la gravecon de la liberigo el sub hitlera faŝismo. Ankaŭ en ilia hejmurbo la liberigo estis gajnita nur post severa, suferiga batalo. 146 soldatoj kaj oficiroj el la 7-a Gvardia-Kavaleria Korpuso de la Ruĝa Armeo kaj 57 batalantoj el la 2-a Infanteria Divizio de la 1-a Pola Armeo batalmortis en la regiono Oranienburg.

La Nacia Memorejo kaj Admonejo Sachsenhausen estis transdonita al la publiko la 23-an de aprilo 1961 sur la loko de la iama koncentrejo pro memoro al la viktimoj de faŝismo, al la herooj de la antifaŝista rezistado kaj la liberigintoj por averti ĉiujn estontajn generaciojn. De tiam preskaŭ ok milionoj vizitantoj el pli ol 140 ŝtatoj ĉi tie montris sian funebron kaj ankaŭ sian konsekvencan volon batali kontraŭ milito, faŝismo, por paco kaj sociala progreso.

[1] SS – Schutzstaffel – nazia terororganizaĵo

El „Neues Deutschland" de la 13-a/14-a de aprilo 1985
trad.: Sabine Fiedler

Ivan Draĉ
Neverkita poemo


Charlotte von Stein
elveturas tra unu pordego el Weimar,
Johann Wolfgang Goethe
elveturas tra alia – por konspiro.
Tie, kie ili sin brakumas en arbaro,
alliginte la ĉevalojn al la fagoj
centjaraj,
post jarcento brusonos
koncentrejo Buchenvald . . .

El la ukraina lingvo:
Nadia Andrianova

Broŝuroj en Esperanto pri Buchenwald kaj Sachsenhausen
Ĉe Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (DDR - 1080 Berlin, Charlottenstraße 60) haveblas senpage du ilustritaj broŝuroj pri la iamaj koncentrejoj Buchenwald kaj Sachsenhausen, nuntempe memorejoj kaj admonejoj.

150 jaroj de Krisjanis Barons

Bele kantas najtingalo
Sur la pint' de Riga turo.


Kriŝjanis Barons.
Pentraĵo de Baiba Damberga

Jam delonge latva popolo estas konata kiel popolo de kantistoj. Dum helaj kaj malhelaj tagoj latvoj iris tra la vivo kun kantoj. Nuntempe estas elkreskinta grandnombra familio de poetoj, kies verkoj fundamentas sur la popolkantoj de latvoj kaj livoj. Ilin uzas por sia agado ankaŭ ensembloj de l'folkloro, vaste multiĝintaj en la lastaj jaroj.

En la UNESKO-kalendaro por la 1985-a jaro inter aliaj elstaraj personoj estas menciita ankaŭ Kriŝjanis Barons, kiu en sia hejmlando Latvio pro aparta amo ricevis omaĝe la nomon „Dainu tevs" [Patro de l'popolkantoj]. Li estis la unua, kiu kun profunda seriozeco kaj celkonscie kolektis, sistemigis kaj eldonis en ok libroj la latvajn popolkantojn „Latvju Dainas" [I vol. Jelgava, 1894, II–VI vol. Peterburgo, 1903–1915]. En ĉi tiu eldono estas 35 789 popolkantoj aŭ 217 996 variantoj. „Latvju Dainas" de K. Barons fariĝis bazo al multaj fundamentaj eldonoj de latvaj popolkantoj, el kiuj aparte estas menciitaj tri eldonaĵoj: 1) Prof. P. Ŝmits „Tautas dziesmas" [Riga, 1936–1939], en kiu la nombro de popolkantoj estas alkreskinta ĝis 60 080. 2) En Kopenhago 1952–1956 eldonita „Latviesu tautas dziesmas" en 12 vol. 3) En Rigo 1979-an komencita scienca eldonaĵo „Latviesu tautas dziesmas", de kiu unuaj 5 vol. estas al la temaro de laboro dediĉitaj . . .


La latvaj popolkantoj estas tradukitaj ne nur en germana, rusa, litova, estona, liva, angla k.a. lingvoj. Jam komence de XX jarcento la latva esperantisto, poeto kaj tradukisto Rudolfs Libeks (1833–1908) ilin tradukis esperante. Kun la tradukaĵo de R. Libeks konatiĝis doktoro Vong Ken el la malproksima Makao. La latvaj popolkantoj lin tre ĝojigis, kaj li ilin konigis al la ĉinaj legantoj. Ke la tradukaĵoj de R. Libeks kaj la latvaj popolkantoj estas bonegaj, atestas la fakto, ke mem Dr. Ludoviko Zamenhof akceptis por sia „Fundamenta krestomatio" (1-a eldono 1903) la tradukaĵon de R. Libeks.

Latvajn popolkantojn tradukis ankaŭ la eminenta Esperanto-poeto kaj tradukisto Nikolai Kurzens kaj ankaŭ la eksa multjara gvidanto de Latvia Esperantio Eduards Jaunvalks. De li tradukitaj popolkantoj estas enpresitaj en la lernolibro de Ints Ĉaĉe „Esperanto gramatiko kaj krestomatio" (Riga, 1926). Sed E. Jaunvalks mem kompilis, tradukis kaj eldonis „Latvaj kantoj en esperanto" (Liepaja, 1927). Mirdza Burgmeister en la eldonaĵo de latvaj esperantistoj „Latva Poezio 1945–1966" (Riga, 1968) rememoras la latvajn popolkantojn kaj la plej eminentan kompilanton de popolkantoj Kriŝjanis Barons.

Lige kun la 150-a jartago de K. Barons, en la eldonaĵoj de Latvio estis jam publikigitaj multaj artikoloj. Ankaŭ en la dana revuo „Lyrik" (Per Nielsen), en la Esperanto-revuo „Amikeco" (Jaan Ojalo), k.a. revuoj estis publikigitaj artikoloj, kaj popolkantoj, tradukitaj de R. Libeks kaj H. Skuja.

Nuntempe en la folklora trezorejo de Lingva kaj Literatura Instituto de Scienca Akademio de Latva SSR troviĝas 1,2 milionoj da popolkantaj tekstoj. Kolektadon de tiuj tekstoj partoprenis la tuta popolo, pro tio la popolkantoj estas iĝintaj sanktaĵo de la tuta popolo.

El ampleksa materialo de la latva poeto Harijs Skuja.
Kriŝjanis Barons naskiĝis la 31an de oktobro 1835 kaj mortis la 8an de marto 1923.



Ludwig Schödl

Renkontiĝoj kun amikoj

Ĝis la jaro 1930 mi profunde simpatiis kun la juna sovetia ŝtato, same kiel milionoj da laboristoj en la tuta mondo. El tiu simpatio fariĝis intimaj rilatoj, post kiam mi estis lerninta Esperanton.

En la Berlina grupo de la Germana Laborista Esperanto Asocio tiam fondiĝis ĥoro, kaj ni deziris plivastigi nian repertuaron per ankoraŭ nekonataj sovetiaj kantoj. Mi estis komisiita, ekrilati pro tio kun esperantistoj el Moskvo. Estis mirinde, kiel rapide niaj amikoj, la kamaradoj Drezen kaj Nekrasov, reagis, kaj al ni sendis tutan pakaĵon da novaj sovetiaj kantoj, bonege, kantprete tradukitaj. Tiuj novaj kantoj multe kontribuis al niaj sukcesoj, kiam ni kantis okaze de aranĝoj de diversaj laboristaj organizaĵoj.

Por ke Esperanto ne nur utilu al la esperantistoj, kaj por povi uzi ĝin por profundigi la amikecon inter niaj popoloj, ni decidis, ne nur peri ligojn inter diversaj organizaĵoj, sed ankaŭ agi kiel tradukantoj. Ni aperigis anonceton en INTERNACIISTO, kun propono, peri tiajn ligojn. Tiu anonceto aperis kun mia adreso. Post la unuaj semajnoj mi jam pensis, ke tiu anonceto pasis seneĥe. Sed kelkajn semajnojn pli poste venis la unuaj deziroj el aliaj landoj. Baldaŭ ili fariĝis lavango. Dum semajnoj, monatoj ĉiutage venis leteroj, inter ili la plej multaj el Sovetio. Estis i.a. kolektivo de lokomotiva riparista kolegaro, ŝakklubo, la anoj de fajrobrigado en Leningrad, infangrupoj ktp. ktp. Mi estis senlabora, kiel preskaŭ ĉiuj niaj kamaradoj, sed tamen, ni apenaŭ povis kontentigi ĉiujn. El tiu tempo mi bone memoras mian amikon Viktor Viktoroviĉ. Tio estis malofte vigla interŝanĝo de leteroj. V. V. parolis en radio, aktoris kun teatra skipo sur teatra ŝipo, kiu krozis sur Dnepro. Li ne nur sendis fotojn, sed tutajn filmojn, kiuj montris lin multope. Li ĉiam postulis konkretajn helpojn por sia multflanka agado.

La sovetiaj amikoj efike helpis nin per siaj leteroj, diskuti kun niaj samlandanoj. Letero, rekte el Sovetio, p e r s o n a letero, tio pli efikis kontraŭ la ‚argumentoj' de la dubemuloj aŭ kontraŭuloj ol la plej bonaj artikoloj en niaj gazetoj, ĉar tiuj lastaj estis kvalifikitaj kiel ‚propagando'. Krome niaj sovetiaj kamaradoj sendis al ni multe da literaturo en germana lingvo kaj en Esperanto. Kiel ofte kun konatoj ni foliumis en la belega periodaĵo „UdSSR im Bau" (USSR konstruata), kaj mi ‚infektis' ilin per mia entuziasmo, ekzemple kiel la sovetiaj laboristoj venkis la katarakton de l'Dnepro.

En aŭgusto okazis konferenco de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) en Lille, en Francio. Temis pri la daŭrigo de nia agado sub la kondiĉoj de l'faŝismo en Germanio. Diversaj opinioj akre interpuŝiĝis. Profunde impresis nin ĉiujn la konata sovetia verkisto kamarado Iljin (Ilja Jakovleviĉ Marsŝak, 1895 ĝis 1953), kiu reprezentis la sovetiajn esperantistojn.

Baldaŭ poste mi vigle korespondis kun la jurnalisto kamarado Timofenko el Nikopol. Mi tiam loĝis proksime de Paris. En tiu tempo, plena de politika streĉeco, de klasbataloj, en kiuj nepre necesis bari la vojon al la rapide fortiĝanta faŝismo en Francio – la unuan senteblan baton ĝi devis suferi en februaro 1934 – kun neniam antaŭe konata ondego da strikoj, ofte por politikaj celoj, kun tiu en Francio nova formo de strikoj, dum kiuj la strikantoj okupis la uzinojn, kiuj fine en la jaro 1936 rezultigis venke la registaron de Popola Fronto, ĉiam abundis temoj por nia korespondado. Multaj el tiuj leteroj trovis sian eĥon en sovetiaj gazetoj.

En majo 1945 mi spertis la helpon de sovetiaj soldatoj. En Berlin-Reinickendorf troviĝis la uzinego de Borsig, kiun antaŭ la milito forlasis ĉiutage unu novkonstruita lokomotivo. Proksime, ĉe la urboparto Tegel, ĉe lago en arbaro Borsig posedis belegan vilaon kun ĉambroj kaj du salonoj en la teretaĝo, kun granda kuirejo en la kelo kaj multaj gastĉambroj en la unua etaĝo, ĉiuj lukse ekipitaj per ĉiu sanitaraĵo. Kvazaŭ mirakle tiu tereno ne estis damaĝita pro la milito en tiu mondo de ruinoj. La sovetiaj okupantoj de Berlin eĉ ne preninte bankuvon aŭ pentraĵon de la muroj, disponigis tiun ‚kastelon Reiherwerder' kiel hejmon por gejunuloj, kies (ge)patroj estis viktimoj de l'faŝismo. Tie mi rajtis prizorgi ĉ. 30 gejunulojn. Sed la feliĉo ne longe daŭris. Efektiviĝis la jam antaŭe interkonsentita divido de Berlin en usonan, anglan, francan kaj sovetian administrajn sektorojn; Reiherwerder troviĝis en la franca. Neanoncite aperis aŭtomobile grupo da francaj oficiroj, inter ili generalo König. Mi ja jam estis spertinta multe da homoj en plej diversaj situacioj; neniam antaŭe mi vidis tiom da aroganteco. Ili devis scii kiuj kaj kio ni estis, sed iliaj rigardoj simple penetris tra ni sen rimarki nin. Ili precize inspektis ĉion kaj ree forveturis. Ankoraŭ je la sama posttagmezo urba administranto postulis laŭ la ordono de la generalo, ke ni tuj evakuu la terenon. Por ni ne troviĝis alia solvo, ĉio estis finita en daŭro de minutoj.

En tiu tempo mi foje bezonis viziti sovetian oficiron en Weißensee, t.e. alia urboparto de Berlin. Mi fine trovis lin en tre malvasta subtegmenta ĉambraĉo de tipa berlina domego, duone ruino. Mi devis pensi je generalo König en la luksa vilao. La rigardo de la sovetia oficiro ankaŭ ne trapenetris min sen vidi min.

En aŭtuno de 1945 devus rekomenciĝi la instruado en la lernejoj. Tio ja ŝajnis

---

Recenzo

Julian Modest: La Ora Pozidono.

Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1984, 68 pĝ. 40 Ft.

La somerajn travivaĵojn de la juna gimnaziano Emil rakontas Julian Modest en sia verketo „La Ora Pozidono". Dum restado ĉe la bulgara marbordo li konatiĝas kun Leo, VOLVO-veturiganta vicdirektoro de Universitaa Kliniko, ties edzino Klara kaj la leteramikino de Leo, la bela francino Adele (do rondo de tre ordinaraj homoj kiel Vi kaj mi). Ĉiuj kvar estas esperantistoj kaj bonege regas la lingvon (kiel ĉiuj esperantistoj). Dum la komunaj vizitoj al la marbordo kaj al apuda urbo Emil enamiĝas al Adele. Tiel la unua tempo pasas en sankta esperantista harmonio. Modest malŝparas trivialajn romanakcesoraĵojn kiel silkajn harojn, migdalajn okulojn, alabastrajn brakojn kaj persikajn mamojn (aliajn valoraĵojn homoj, speciale virinoj, ja kutime ne havas). Post kvardek ses paĝoj Emil finfine konstatas, ke Adele estas ne nur perletera amikino de Leo: Ili havas pli intimajn rilatojn. La restaj paĝoj priskribas ĉefe la amdolorojn de Emil. Li fine ekscias, ke Klara delonge scias pri la rilatoj inter Adele kaj sia edzo. Ŝi malaperas sinmortige inter la ondoj de la maro (tion la leganto jam rimarkas sur la unua paĝo).

La flua lingvaĵo kaj la perfekta stilo ne povas kaŝi la senenhavecon, sensignifecon de la verketo. Naiva, etburĝa rakonto kun larĝa priskribo de la turismaj vidindaĵoj de Bulgario.

Michael Lennartz

neebla, ĉar, ĉu la instruistoj, kiuj el siaj gelernantoj formis naziidojn nun daŭrigu la ‚edukadon'? La manko de nenaziaj geinstruistoj estis desperiga, precipe en la kamparo. La problemo estis solvita tiel, ke nefaŝistaj junuloj preskaŭ aŭ tute ne preparite komencis kaj instrui kaj studi. Tiel ankaŭ mi fariĝis instruisto en fora vilaĝo en la subdistrikto Ruppin. Tiam tute ne estis facile, atingi tiun vilaĝon de Berlin. La trajno en tiun direkton ne veturis ĉiutage kaj se, tiam oni devis bonŝance trovi lokon en aŭ sur vagono. Kiam ankaŭ tio ŝajnis al mi vana deziro, mi turnis min al sovetiaj soldatoj, kiuj gardis por si du rezervitajn kupeojn. Mi pene povis klarigi al ili la kaŭzon de mia vojaĝdeziro kaj tuj ili lasis min premi inter si en jam multe tro plena kupeo. En la vilaĝo de mia celo ne nur necesis instrui kaj eduki infanojn, sed same forigi el la kapoj de ties gepatroj la faŝisman rubaĵon. Spite al ‚bonaj' konsiloj, ne krei malamikajn gepatrojn de miaj gelernantoj, mi komencis prelegi vespere en la vilaĝa gastejo kaj organizi diskutojn. Mi komencis kun la plej ‚varmega' temo „la rusoj kaj ni". La saloneto estis plenplena. Mi ne estis – kiel oni profetis al mi – mortbatita, sed mi sukcesis, ke miaj aŭskultintoj ekmeditis.

Memorante la unuajn jarojn post nia liberigo mi ne povas forgesi tiun sovetian oficiron, kamaradon Stern, kiu ofte akompanis nian lernejan inspektoron. Ĉiam li konsilis kaj helpis laŭpove en tiu tempo sen lernolibroj, sen kajeroj, kiam kreto por la tabuloj fariĝis problemo eĉ ne menciante helpan literaturon por la instruisto.

Komence de la 50-aj jaroj mi ree ricevis la unuajn leterojn post la milito el Sovetio. Ree en Esperanto. Unu ĝis du jaroj nur estis du korespondantoj, unu el Moskvo la alia el Leningrad. Sed poste rapide sekvis leteramikoj el Arĥangelsk, Taŝkent, Jaroslavl, Kiev, Simferopol, Krasnodar kaj aliaj urboj. Ili daŭras ĝis hodiaŭ kaj certe daŭros. Tio estas leteroj plenaj de koreco kaj simpatio, kvankam inter tiuj miaj geamikoj apenaŭ troviĝas unu, kiu ne perdis karan familianon pro germanaj soldatoj. Kutime niaj korespondadoj servis al reciproka helpo en nia lukto por la paco, por firmigi la amikecon inter niaj popoloj. Miaj sovetiaj geamikoj je diversaj okazoj sendis al mi objektojn, kiuj servis al mi por aranĝi ekspoziciojn aŭ por prelegi kaj reciproke. Per niaj komunaj agoj okazis konkuraj sportfestoj inter lernejoj, interŝanĝoj de albumoj, sennombraj peradoj de korespondadoj inter gelernantoj. Dum kelkaj jaroj ekzistis ĝemeliĝo inter nia Lernejo de l'Paco kaj la 2-a meza lernejo de Rostov/Don.

Ĉe kongresoj en Sofia, en Budapeŝto, en Ruse, ĉe ni en GDR, ĉe niaj vojaĝoj en Sovetio ni konatiĝis kun multe da niaj karaj korespondantoj.

M. Dubey

UN EN DANĜERO:
Atakoj de okcidentaj industriŝtatoj kontraŭ la multflanka sistemo

La sekva kontribuo baziĝas sur parolado, kiun faris la Konstanta Reprezentanto de Hindio ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, ambasadoro M. Dubey, dum seminario pri la Unuiĝintaj Nacioj kaj Pacfortoj, okazinta la 10-an de septembro 1984 sub la aŭspicio de la Internacia Interliga Forumo de Pacfortoj en Ĝenevo. En sia parolado la ambasadoro Dubey akcentis, ke la monda publiko devas fari ĉion, kion ĝi kapablas, por forigi la danĝeron, kiu minacas la multflankan sistemon de UN flanke de kelkaj okcidentaj industriaj landoj.

La multflanka sistemo de la Unuiĝintaj Nacioj estas en la nuna tempo elmetita al akraj atakoj. Ekzistas celkonsciaj klopodoj limigi ĝian funkcion, doni al ĝi novan orientadon kaj subordigi ĝin al la naciaj interesoj de tiuj ŝtatoj, de kiuj venas tiuj ĉi atakoj. Se ne estos farataj kontraŭagadoj por konservi tiun ĉi sistemon kaj se tiuj intrigoj post kelkaj jaroj donos fruktojn, signifas tio, ke ni perdos la multflankan UN-sistemon, kiel ni hodiaŭ ĝin konas kaj aprezas.

La atako kontraŭ tiu ĉi sistemo okazas en la plej diversaj formoj. Antaŭ ĉio oni provas sisteme renversi la „Konsenton pri evoluo", atingitan en la postmilita tempo, kiu formas la fundamenton de la agado de UN-komisioj kaj organizaĵoj. La ĉefaj partoj de tiu ĉi Konsento troviĝas en la Fina Akto de la I-a UN-konferenco pri Komerco kaj Evoluo (UNCTAD). Decidoj de sekvaj UNCTAD-konferencoj, respektive de la Konsilantaro por Komerco kaj Evoluo, de la Organizaĵo de UN por Industria Evoluo (UNIDO), de la Ĝenerala Asambleo de UN kaj de la Konsilantaro por Ekonomio kaj Socio de UN (ECOSOC) kompletigis ilin. En la sekvo oni alprenis tiun ĉi Konsenton pri evoluo ankaŭ en la deklaracion pri kreado de nova internacia ekonomia ordo. Ni memorigu ankoraŭfoje ĝian plej gravajn partojn:

a) Evoluo estas la komuna deziro de la tuta internacia komunumo.

b) La evoluo en la evolulandoj kontribuas al la prosperado kaj al la stabileco de la ekonomio en la tuta mondo, ankaŭ en la industriŝtatoj.

c) La evolulandoj mem havas la ĉefan respondecon por la evoluo, sed iliaj penoj devas ricevi internacian subtenon.

d) Unu el la ĉefaj celoj de la internacia kunlaboro konsidere al la evoluo estas la ekvilibrigo de la vivnivelo de evoluintaj landoj kaj evolulandoj, la forigo de maljustecoj, malsameco kaj la likvido de la malegaleco en la reciprokaj internaciaj ekonomiaj rilatoj.

e) Antaŭkondiĉo por la atingo de la supre cititaj celoj estas strukturŝanĝo de la nuntempa monda ekonomia sistemo kaj antaŭ ĉio pli forta inkludo de la evolulandoj en la decidojn de tiuj institucioj, sur kiuj baziĝas tiu ĉi sistemo.

f) La internaciaj agadoj estu multampleksaj, akordigitaj unu kun la alia kaj konformaj al la graveco de la problemo. La jus priskribita Konsento signifas veran konformecon de la opinioj kaj ne ion, kion la industriŝtatoj altrudis per decido de plimulto. Ĝi ankaŭ ne prezentas iu ajn ofendon kontraŭ la interesoj de iu ajn ŝtato, sed plialtnivelan organizadon de internaciaj rilatoj ĉefe en la ekonomia kampo. Ĝi celas al stabileco kaj progreso por ĉiuj – kion oni dum lasta tempo nomas reciproka dependeco. Tiu ĉi Konsento estas krom tio la unusola ebla fundamento por solvi la strukturajn problemojn de la monda ekonomio kaj la problemojn en la internaciaj ekonomiaj rilatoj kiel ĝi estas ankaŭ la unusola vojo al konkretigo de la nocio de la reciproka dependeco. Ĉar tiel longe, kiel ekzistas en la mondo malsameco, maljusteco kaj ekspluatado, ne povas regi paco.

Atakoj kontraŭ la voĉdona procedo

Kiel ni jam akcentis, tiun ĉi Konsenton aprobis kaj la industriŝtatoj de la Nordo kaj la evolulandoj en la Sudo, la okcidentaj landoj same kiel la ŝtatoj en orienta Eŭropo. La plej multaj rezolucioj kaj decidoj, kiuj enhavis elementojn de tiu ĉi Konsento, estis siatempe unuanime akceptitaj. La evolulandoj ekkonis deko-

mence, ke fundamentaj ŝanĝoj en la ekonomia politiko de la industriŝtatoj ne povis esti atingitaj per decido de plimulto. Tial oni koncedis al la industriŝtatoj pli grandan influon en la konsisto de la Konsilantaro por Komerco kaj Evoluo, de UNCTAD; kaj la proceso de decidiĝo en tiu ĉi komisio estis ligita kun arbitracia procedo. Laŭ tiu ĉi procedo ĉiu lando respektive ĉiu grupo de landoj povas postuli prokraston de la voĉdonado kaj komencon de arbitraciado, se ekzistas la opinio, ke iu decido planita de UNCTAD estas direktita kontraŭ iliaj naciaj fundamentaj interesoj. Nur post kiam ĉiuj rimedoj de arbitracio estas elĉerpitaj, oni povas reiri al la voĉdonado laŭ la principo de plimulto. La fakto, ke la industriaj ŝtatoj neniam mem uzis tiun arbitracian proceđon, montras, ke ili libervole konsentis kun ĉiuj rezolucioj kaj decidoj de la UN-komisioj, kiuj interkonsentis pri tiu ĉi Konsento pri evoluo.

Sed nuntempe tiu ĉi Konsento kaj kun ĝi la tuta multflanka sistemo de la Unuiĝintaj Nacioj troviĝas sub forta bombado. La industriŝtatoj jam eĉ ne volas aŭdi mencion pri la elementoj de la Konsento. Ili rifuzas la partoprenon en traktadoj kaj diskutoj, dum kiuj tiuj elementoj estas centra aŭ elira punkto. La priskribitaj normoj de la internacia kunlaboro estas nomataj de ili nerealaj, stimulantaj streĉiĝon kaj polemikaj. Koncize dirite, ili klopodas flankenŝovi la tutan norman fundamenton, sur kiu funkcias la multflanka kunlaboro en la kadro de UN.

Sed ekzistas ankoraŭ aliaj metodoj por subfosi la multflankan sistemon. La menciitaj industriaj ŝtatoj intence neglektas la normojn, regulojn, principojn kaj direktivojn intertraktitajn en la postmilitaj jaroj, per kies helpo la Konsento pri evoluo realiĝu en la praktiko. Oni arbitre malatentas la regulojn de la Ĝenerala Dogana kaj Komerca Konvencio (GATT), kio evidentas antaŭ ĉio en la daŭrigo kaj disvastigo de restriktaj aktivecoj de la tielnomata griza zono. Ekzistas la danĝero, ke la industriŝtatoj deturnas sin de la multflanka komerca sistemo, regulita per GATT, same kiel okazis en la komenco de la 70-aj jaroj kun la monda monsistemo. La plej freŝaj komercaj artifikoj kaj paŝoj de la registaroj de tiuj ĉi landoj subfosas tiajn principojn el la IV-a parto de GATT, kiel la nereciprokecon kaj la avantaĝan kaj diferencan traktadon de evolulandoj. Tiuj registaroj misatentas kaj malaprobas la diversajn dokumentojn kaj fundamentojn de la internacia respondeco, ellaboritaj en la postmilitaj jaroj, inter ili ekz. la decidoj pri alfluo de financaj fontoj en evolulandojn kaj pri la analizado de la efektivigita internacia evoluada strategio inkluzive de celoj kaj paŝoj interkonsentitaj en tiu konekso.

Dumtempe oni ankaŭ rekte atakas UN-organojn. Tuj kiam al tiuj industriŝtatoj iu ajn decido aŭ paŝo ne konvenas, ili minacas per rifuzo de kunlaboro – kvankam ili iam konsentis – aŭ eĉ per plena rezigno pri membreco en la koncernaj organoj. Oni uzas la minacitan aŭ faktan rifuzon de financaj rimedoj kiel trudrimedon, por eldevigi ŝanĝojn en la laŭprograma agado kaj orientado de UN-organoj. Krom tio oni provas akiri en tiuj organoj la rajton je vetoo kontraŭ decidoj pri buĝeto kaj administrado.

Kalumnio kontraŭ UN-reprezentantoj

Sed ne sufiĉe: ĉefoj kaj aliaj kompetentaj kunlaborantoj de UN-organoj kaj organizaĵoj fariĝas celoj de kalumnioj kaj de akra persona kritiko. Oni provas sisteme subfosadi la sendependecon, objektivecon kaj iniciativon de tiuj ĉi institucioj per anticipo de iliaj decidoj. Ekzemple la nomitaj industriŝtatoj dum diskutado pri eventuale kunvokota renkontiĝo de la Konsilantaro por Komerco kaj Evoluo, de UNCTAD, je ministra nivelo insistis pri tio, ke la dokumentaro por tiu ĉi renkontiĝo prezentu ekskluzive „faktojn". Tiamaniere oni rifuzas al la sekretariato de UNCTAD – kaj efektive ankaŭ al ĉiuj aliaj UN-organizaĵoj – unu el la plej gravaj funkcioj, nome tiun de analizado, pritaksado kaj prezentado de proponoj. Kaj ne laste oni entreprenas ĉion eblan, por transformi la kunvenojn de tiuj ĉi institucioj en seminariojn, dum kiuj oni povas nek akcepti decidojn nek komenci intertraktadojn. Kio koncernas la supre menciitan renkontiĝon de ministroj, la industriŝtatoj persistas en tio, delegi siajn ministrojn nur tiam, se oni antaŭe fiksos, ke dum la renkontiĝo oni nek intertraktados, nek akceptos iu ajn decidon, nek superos la ĝisnunajn poziciojn.

Komune tiuj landoj celas altrudi al la internaciaj UN-organoj kaj organizaĵoj sian ideologion. Ili arogas al si la opinion, ke la plej multaj paŝoj en la sfero de la multflanka kunlaboro kontraŭas la liberan agadon de la merkataj fortoj por kiu ili pledas. Oni kondamnas kiel „direktismon" la tradician funkcion de la multflanka UN-sistemo, kiu konsistas en tio, kunordigi naciajn paŝojn, ellabori internaciajn normojn kaj regulojn kaj krei kondutkodojn.

Por atingi, ke la internaciaj rilatoj formiĝu laŭ bontrovo de la pli fortaj nacioj, oni influas la internaciajn organizaĵojn fari nenion por reguligi tiujn rilatojn. La nomitaj industriŝtatoj agas ĉiam pli forte por anstataŭi la multflankan kunlaboradon per duflankaj transakcioj, kiuj ebligas al ili elmeti ilian pli malfortan partneron al ega premo. Ĝuste ĉar malsameco, maljusteco kaj submetado de parto da ŝtatoj estas karakterizaj por la internacia ekonomia ordo, la multflanka kunlaboro devus iamaniere gvidi la kondúton de la registaroj sur la bazo de internaciaj normoj, reguloj, kodoj kaj direktivoj. Se oni tion malebligas, la tuta internacia kunlaboro fariĝas sensenca.

Minacoj de eksiĝo

La nomitaj industriaj ŝtatoj opinias, ke la agado de la internaciaj organizaĵoj en la UN-sistemo kontraŭas iliajn naciajn interesojn. Per ĉiuj fortoj ili volas malebligi, ke la internaciaj organizaĵoj malkovru la kontraŭdirojn en la nuntempa monda ekonomia ordo kaj insistu pri ŝanĝoj. Energie ili ankaŭ kontraŭstaras al la diskutado de ĉiuj demandoj, kiuj povus aperigi malhonestaĵojn kaj mankojn de ilia propra politiko. Ili rifuzas la partoprenon en ĉiuj diskutadoj, dum kiuj oni atakas iliajn internpolitikajn paŝojn kaj postulos ŝanĝojn. Por eviti la okazon de tiaj diskutadoj ili minacas per eksiĝo el la respektiva UN-organizaĵo. Ne nur al UNESKO kaj UNCTAD, sed ankoraŭ al multaj aliaj UN-organizaĵoj oni minacas per tiaj konsekvencoj.

Tiaj agoj kontraŭ la UN-sistemo helpu restarigi la staton el la 50aj jaroj, kiam tiuj landoj – havintaj aŭtomate la plimulton – povis manipuli la UN-sistemon. Hodiaŭ ili volas devigi la UN-organizaĵojn defendi neniun alian vidpunkton ol tiun de la industriaj ŝtatoj. Tiamaniere ili volas transformi la UN-organizaĵojn en ilon de sia ekstera politiko.

Tiuj misuzoj okazis sub la masko de celataj reformoj en la gvidado kaj administrado de la UN-organizaĵoj. En vero ili direktas sin kontraŭ la agadmaniero de la Unuiĝintaj Nacioj kaj kontraŭ la multflanka kunlaboro entute. Se vere temus nur pri gvidaj kaj administraj reformoj, oni estus povintaj facile trakti pri tio en diversaj interŝtataj komisioj, kiuj por tiuj celoj ekzistas en la UN-organizaĵoj. Alian eblecon prezentas la komisioj – speciale por tio kreitaj – el reprezentantoj de la diversaj organizaĵoj. La evolulandoj konsciiĝas, ke en la funkciadmaniero de UN-organizaĵoj kelkio ne estas en ordo. Tial ili inklinas konsenti kun la deziro pri buĝetaj, gvidaj kaj administraciaj reformoj – nur ke la industriŝtatoj tiun ĉi deziron en vero ne havas.

Atakoj fare de okcidentaj komunikiloj

Stiritaj kaj instigitaj de tiuj landoj kaj iliaj registaroj, la komunikiloj ekflamigis fortan kalumnian kampanjon kontraŭ la multflanka UN-sistemo. La necesan spiritan materialon ili ricevas de speciale fonditaj pensprilaborejoj. Ĉio, kion tiuj

„produktas" kaj kion disvastigas la komunikiloj en tiuj landoj, baziĝas nur tre malofte sur faktoj, sed pli ofte sur simpligadoj, kiuj trompas.
Oni ekzemple asertas, ke la internaciaj organizaĵoj, respektive la multflanka kunlaboro ĝis nun ne atingis iujn ajn rezultojn. Per tio oni volas sugesti, ke la manko je progreso ne rezultas el la politika fiasko de la registaroj, sed el imanentaj malfortecoj de la UN-sistemo.
Ne estas pretervideble, ke la multflanka ekonomia kunlaboro dum la lasta tempo travivis seriozajn malsukcesojn. La dialogo inter la Nordo kaj la Sudo estingiĝis. Dum la lastaj kvar ĝis kvin jaroj montriĝis nek veraj progresoj nek iuj ajn nomindaj atingaĵoj. La internacia komerca kaj mona sitemo jam apenaŭ povas esti nomata sistemo. La monda komerco suferas pro dissplitiĝo, la mona sistemo pro privatigo. La monda banko havas jam nur malfortan pozicion, ĉar oni rifuzas al ĝi la necesajn rimedojn por koncesia monpruntaĵo. Sed tio ĉio havas nenion komunan kun la rolo, la mandato aŭ la funkciadmaniero de la internaciaj organizaĵoj. La fiasko de la dialogo inter la Nordo kaj la Sudo kaj de la internacia kunlaboro rezultas el la fiasko de la registara politiko, de kiu oni volas deturni la atenton imputante la kulpon al la UN-sistemo.
Kie troviĝas la kaŭzoj por la fiasko montriĝas plej klare en la fakto, ke ĝi estas rimarkebla en ĉiuj organoj kaj komisioj interne kaj ankaŭ ekstere de la UN-sistemo. La IV-a UNIDO estis malsukceso. UNCTAD fordonas unu ŝancon post la alia. En la monda banko ne estis eble redukti la fontojn de IDA (Internacia Societo por Evoluo) al la necesa minimuma nivelo. La Internacia Mona Fonduso trankvile rigardis, kiel nuliĝis la rolo de la multflanka sistemo en la garantiado de la internacia pagopreteco. Dum la GATT-renkontiĝo de ministroj en 1982 oni akceptis dekleracion, en kiu troviĝas eĉ ne plu spuro pri la laŭkontrakta respektive jura enhavo de la Ĝenerala Dogana kaj Komerca Konvencio.
Mi ne povas prezenti ĉi tie ĉiujn atingojn de la UN-sistemo, sed nur diri, ke ili estas malgraŭ ĉio vere impresaj. Sen la Unuiĝintaj Nacioj ekzistus en la mondo ankoraŭ pli da kaoso kaj ankoraŭ pli forta ekspluatado. Kelkiu nekonata spirita tereno neniam estus surpaŝita. Ni havus nek la dokumentojn kaj fundamentojn de la internacia respondeco nek la kodojn, konvenciojn, principojn kaj normojn, kiuj hodiaŭ reguligas la internaciajn rilatojn.

La mondo bezonas la Unuiĝintajn Naciojn

Ĉiuj ŝtatoj de la mondo bezonas UN-on, sed la plej grandan signifon ĝi havas por la landoj de la tria mondo. El politika vidpunkto la membriĝo en UN estas por la junaj naciaj ŝtatoj io kiel naskiĝatesto, simbolo kaj konfirmo de ilia nacia suvereneco. Ankaŭ pro sia pli malforta intertraktada pozicio la landoj de la tria mondo bezonas UN-on. En la mondo regas la lupa leĝo: la pli forta vivas je la kostoj de la pli malforta. La pli malfortaj partneroj bezonas la regulojn, normojn kaj difinojn de la internacia sistemo pli ol la pli fortaj. En la internacia ekonomia ordo, karakterizita de malsameco, la demokrata internaciismo, reprezentita de UN, estas la sola egaligo. La Unuiĝintaj Nacioj estas la unusola multflanka institucio, per kies helpo la evolulandoj povas defendi siajn interesojn kaj provi krei por si pli bonajn evoluajn kondiĉojn kaj ŝanĝi la regularon tiel, ke ili fariĝu politike sendependaj kaj ekonomie memstaraj.
Kompreneble oni pro tio ne forgesu, ke la Unuiĝintaj Nacioj havas signifon ankaŭ por la industriŝtatoj, kiuj ja mem fondis UN-on. UN estis spegulbildo de la idealismo kaj de la moralaj kvalitoj, kiujn proklamis kaj predikis la sciencistoj kaj filozofoj de tiuj ŝtatoj. Temas ĉi tie pri ĝeneralvalidaj valornocioj kaj ideoj. Do, tiuj ŝtatoj konsciiĝu pri tio, ke ili estas ruinigontaj la plej altajn idealojn de sia propra socio, kiun ili mem pene formis kaj en la estonteco urĝe bezonos. Ili ankaŭ ekkonu, ke ilia atako kontraŭ la UN-sistemo kaŭzas nemezureblan damaĝon al la valornocioj kaj idealismo de iliaj propraj popoloj kaj ĉefe de la juna generacio. Pli aŭ malpli frue la ideologio, sur kies bazo tiu ĉi atako estas gvidata, elvokos ĉe la loĝantaro de tiuj ĉi landoj deziregon je perforto, egoismo kaj despotismo. Per tio ili fosas al si la propran tombon. Ĉar la valoroj reprezentitaj de la Unuiĝintaj Nacioj estas same gravaj por la stabileco de la unuopa socio, kiel por la konservado de la internacia ordo.
Oni devas ankaŭ akcenti, ke tiu ĉi ideologia atako neniam povas esti direktita nur kontraŭ unuopaj UN-organizaĵoj, sed ĉiam trafos UN-on kiel tutaĵon, ĉar ĉiam unu parto de la tuta etoso kaj de la komunaj idealoj estos detruata. Kaj definitive detruita idealo estas malfacile rekonstruebla. Se oni do ne haltigos tiun ĉi proceson kaj se la nomitaj industriŝtatoj sukcesos ŝanĝi la orientadon kaj funkciadon de la UN-organizaĵoj laŭ siaj planoj, oni ne atingos reformon de la sistemo, sed ruinigon kaj celfremdigon.
Ni ĉiuj devas hodiaŭ helpi defendi la multflankan UN-sistemon kontraŭ tiuj atakoj. Tiel longe kiel la homa socio pluekzistos en sia nuntempa formo ni devas gardi tiun ĉi sistemon, la unusolan institucion, kiu simboligas nian sonĝon pri tutmonda ordo kaj monda regado kaj kiu ĉiam estos bezonata en unu aŭ alia formo – supozite, ke ĝiaj idealoj restos konservitaj. Ni ne devas permesi, ke la fortoj, kiuj volas neniigi la UN-sistemon, nin jetos en internacian anarkion kaj kaoson kaj puŝos nin al la brutala kaj primitiva justeco de la duflankeco.

(El: Neue Perspektiven, 1/85 tradukis Renate kaj Dieter Berndt)

RECENZO: Danco ĉirkaŭ lokomobilo

Sub la supercitita titolo eldonis „Eldonejo EESTI RAAMAT, Tallinn" 170-paĝan romanon de Mats Traat. La relative malgranda libro ampleksas la multjaran historian evoluon de Estonio kaj ĝia popolo, ekde la komenciĝo de la 1-a mondmilito 1914, dum la sekvinta postmilita burĝa ekonomia ordo, novokupo far la faŝisma armeo en la 2-a mondmilito ĝis la jaro 1957, kiam firmiĝis la konfliktriĉa reorganizado de la kampara vivo al la sociala strukturo.
Por pritrakti tiun longan, eventoplenan kaj doloriga̲n tempospacon Mats Traat elektis kvin epizodojn el kronologie sinsekvaj etapoj kaj, simbolece por la tuta Estonio, ilustris la sorton de la estona bieno Aiaste dum tiu periodo. En la centro de la romano staras lokomobilo, simbolo por la komenciĝanta teknika evoluo kaj mekanikigo en la estona agrikulturo. Prefere traktataj estas la vivkondiĉoj kaj la sinteno de la homoj kun iliaj ĉiutagaj, grandaj kaj malgrandaj problemoj, kiuj ŝanĝiĝis konforme al la senĉese ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj. Ne nur aliiĝis la tempo, aliiĝis samgrade la homoj, kiuj akiris dependante de la pokaza sociordo novan konscion kaj novajn homajn interrilatojn. La rilatoj inter la tero kaj homo ricevis novan aspekton. Same montriĝis, ke estiĝo de nova sociordo estas procedo ofte komplika kaj neharmonieca. La prezentado atestas multflankan observadon kaj objektivan pritakson de la konkretaj realaĵoj de la kampara vivo kaj de ĉiuj evolukonfliktoj.
La traduko en Esperanton distingiĝas per agrabla stilo flue legebla. Rimarkinde estas la impresplena interpreto de la poeziecaj kaj etikaj tekstpartoj de la verko. Oni povus diskuti, ĉu nepre necesas uzi esperantigitajn nacilingvajn terminojn kiel p.e. „portfeljo" (franca portefeuille) anstataŭ aktujo aŭ „konstablo" (angle constable) anstataŭ policisto aŭ milicano? Ĉar la tekstoj enhavas tiajn nekutimajn vortspecojn relative malofte, ili ne tro ĝenas la legofluon kaj komprenon. La preskaŭ senerare presita eldono meritas lokon sur la librobreto de ĉiu pretendema esperantisto.

Erich Würker

UNESKO strebas unuanimecon en la intereso de sekurigo de paco kaj malhelpo de milito

La eksiĝon de Usono el UNESKO fine de 1984 antaŭis kalumnia kampanjo direktita de Usono, dum kiu la kurso, la aktivado, la estraro, la programo kaj la buĝeto de UNESKO estis malbonfamigitaj per plej diversaj fikulpigoj. En sia studaĵo „UNESKO: demandoj kaj respondoj" UNESKO repuŝis tiujn fikulpigojn en strikta maniero.

1. Kiu decidas pri kurso, programo kaj buĝeto de UNESKO?

UNESKO estas interŝtata organizaĵo kun 161 membroŝtatoj kaj tri asociiĝintaj membroj. Ĉe iuj aktivadoj Vatikano havas staton de observanto.

La Ĝenerala Konferenco, al kiu estas invititaj observantoj de ĉiuj ŝtataj kaj neŝtataj organizoj, konsistas el reprezentantoj de la membroŝtatoj. Ĝi posedas nelimigitan rajton je fikso de fundamentaj taskoj de UNESKO kaj de ĝia programo kaj je akcepto de la buĝeto. Ĉiun sesan jaron ĝi decidas pri la mezetempa plano de la organizaĵo kaj ĉiun duan jaron la laborprogramon kaj la etaton.

Por la plenumo de la programo estas respondeca la plenumkonsilantaro, kies membroj estas elektitaj de la Ĝenerala Konferenco.

La decidoj de la Ĝenerala Konferenco estas realigataj de la sekretariato gvidata de ĉefdirektoro nomumita de la Ĝenerala Konferenco. La ĉefdirektoro regule raportas al la gvidaj instancoj pri la realigado de la programo kaj la administrado de la financoj de la organizaĵoj. Ĝi krome proponas pri programo kaj buĝeto, la definitivaj decidoj tamen estas akceptataj nur fare de la Ĝenerala Konferenco.

2. Ĉu UNESKO foriĝis de siaj originaj celoj?

Tiuj, kiuj jesas tiun demandon, funebras pro iu „ora epoko", kiam la organizaĵo onidire estis netuŝata de la streĉoj en la mondo kaj ricevis aplaŭdon por siaj sukcesaj alfabetigadoj aŭ la savo de la temploj de Nubio.

Tiel komparante la gloran pasintecon kaj la nuntempon pentratan grize kaj senespere, oni preteratentas gravajn faktojn.

Ĉu la organizaĵo restis fidela al sia Konstitucio, estas facile juĝebla laŭ praktikaj atingaĵoj aŭ kvante mezureblaj rezultoj. Rilate al praktikaj atingaĵoj la „operativaj aktivaĵoj" de UNESKO ja egalas al tiuj de pasintaj jaroj. En la tempo de 1979 ĝis 1983 UNESKO realigis en ĉirkaŭ 100 membroŝtatoj pli ol 1 000 „operativajn objektojn", kies kostoj sumiĝas je ĉirkaŭ 400 milionoj da dolaroj. Inter tiuj ne troviĝas tiuj multnombraj projektoj, kiuj ricevis ekspertojn aŭ konsilantojn, aŭ kiujn UNESKO subtenis perante. Tiuj „projektoj" aŭ „atingaĵoj" ampleksas tutan spektron de aktivaĵoj – komencante ĉe la planado kaj reformado de klerigado en iu afrika lando ĝis la restaŭrado de budhisma templo aŭ la konstruado de ŝipo por esplorado de maro. En la sama daŭro UNESKO partoprenis alfabetigajn kampanjojn por pli ol 15 milionoj da plenkreskuloj kaj junuloj, kiuj ne povis viziti lernejon. Sole en 1980 ĝi zorgis pri la edukado de 30 000 instruistoj.

Ekde 1978 UNESKO elspezis por 29 internaciaj projektoj de protektado de monumentoj pli ol 40 milionojn da dolaroj, i.a. por la konservado de Venecio, de Akropolo, de Plaza Vieja en Habano, la insulo Gorée en Senegalio kaj de la „kultura triangulo" de Srilanko. Estas necesa pli ol unu milardo da dolaroj por sukcese fini tiujn projektojn.

Por internaciaj sciencaj programoj UNESKO pagas ĉiujare proksimume 30 milionojn da dolaroj, tiel por la Internacia Hidrologia Programo, la Internacia Programo de Geologiaj Interefikoj aŭ la Programo pri Homo kaj Biosfero (MAB). La membroŝtatoj siaflanke elspezas por tiuj programoj, super kiuj laboras pli ol 20 000 sciencistoj, pli ol 500 milionojn da dolaroj. Ĉiujare sub protekto de UNESKO estas edukataj 4 000 sciencistoj.

3. Ĉu UNESKO estas politikigita?

Laŭ la volo de la fondintoj UNESKO devis porti politikan karakteron. Ili estis ekkoniĝintaj, ke la nesufiĉa internacia kunlaboro je spirita kampo parte estis respondeca por la ekflamo de la faŝismo kaj la estiĝo de la dua mondmilito. Tiel estis fondita la organizaĵo por atingi pacon „bazante je la spirita kaj morala solidareco de la popoloj".

Ankaŭ pro ĝia agadsfero UNESKO estas politika organizaĵo, ja ekzistas intimaj ligoj inter edukado, scienco, kulturo, informado kaj komunikado unuflanke kaj aliflanke la metodoj, kiel ŝtatoj estas regataj, do temas pri politiko en la plej vera senco de la vorto.

Same la Konstitucio respegulas ĝian politikan karakteron, ĉar la Ĝenerala Konferenco kiel plej alta organo de UNESKO konsistas el reprezentantoj de registaroj de la membroŝtatoj, kiuj kompreneble uzas tiun forumon por elpaŝi pri opinioj kaj problemoj de siaj registaroj.

4. Ĉu en UNESKO ekzistas „aŭtomata plimulto"?

Tiucele du kondiĉoj devus esti plenumataj: Unue devus esti voĉdonado pri la ontaj decidoj, kaj due la voĉdonado devus klare montri la ekziston de „aŭtomata plimulto".

Ekde kelkaj jaroj UNESKO sekvas karakterizan praktikon: Ĝi celas unuanimecon, plene konsiderante la bazajn poziciojn de ĉiuj membroŝtatoj, eĉ de la plej malgrandaj malplimultoj, kaj akceptante decidojn sen voĉdonado. Tiel ekzemple la Dua Mezetempa Plano de UNESKO pri aktivaĵoj en tempo 1984–1989 estis akceptata unuanime.

La strebado al konsento estiĝis kutima praktiko ekde 1976, ekde la konsistigo de „projektada kaj traktada grupo" por ĉiu kunveno de la Ĝenerala Konferenco. La Ĝenerala Konferenco transdonas la ankoraŭ plej debatitajn projektojn de rezolucioj al tiu grupo kun la tasko, proponi ŝanĝojn aŭ en kelkaj kazoj peti malproponon, por atingi vortumon ĝenerale akcepteblan.

5. Ĉu demandoj kiel paco kaj malarmado estas ekster la kompetenteco de UNESKO?

Tiun demandon respondas la Konstitucio, en kies antaŭparolo tekstas, ke „ĉar militoj havas sian originon en la mensoj de la homoj, ankaŭ la protekta muro de paco devas esti starigita en la pensado de la homoj". La respondon oni trovas sub la titolo „celoj kaj taskoj". Tie tekstas, ke „estas celo de la organizaĵo kontribui al konservado de paco kaj sekureco per la subtenado de kunlaboro inter la popoloj je edukado, scienco kaj kulturo". En tiuj tri specifaj kampoj UNESKO pledas por paco kaj malarmado, tuŝante la problemojn el tute alia starpunkto ol Unuiĝintaj Nacioj aŭ Ĝeneva Konferenco.

6. Ĉu UNESKO estas pledanto por cenzuro, laborlimigo de ĵurnalistoj aŭ „Kodo de Konduto" por la gazetaro?

Ĉiuj rezolucioj pri la informada kaj komunikada kampo senes-

cepte estis akceptataj per konsento, ĉar la fundamentaj opinioj de ĉiuj membroŝtatoj estis plene konsiderataj. Kaj en neniu el tiuj rezolucioj kaj en neniu deklaro de la ĉefdirektoro demandoj kiel konduta kodo aŭ limigoj de ĵurnalista agado estis rekomendata. Tion ankaŭ konfirmas datumita je 25a de februaro 1983 raporto de State Department al la usona kongreso, en kiu tekstas, ke „ĝis hodiaŭ tamen ne estas realigataj de UNESKO ĝis nuna tago politikaj linioj kaj proceduroj, kiuj kaŭzus limigon de gazetara libereco".
Kvankam membroŝtatoj kaj fakuloj nelimigite havas rajton pri defendo de siaj opinioj laŭ starpunktoj kaj proponoj, kiuj transpaŝas la kadron de UNESKO, nur tiuj estiĝas starpunktoj kaj proponoj de UNESKO, kiuj eksplicite aperas en la rezolucio de ĝia plej supera organo, la Ĝenerala Konferenco.

7. Ĉu UNESKO strebas subigi la homajn rajtojn je la rajtoj de popoloj?
La ĉefdirektoro deklaris dum la lasta sesio de la Ĝenerala Konferenco: „Nenio en la proponata programo aludas tiun interpreton. Ekzistas organika interligo inter homaj rajtoj kaj la rajtoj de popoloj. Sen la rajtoj de popoloj la homaj rajtoj troviĝas en la danĝero, ekzisti nur formale . . . Sen la homaj rajtoj la rajtoj de popoloj ne sukcesas kontraŭ maljusto kaj tiraneco. Necesas pli profunde esplori tiun interrilaton kaj la esencan koncepton de rajtoj de popoloj."

8. Kial kaj en kioma amplekso UNESKO subtenas liberigajn movadojn?
La reprezentantoj de afrikaj liberigaj movadoj rekonataj de Organizaĵo de Afrika Unueco, do de Afrika Nacia Kongreso (ANC), Tutafrika Kongreso de Suda Afriko (PAC) kaj Sudokcidentafrika Popola Organizaĵo de Namibio (SWAPO), partoprenas la aktivaĵojn de UNESKO ekde 1972, post kiam la Ĝenerala Konferenco analoge decidis.
En diversaj rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco estas intencata donado de helpo por tiuj movadoj.
La tri afrikaj liberigaj movadoj ricevis en 1981 70 000 dolarojn, en 1982 134 000 dolarojn kaj en 1983 58 000 dolarojn kaj elspezis ilin por instruiloj, stipendioj, vojaĝkostoj de siaj reprezentantoj al UNESKO-aranĝoj, salajroj por tri SWAPO-instruistoj kaj kontrolaj misioj de UNESKO. Aldoneblas, ke la UNO-evolua programo (UNDP) en la tempo 1981–1983 donis al tiuj tri liberigaj movadoj subtenon de 3 467 000 dolaroj.
Al PLO estis pagitaj inter 1981 kaj 1983 entute 341 000 dolaroj (meze 114 000 dolaroj jare). El tiu sumo palestinaj kulturaj kaj edukaj institucioj ricevis 100 000 dolarojn. Alia parto de la monrimedoj estis stipendioj por ebligi al palestinaj studentoj studadon en eŭropaj aŭ amerikaj universitatoj.

9. Ĉu ekzistas malperfektaĵoj en la gvidado de UNESKO?
La gvidado de la organizaĵo estas subigita al la regula kontrolo de du gvidaj organoj, kiujn konsistigas reprezentantoj de membroŝtatoj: la Ĝenerala Konferenco, kiu kunvenas ĉiun duan jaron, kaj la plenuma konsilantaro, kiu kunvenas dufoje jare. Krome du gremioj ne apartenantaj al UNESKO regule ellaboras raportojn pri la organizaĵo: la Komuna Inspekta Grupo de UN kaj la tute sendependa Ekstera Revizoro, kiu estas gravulo kiel la Patenta Ofico kaj de la Supera Kalkula Ĉambro de Grandbritio. Neniu el tiuj kontrolaj gremioj ĝis nun riproĉis la gvidadon de la organizaĵo entute.
Antaŭ nelonge instigata esploro de alia organo tute sendependa de UNESKO kondukis al la jena resumo: „Ni rigardas la metodojn de gvidado kiel modelajn kaj orientitajn al estonteco kompare kun aliaj UN-organoj. Krome ili enhavas povon por plibonigo de kunlaboro kun Usono." (Raporto de prezidanto de Federacia Kalkula Korto de Usono al la kongreso de 14a de septembro 1979).

10. Ĉu la buĝeto de UNESKO estas ŝveligita?
La buĝeto estas reduktita je 13 procentoj. Ĝi estis por la jaroj 1982–1983 430 milionoj da dolaroj, el kiuj la Ĝenerala Konferenco aprobis nur 374 milionojn da dolaroj. La ĉefa kaŭzo por tiu redukto troviĝas en la plivalorigo de usona dolaro al la franca franko, tiu valuto, en kiu estas pagataj pli ol 60 procentoj el ĉiuj UNESKO-elspezoj.
Estas menciinda, ke aliaj UN-organizaĵoj male al tio plialtigis siajn buĝetojn: la Internacia Organizo pri Laboro je 4 procentoj, la Tutmonda Organizo pri Sano je 12 procentoj kaj la Organizo pri Nutrado kaj Agrokulturo je 15 procentoj.

11. Ĉu UNESKO havas pli da kunlaborantoj, kaj ĉu ĝiaj kunlaborantoj estas tropagataj?
La sumo de salajroj de la UNESKO-kunlaborantoj en la lasta financa periodo estis malpli ol 50 procentoj de la entuta sumo administrata de la organizaĵo. Tiu procentaĵo konstante malkreskis ekde la komenco de la 70aj jaroj, kiam ĝi estis ĉe 65 procentoj.
Tiujn procentaĵojn oni juĝu ĉefe el tiu vidpunkto, ke UNESKO ne produktas materiajn varojn, sed ĉefe agadas per servoj. Kiel en ĉiuj tiaj institucioj la salajroj de kunlaborantoj formas grandan parton de la buĝeto.
La entuta nombro de kunlaborantoj listigitaj en la salajra dosiero (teknika personaro, ekspertoj kaj funkciuloj inkluzive de kunlaborantoj ne laborantaj en la ĉefsidejo) estis komence de 1984 3 444, en 1975 estis 3 457. Laŭ statistikaj donitaĵoj de UN el fino de 1982 UNESKO havas la plej malgrandan kvoton je altrangaj funkciuloj. La alteco de salajroj por ekspertoj kaj funkciuloj estas fiksita de la Ĝenerala Konferenco laŭ strikta atento al la decidoj de UN-plenkunsido.

12. Ĉu en UNESKO estas tro da kunlaborantoj el socialismaj kaj triamondaj landoj?
La disdivido de UNESKO-kunlaborantoj laŭ ilia regiona deveno estas videbla en la sekva tabelo. La unua kolumno indikas la kunlaborantojn en mezaj kaj altaj pozicioj (oficoj depende de geografia disdivido).


Regiono	Kunlaborantoj en mezaj kaj altaj pozicioj (procentoj)	Kunlaborantoj entute (procentoj)
okcidenta Eŭropo kaj norda Ameriko	39,5	62,8
latina Ameriko kaj kariba regiono	12,8	8,3
Azio kaj pacifika regiono (inkl. Ĉinio, Japanio)	14,4	8,7
Socialismaj landoj	8,1	4,1
Afriko sude de Saharo	15,8	8,6
arabaj ŝtatoj	9,4	7,5

13. Ĉu kunlaborantoj, kiuj estis ekziligitaj aŭ suferas punon al malliberiĝo, povas resti membroj de la sekretariato?
En la interesoj de la misioj de internaciaj organizaĵoj la sufiĉa paca vivo de iliaj funkciuloj devas esti garantiata, kaj tio speciale en tiu lando, en kiu ili laboras. Ni supozu, ke la kontrakto de UNESKO-kunlaboranto malvalidiĝas en tiu momento aŭtomate, kiam li estas malliberigata, kondamnata aŭ elpelata kaj sekve ne estas plu pagata salajro.
Jam unu el tiuj tri faktoroj sufiĉus por subigi lin flanke de UNESKO al la plej severa puno. Sed fakte la ĉefdirektoro kiel estro de la sekretariato – kiel tio estas kutima ankaŭ en aliaj institucioj aŭ entreprenoj, – povas procedi kontraŭ li nur atentante la personaran statuton kaj la validan proceduron.

El: neue perspektiven 2/85
trad. M. Lennartz

Michael Behr

Travivaĵoj kun Johann Sebastian Bach


Foto: Zentralbild

1. Kia li estis, kaj kia estas lia muziko?

La muzikisto kaj komponisto, naskiĝinta antaŭ 300 jaroj, vivinta de 1685 ĝis 1750. Kia li estis?
27 el la 65 vivojaroj li agis en Leipzig. La registro de liaj verkoj, la tiel nomata „Bach-Werke-Verzeichnis", tiu registro enhavas 1 080 titolojn. 20 infanoj el 2 edzecoj nomis lin patro. Sed nombroj sen kunteksto ne heligas lian vivon.
Demandite pri la recepto de lia intertempa sukceso, li modeste deklaris: „Mi devis esti diligenta; kiu same diligentas, tiu same sukcesos."
Kaj kia estas lia muziko? Goethe konfesis: „Lia muziko movas mian plej internan profundon, kvazaŭ la eterna harmonio parolus kun si mem." Kaj Beethoven, aludante la fakton, ke la germana vorto „Bach" signifas „rivereto", – Beethoven emfazis: „Lia nomo ne estu Bach, sed maro!"
Prof. d-ro Rudolf Fischer, pianisto kaj gvidanto de la mondfama Leipzig-a Bach-konkurso, diris antaŭ nelonge intervjue: „La vojo al supermeznivela muzikisto ne estas pensebla sen la muzika fundamento metita de Bach, ĉar la instruverkoj de Bach ampleksas tutajn lernprogramojn ... La muziko de Bach antaŭ ĉio estas defio spirita, ĝi postulas fantazion de la prezento kaj precizan muzikan pensadon."

2. La junaĝo

Johann Sebastian Bach naskiĝis la 21an de marto 1685 en la turingia urbeto Eisenach en familio konsistanta ekde de generacioj el muzikistoj kaj muzikantoj. Oni tie eĉ parolas pri la Bach-oj. Kiel 10jarulo li perdas ambaŭ gepatrojn kaj venas en la familion de la pli aĝa frato loĝanta en la urbeto Ohrdruf. Nur 15jara, li jam memstare laboras kiel duaranga kantoro en Lüneburg, kaj post du jaroj li profesie muzikas kiel violonisto ĉe la princa kortego en Weimar. Kiel 18jarulo, li, la nekonata muzikisto, aspiras pri la ofico de orgenisto en Arnstadt. Tie li provludas sur la orgeno tiel virtuoze, ke oni tuj pagas al li pli altan salajron ol iam antaŭe en tiu ofico. Ĉi tie la juna orgenisto komencas studi kaj eluzi la verkojn de la ĉi-tempe famaj komponistoj. Bach deziregas aŭskulti la plej faman orgeniston, Buxtehude en Lüneburg, kaj li petas forpermeson por 1 monato kaj piedmarŝas 400 kilometrojn al Lübeck. Tie li entuziasmiĝas pri la muzika vivo kaj restas ne unu, sed kvar monatojn. Tio kompreneble kolerigas liajn ekleziajn ĉefojn. Buxtehude, jam maljunulo, proponas al Bach la tre sopiratan oficon de orgenisto ĉe la bonega Maria-orgeno en Lübeck, sed Buxtehude krome metas la kondiĉon, ke Bach kun la ofico ankaŭ prenu lian malbelan kaj jam 30jaran filinon kiel edzinon. Sed tia ofero estus tro granda, kaj Bach malakceptas. Hodiaŭ ni scias, ke Buxtehude la samon proponis al du aliaj grandaj muzikistoj, al Mattheson kaj al G. F. Händel, kaj ankaŭ ili fuĝis la malbelulinon. En Arnstadt Bach ofte disputas kun siaj ĉefoj. Oni akre mallaŭdas lin, ĉar li kun fremda virgulino ge-sole muzikas en la preĝejo. Krome oni atakas lin, ĉar li dum la diservoj ludas tro longajn kaj tro pretendemajn muzikaĵojn, antaŭ, post kaj inter la ĥoraloj. Responde al tiu kritiko li reduktas la muzikaĵojn tiel, ke la kvereloj akriĝas. La daŭra malpaco tedigas al li la restadon, kaj post kvar jaroj li planas transiri al Mühlhausen.

3. Unuaj orgenverkoj

Imagu la tre junan viron, tuj post la akra disputo kun la ortodoksaj ĉefoj, kiu koleregе saltas sur la benkon de la orgeno! Li devas lasi liberan kuron al sia kolero, kaj li faras tion per improvizado sur la orgeno. Tiel estiĝas la unua genia verko de la 18jara Bach – la Tokato kaj Fugo en d-minoro. En ĝi, li muzikas per juneca vervo, per virtuoza brilo, per novaj harmoniaj efikoj. Kaj tamen profunda, nin kaptanta seriozeco sonas el tiu muzikaĵo. Vortoj ne sufiĉas por priskribi tian muzikon, kaj pli bone ni travivu ĝin en koncerthalo aŭ preĝejo. Bach kreas dum sia vivo abundegon da tre impresigaj orgenverkoj.

4. En Mühlhausen kaj Weimar

En la jaro 1707, en la urbeto Mühlhausen mortas la ĝisnuna orgenisto, kaj Bach estas la pli bona kaj eĉ pli bone pagita posteulo. Tie la 22jara Bach travivis duoblan feliĉon: unue li enamiĝis en Maria Barbara, kaj due li heredas monsumon en amplekso de duona jarsalajro. Ambaŭ kaŭzoj kuraĝigas lin al edziĝo en oktobro 1707. Maria Barbara kaj li ĝuas feliĉan edzecon, poste kune havantaj 7 infanojn. Sed en Mühlhausen Bach restas nur unu jaron, ĉar li deziras fuĝi la senfinajn disputojn de diversaj teologoj – de la pietistoj kaj ortodoksoj –, kiuj eĉ celis eluzi ankaŭ lin por siaj kvereloj. Bach kaptas novan ŝancon en Weimar. Tie la junedzo akiras la postenon de kortega orgenisto kaj kortega koncertestro, kaj tie li sukcese agas 10 jarojn, samtempe kiel eklezia kaj sekulara muzikisto. Li komponas kaj prezentas multajn kantatojn kaj orgenverkojn. Kelkaj ŝatantoj de lia muziko organizas en Dresden muzikan konkurson inter la franca orgenisto kaj komponisto Marchand kaj Bach. Ambaŭ muzikistoj ankoraŭfoje ekzercas antaŭ la oficiala konkurso, kaj ĉiokaze ili reciproke kaj sekrete aŭskultas la kontraŭulon. Kiam oni malfermas la konkurson, Bach sole ludas kaj venkas, ĉar Marchand fuĝis por eviti malvenkon. En Weimar Bach trovas bonajn amikojn, ekzemple la alian orgeniston Johann Gottfried Walter kaj la klerulon Matthies Gesner. Sed la belaj jaroj en Weimar finiĝas per disonanco: La maljuna ĉefo de la kortega orkestro mortas, kaj Bach prave kaj laŭtradicie aspiras tiun bonan postenon. Sed la duko dungas alian, ne kapablan muzikiston. Post tiu decido Bach postulas sian maldungon, sed la feŭda sinjoro ne permesas la foriron de sia subulo. Bach ripetas la skriban postulon pri maldungo plurfoje kaj per ribelaj vortoj. La duko ĵetas lin en la karceron por 4 semajnoj, kaj nur post tiu tempo Bach rajtas foriri el la urbeto.

5. Majstra prilaboro de fremdaj verkoj

Bach kunprenis el Weimar jam multajn elstarajn verkojn, ekzemple ankaŭ prilaborajojn laŭ originaj verkoj de italaj majstroj kaj eĉ de la princfilo el Weimar. Tiu princfilo Johann Ernst estis 18jara muziklernanto de Bach en Weimar. Li fervoris kiel hobia muzikanto kaj diligente studis la verkojn de la italaj orgenmajstroj, speciale de Vivaldi. Kaj laŭ la stilo de Vivaldi la princfilo eĉ komponis proprajn orgenverkojn sub la gvido de Bach. La instruisto Bach plibonigis la rezulton certagrade, kaj hodiaŭ ni nomas la verkon „Koncerto n-ro 1 en G-maĵoro

de J. S. Bach laŭ princfilo Johann Ernst el Sachsen-Weimar".

6. Kiel nur sekulara muzikisto en Köthen

Kiel 32jara sperta muzikisto Bach fariĝas la ĉefo de la kortega orkestro en Köthen, kaj ĉi tie li agas 10 jarojn kiel nur-sekulara muzikisto. La posteno en Köthen validas por li kiel la plenumo de ĉiuj deziroj. Poste li skribos en letero, ke li ĉi tie havas favorkoran princon, la princon Leopold, kiu la muzikon konas kaj vere ŝatas, kaj Bach esperas resti ĉi tie ĝis la vivofino. Lia orkestro konsistas el 18 muzikistoj, inter ili elstaraj majstroj de la instrumentoj. Bach muzikas kun ili, kaj li skribas por ili grandan nombron da verkaĵoj hodiaŭ mondfamaj, ekzemple la diversajn verkaĵojn por klaviceno, la suitojn por sola violono kaj sola violonĉelo, por fluto kaj klaviceno, la tiel nomatajn Brandenburg-ajn Koncertojn, pluajn partojn de la tiel nomata Bontemperita Piano kaj kelkajn sekularajn kantatojn.
Dum somero 1720, kiam Bach havas 35 jarojn, li devas obei la ordonon de sia princo akompani lin al la somera ferirestado en Karlsbad. Dum tiuj malmultaj semajnoj nekonata malsano trafas lian edzinon kaj ŝi mortas. Revenante Bach subite estas vidvo. Post tiu bato de la sorto Bach trovas novan edzinon, Anna Magdalena. Ŝi estas 15 jarojn pli juna ol li, tre muzikema, bele kantanta kaj gaja persono. Multe oni nun muzikas en tiu muzikista familio, kiu daŭre kreskas. Anna Magdalena entute naskas 13 infanojn, sed kelkaj el ili mortas kiel infanoj. – Ankaŭ la princo Leopold edziĝas, sed bedaŭrinde kun malmuzikema princino, kiu lin forlogas de la muzika vivo. Pro tio Bach denove komencas serĉi novan dungon post 10 bonaj jaroj en Köthen.
En Köthen Bach komponis 6 koncertojn por soloinstrumentoj kun orkestro kaj dediĉas ilin al la Markgrafo de Brandenburg, sekrete esperante pri ebla posteno proksime de Berlin. Tiuj koncertoj ŝprucas ĝojon de vigla muziko. La solo-instrumentoj dancigas lumreflektojn super la rapidanta muziko.

7. Komenco kaj devoj en Leipzig

Kial Bach post Köthen celas al Leipzig? En Köthen la muzika klimato malboniĝis, kaj Leipzig prezentas al Bach du gravajn avantaĝojn: Unue, en Leipzig liaj filoj bone povas studi, kaj due Bach konscias pri tio, ke en 1723 Leipzig estas la kultura centro de Germanio, proponanta al li multajn stimulojn kaj interesajn taskojn. Sed 6 kandidatoj aspiras pri la posteno, kaj la Leipzig-a Urba Konsilantaro interesiĝas pri tri el ili, nome pri Telemann el Hamburg, Graupner el Darmstadt kaj Bach el Köthen, eĉ en tiu sinsekvo. Sed Telemann kaj Graupner ricevas tiajn plialtigojn de la salajroj far iliaj ĝisnunaj ĉefoj, ke ili ne venas al Leipzig. Fine la Urba Konsilantaro decidas favore al Bach, kvankam tiu ne havas akademian kleron. Bach eĉ kontraŭvole akceptas, ke li en Leipzig entute ne akiras tiom da salajro kiel en Köthen, kvankam li en Leipzig devas pli multe labori. Samtempe li ĉi tie transprenas tri funkciojn: nome tiujn de kantoro, de Urba Muzika Direktoro kaj de gvidanto de la tiel nomata Collegium Musicum.
La ĉefa zorgo por Bach en Leipzig estas la Thomas-koruso, kiun li transprenas en mizera stato de la antaŭulo. Li skribas en letero: „El la 54 knaboj nur 17 estas sufiĉe uzeblaj, aliaj 20 ankoraŭ ne uzeblas, kaj la lastaj 17 estas senkapablaj." La koruso devas kanti dum la dimanĉaj diservoj en la du ĉefaj preĝejoj, dum entombigoj kaj edziĝfestoj. Por ĉiu sinprezentado la koruso kaj la kantoro ricevas fiksitan monsumon. Dum la somero 1730 Bach plendas en letero, ke la somero estas tro sana, ĉar tro malmultaj homoj mortas, kaj sekve la kantoro ne sufiĉe lukras! La dua granda tasko de Bach estas la plenumo de la ofico kiel Muzika Direktoro. Kiel tia li devas organizi kaj direkti ĉiujn grandajn koncertojn en la urbo, ankaŭ la t.n. „Muzikon por la Konsilantaro", la kvar orgenistojn kaj la universitatan muzikon. Kiel tria ĉeftasko li gvidas la Collegium Musicum. Tiaj altaj pretendoj tre instigas la komponiston Bach, kaj li verkas abundon da muzikaĵoj, kvin jarkolektojn da kantatoj, la grandajn oratoriojn: Magnificat, Johannes-Pasiono, Matthäus-Pasiono, Kristnaska Oratorio kaj la grandan meson en h-minoro.

8. Distra muziko el la plumo de Bach

Nepre ni konatiĝu kun la bona distra muziko de la 18a jarcento. Ankaŭ ĝin Bach komponas kaj prezentas. La t.n. Collegium Musicum en Leipzig, dum la jaroj ĉirkaŭ 1730, konsistas el sciencistoj kaj studentoj de la universitato, kiuj hobie ludas muzikon kaj bonege regas la instrumentojn. Bach gvidas tiun laikan orkestron kaj komponas por ĝi bonan distran muzikon. La Collegium Musicum muzikas unufoje semajne en granda kafejo en la strato Katharinenstraße, kaj ili ludas la instrumentojn sen antaŭa ekzerco, do ili ludas „de sur la notoj". En 1730 la muziko de la franca reĝa kortego estas modelo por tia muziko. Tiu muzikformo nomiĝas Orkestro-Suito kaj konsistas el difinita sekvo de muzikajoj, el kiuj la unua ĉiam estas solena uverturo por la apero de la reĝo, kaj la ceteraj estas diversaj dancoj laŭmodaj. Ankaŭ Bach komponis tiajn Suitojn, sed bedaŭrinde nur kvar el ili estas konservitaj ĝis hodiaŭ. Bach formis ilin tiel interesaj, ke ili hodiaŭ apartenas al la plej ŝatataj verkoj de la baroka muziko.

9. Ĉagrenoj en Leipzig kaj famo en la mondo

Malgraŭ la bona muzika klimato inter la burĝaro de Leipzig, Bach en letero konstatas, ke li havas „strangan kaj la muzikon ne ŝatantan ĉefaron". Bach skribas peticiojn al la Urba Konsilantaro por ricevi aldonajn rimedojn por bona eklezia muziko. Oni malakceptas la peticiojn, kaj, ĉar li tamen denove kelkfoje peticias, oni minacas lin per malaltigo de la salajro. Daŭre Bach devas disputi kun la Urba Konsilantaro pri la demando, ĉu la edukistoj por kantado de la Thomas-koruso estas subuloj aŭ de la kantoro aŭ de la lerneja direktoro, kaj neniam oni finsolvas la problemon. Pro tiuj kaŭzoj, la Urba Konsilantaro ne ŝatas la muzikiston Bach, kvankam li intertempe ĝuas mondfamon. La filo Carl Philipp Emanuel raportas, ke aliaj famaj muzikistoj el la tuta mondo tre ofte estas gastoj ĉe Bach, por aŭskulti lian improvizadon kaj lian konsilon.

10. La Kristnaska Oratorio

La Kristnaska Oratorio eble estas la plej populara verko de Bach. Komponante tiun verkon, li ankaŭ prenas muzikaĵojn jam pli frue komponitajn kaj metas novan tekston sub la notojn. Tio estas normala kutimo en la 18a jarcento.
La verko konsistas el ciklo de 6 kantatoj, kaj ĝi priskribas la biblian historion pri la nasko de Jesuo Kristo. La tiel nomata evangelisto, kantata de tenoro, rakontas la biblian tekston, kaj inter la tekstopartoj la aliaj solistoj kaj la koruso komentas la enhavon per arioj, ĥoroj kaj ĥoraloj en belega muziko.

11. La lastaj jaroj

Dum la lasta vivjardeko, Bach ne plu staras en la centro de la muzika publikeco. Li pluagadas kiel Thomas-kantoro, sed ne plu kiel gvidanto de la Collegium Musicum. Liaj grandaj filoj jam estas memstaraj muzikistoj en aliaj urboj.
En Leipzig oni ĉi-tempe fondas novan koncert-societon, kiu preferas la muzikan stilon italan, kaj kiu eĉ malŝatas la barokan manieron de la komponado far Bach. Tial Bach ne partoprenas en la nova koncert-societo, el kiu poste estiĝos la Gewandhaus-orkestro. Sed la reĝoj en Berlin kaj Dresden vokas lin de tempo al tempo por prezenti koncertojn. Speciale la reĝo Friedrich la Dua de Prusio admiras lin pro lia arto de la improvizado, kaj tiu reĝo stimulas lin al du gigantaj majstroverkoj: al „La Muzika Ofero" kaj „la arto de l'fugo".
Dumvive Bach neniam serioze malsaniĝis, sed kiel 64jara lin trafas apopleksio, el kiu postrestas okulmalsano, kaj li blindiĝas. Renoma angla okulkuracisto operacias dufoje kaj donas al li tro multe da medikamentoj. El tio sekvas dua apopleksio, kaj Johann Sebastian Bach mortas la 28an de julio en 1750.

Rudolf Hahlbohm

„Neuruppiner Bilderbogen“

Neuruppin estas urbeto kun iom da industrio, situanta norde de Berlin en arbaro- kaj lagoriĉa regiono. Vaste konata ĝi fariĝis kiel produktejo de bildfolioj, kiuj atingis la tutan mondon kaj sur kiuj troviĝas la vortoj: „Havebla ĉe Gustav Kühn en Neuruppin.“ La „Bildfolio de Neuruppin“ estas interesa fenomeno en la historio de homa komunikado. Ĝi estiĝis kaj prosperis en la 19a jarcento. Per buntaj bildoj kaj iom da teksto ĝi kontentigis inform-bezonojn de simplaj homoj per relative aktuala sciigo pri okazaĵoj en la tuta mondo. La bildfolio samtempe malignoris rigardemon, edifon kaj amuzon. Bildfolioj ankaŭ aperis en Munkeno, Nurenbergo kaj Parizo, sed neniu atingis tiun disvastiĝon kaj socian efikon kiel la bildfolioj de Neuruppin. La granda incendio en la jaro 1787 ekstermis du trionojn de la urbo. Poste ĝi estis vaste rekonstruita, kaj denove ekprosperis metio.

La librobindisto Johann Bernhard Kühn (1756–1826) petis en la jaro 1791 la administran permeson por malfermi libropresejon kaj librovendejon. En la privilegio, kiun li ricevis, tekstas: „Ke li nenion presu, kio estas direktita kontraŭ Dio kaj lia sankta parolo kaj kontraŭ nia reĝa dinastio.“

En la jaro 1810 li produktis la unuajn bildfoliojn en sia Neuruppina laborejo. Sed nur lia filo Gustav Kühn (1794 ĝis 1868), kiu ekkomencis la laboron en 1815, disvastigis la produktadon al reputacia entrepreno.

Unue la bildfolioj estis produktitaj per ksilografio, de post 1825 oni uzis la litografian presmetodon, presis la nigran desegnaĵon per maŝino kaj enpentris la farbojn per mano. Gustav Kühn mem desegnis la bildojn kaj kreis tekstojn. Li estis agema entreprenisto multflanka, sed de post 1825 la litografiejo kaj produktado de bildfolioj fariĝis lia ĉefa fako. 1826 oni presis 24 845 foliojn kaj 1832 jam 1 140 000. La koloriĝejoj en Neuruppin ne plu sufiĉis. Aperis kolorigejoj en ĉirkaŭaj lokoj, en Altruppin, Lindow, Rheinsberg kaj Wusterhausen. Gustav Kühn reliefis la bildfoliojn kaj fondis ilian famon dum 50 jaroj. Li determinis enhavon kaj formon de l'Neuruppina bildfolio. Poste ankaŭ du pluaj firmaoj produktis bildfoliojn, de post 1835 Oemigke kaj Riemenschneider, de post 1859 Friedrich Wilhelm Bergemann. Entute estis 29 000 diversaj temoj de bildfolioj, kiuj iris el Neuruppin en la mondon dum la tempospaco 1810–1937, en eldonkvanto de multaj milionoj. Neuruppin fariĝis centro de produktado de bildfolioj. Por kolorigi la bildfoliojn oni dungis infanojn. Ili uzis ŝablonojn, tranĉitajn el vernisita kartono kaj farbis per brospeniko. Tion faris ekzemple en la jaro 1882 en ĉiu koloriglaborejo po 10 ĝis 17 infanoj en la aĝo de 12–14 jaroj. Ilia labortempo estis de 16,30 ĝis 19,00 horo, merkrede kaj sabate 13,00 ĝis 19,00 horo. Dum la someraj ferioj ili laboris eĉ $9^1/_2$–10 horojn tage. La instruistoj vane protestis ĉe la administrejo kontraŭ tiu-ĉi ekspluatado, sed la entreprenistoj kaj la mizero en la familioj estis pli potencaj. La arta kvalito de la bildfolioj ne estis alta, la metodo simpla kaj la stilo iom naiva. Ili estis adresitaj al la vilaĝa loĝantaro kaj eturbaj metiistoj de Neuruppin kaj ĉirkaŭo. Sed la bezono pligrandiĝis, oni sendis bildfoliojn al skandinaviaj kaj orient-eŭropaj landoj, en la respektivaj lingvoj. La bildfolio de Neuruppin prezentas idilianmediteman mondon, rakontante pri amĝojo kaj -malĝojo. Pri doma feliĉo kaj kverelo kaj ankaŭ glorigis la regantan dinastion. Ĉefe la bildfolioj reflektas etburĝan idearon. Parte demokratiaj tendencoj kaj progresivaj trajtoj evidentiĝas en la bildfolioj de Oemigke kaj Riemenschneider.



La rusa armeo transiras la Vistulon dum la kontraŭ-napoleona liberiga milito.

Foto: Muzeo Neuruppin

La aŭtoro Theodor Fontane (1819–1898), kronisto kaj romanisto, skribis en la jaro 1861 en „La Graflando Ruppin“: „Pli frue ol aperis en la mondo la unua ilustrita ĵurnalo, la Kühna bildfolio ilustris la ĉiutagan historion. Kaj la ĉefa estas, tio ne okazis iam, sed tuj post la evento. Eventojn, kiujn ne vidis iu ajn homa okulo, la desegnistoj kaj koloristoj de Neuruppin videbligis. La ‚Birkenhead', kiu ekflamite subakviĝis, la ‚Präsident', kiu frakasiĝis inter glaciaj montoj, la okulo de la Neuruppina arto observis ilin. Ĉiumomente scii kio naĝas supre, kion koncernas vere la ĉiutagan intereson, tio konstante estis principo kaj misio de la ‚Ruppiner Officin', kaj tiu-ĉi tasko estis modele solvata. La lastaj jaroj ja multon ŝanĝis. La rapide evoluanta gazetafero, per sia en dimensiojn ekzaltita komunikado, sed ankoraŭ ekzistas deflankaj marĉoj kaj erikejoj, kiuj nenion scias pri Delhi kaj Kanpur, pri Magenta kaj Solferino, se ili ne transprenus interligon per la Kühne-bildfolio.“

Mi mem kiel juna litografo antaŭ pli ol duona jarcento dum mia migrado tra Eŭropo venis al Neuruppin kaj laboris iom da tempo en la presejo Gustav Kühn. La Neuruppina bildfolio jam perdis sian mondvastan funkcion vivis ankoraŭ kiel didaktika materialo por infanoj, eltranĉaj vestigaj kaj modlaj folioj. Gazetaro kaj ĵurnalaro transprenis ĝian socian taskon. Ankaŭ en la presejo de Gustav Kühn oni presis gazeton („Märkische Zeitung“). Ni litografoj ĉefe produktis bildlibrojn kaj ludojn por infanoj kaj celtabulojn. Inter la litografa laborejo kaj maŝinhalo troviĝis mallarĝa ĉambro, tie sidis vico da virinoj je longa tabulo kaj kolorigis bildfoliojn per ŝablonoj, laŭ la tradicia metodo de la 19a jarcento. Tiam bildfolioj ankoraŭ estis aĉeteblaj en papervendejoj, sed jam komencis fariĝi kolektinda objekto.

Vidalvide de la presejo de Gustav Kühn hodiaŭ troviĝas bela domo en baroka stilo, la regiona muzeo. Ĝi prezentas en modela aranĝo la historion de la urbo kaj iama Graflando Ruppin. Sekcioj estas dediĉitaj al eminentaj Neuruppinanoj kiel la arkitekto kaj pentristo Karl Friedrich Schinkel kaj la verkisto Theodor Fontane. La muzeo posedas la plej grandan kolekton de Neuruppinaj bildfolioj, speciala sekcio estas dediĉita al ĝia historio.

La bildfolio de Neuruppin ludis konsiderindan rolon. Dum cent jaroj ĝi peris scion pri historiaj okazaĵoj. Ĝi influis la idearon de simplaj homoj. Ĝi amuzis kaj donis spiritan nutraĵon, edukis kaj misedukis, ornamis la loĝejojn de metiistoj, servistoj kaj laboristoj, okupis plenkreskulojn same kiel infanojn. Modeste ĝi kontribuis al la evoluo de nia komunikado. En 1867, unu jaro antaŭ sia morto Gustav Kühn skribis en sian taglibron:

Min voku, kiam plaĉos,
Sinjor', al via rond';
ja daŭre malvastiĝas
al mi la stranga mond'!

Kaj kiam adiaŭas,
ne tute mortu mi:
plufloru iomete
la „kron' de bildfoli'“!

Wera Dehler

Rilatoj inter planlingvoj kaj internacia terminologi-normigo

in memoriam H. J. Plehn

Antaŭrimarko: Kiam la titolo por ĉi-tiu SIS-prelego estis fiksata, neniu pensis pri la subtitolo. Sed antaŭ ses semajnoj nin trafis bato neatendita kaj doloriga: la 10an de marto forpasis Hans-Joachim Plehn, unu el la plej aktivaj instigantoj kaj kunlaborantoj de la Terminologia Sekcio, en sia 80a vivojaro. Dum la lastaj jaroj li senlace atentigis nin (per prelegoj, korespondaĵoj kaj personaj interparoloj) pri la graveco de nova dinamike evoluanta scienco, la terminologio-teorio, pri gravaj institucioj de internacia terminologio-normigado kiel ISO kaj Infoterm kaj pri la kreinto kaj dumviva motoro de la koncerna mondvasta movado, Eugen Wüster – kies multjara kunlaboranto Plehn estis. Pludoni liajn ekkonojn kaj spertojn – almenaŭ skize – kaj instigi diskuton pri la eblecoj de faklingva normigado en Esperanto estas provo daŭrigi lian laboron. Permesu do, ke mi tuŝu kelkajn aspektojn el la vasta tereno, (kiu en sia tuto ankoraŭ atendas esploradon) – por utilo de Esperanto kaj honore al H. J. Plehn. (Prelego dum la 13-a Scienca Interlingvistika Seminario, 27. 4.–1. 5. 1985, Varsovio)

0. Enkonduke

Ni konsciiĝu pri kelkaj faktoj:
Komence de nia jarcento la kreskanta industriigo necesigis normigon de objektoj. (Por amase konstrui aŭtomobilojn ekzemple estas antaŭkondiĉo, ke ĉiuj ĝiaj partoj havu precize la saman formon, ke ĉiuj bezonataj ŝraŭboj [aŭ nitoj] havu certan longecon, dikecon, helicon k.t.p.) Tiucele en industri-ŝtatoj estiĝis naciaj normkomitatoj, kiuj fiksis *objekt-normojn.*
Sed baldaŭ evidentiĝis necesa, same fiksi la nomojn de la objektoj. Per elekto oni forigis sinonimojn kaj per difinoj oni disspecigis homonimojn. Fakaj vortoj fariĝis unusencaj, precize limfiksitaj terminoj. Tiel estiĝis *terminaraj normoj* (aŭ norm-terminaroj). En la dudekaj jaroj internacia industria kunlaboro kaj konkurenco, interŝanĝo de produktoj kaj teknologioj tiom evoluis, ke normigaj streboj devis pliampleksiĝi sur internacian nivelon. En 1928 pluraj naciaj normkomitatoj unuiĝis en Internacian Norm-Asocion ISA[1] (kiu en 1929 havis 17 membrajn komitatojn).
Post la dua mondmilito, en 1946, ISA transformiĝis en ISO[2]. Krom *objektaj* kaj *terminaraj* normoj ISO eldonas ankaŭ normojn pri mezuroj kaj pezoj (SI-sistemo), pri tempo-indikoj, mallongigo de lingvoj, transskribo de ne-latinaj alfabetoj, numerado de artikoloj kaj aliaj temoj de dokumentado kaj informado *(organizaj normoj)*. En la internacia versio (angle, france kaj kelkfoje ruse) tiuj normoj validas kiel *rekomendoj;* pli aŭ malpli *devigaj* ili nur fariĝas post traduko kaj/aŭ prilaborado far la koncerna nacia komitato. ISO kompetentas pri ĉiuj (teknikaj) fakoj, krom elektro-tekniko. Pri tio okupiĝas IEC[3], kiu jam en 1906 estiĝis kaj dekomence rigardis lingvonormigon sian ĉefan taskon. 19 ŝtatoj membriĝis en 1927. (Hodiaŭ IEC funkcias kvazaŭ sekcio de ISO)

1. La rilatoj historie

1.1. Progresema sensiveco de elektrikistoj

La franclingva societo internacia de elektrikistoj, kiu jam ekzistis antaŭ IEC, la Société internationale des électriciens en 1903 aniĝis en la *„Delegacio* por la akcepto de monda helplingvo" kaj transprenis la *patronecon por „Scienca Revuo"* en la jaro de ties estiĝo (1904). Kiam en 1906 *ISAE*[4] fondiĝis, ĝi estis enkludita en la patronecon.
Gvidaj membroj de IEC (Leblanc kaj Janet) publike proponis komence de la dudekaj jaroj *enkonduki Eon*[5] en la teknikon, speciale en la elektroteknikon, kaj japana universitata profesoro pri elektrotekniko, Arakawa-Bunroku, en 1927 verkis studaĵon pri „Elektroteknika terminologio kaj mondlingvo". Tie li esprimis la opinion, ke estus superflue (por malpli oftaj elektroteknikaj nocioj) krei specialajn japanajn esprimojn – sufiĉus, se por ili estos normigataj internaciaj nomoj – en Esperanto, ne en la angla! (Arakawa ankaŭ estis inter la universitataj profesoroj, laŭ kies propono Eo estis allasita en la Monda Inĝenierkongreso, Tokio 1929). La plurlingva difin-vortaro de IEC aperis inter 1935 kaj 38 kaj akceptis Eo-n en sia unua eldono. La verkanto de tiu Eo-parto estis Eugen Wüster.

1.2. La centra figuro: E. W.

Malgraŭ tiu komprenema sinteno de elektroteknikistaj rondoj la tempo ne estis matura por kompleta akcepto de Eo – eĉ ne en tiu sola, relative progresinta fako.
La plua evoluo ne estus imagebla sen la multfaceta aktiveco kaj efikeco de Wüster, pioniro de esperantologio kaj patro de moderna terminologioteorio.
Li naskiĝis 1898 en Wieselburg, Aŭstrio, kiel filo de germana segil-fabrikanto; 15jara, sen speciala kaŭzo, li aĉetis Eo-lernolibron kaj tralaboris ĝin dum unu semajno; per monologoj kaj instruante kamaradojn li perfektiĝis.
Inter la 667 verkoj, kiujn li postlasis, estis multaj tradukoj en la internacian lingvon, inter ili pluraj beletraj. Sed laŭ nombro kaj graveco pli pezas la sciencaj verkoj.
Inter la someroj 1918 kaj 1920 li verkis „Enciklopedian Vortaron Esperanto-Germana", kiu ĝis hodiaŭ validas kiel modela kaj nemalhavebla helpilo por terminografia laboro. (Bedaŭrinde tiu vortaro tiatempe nur aperis ĝis litero „k" – kaj H. J. Plehn, kiu post plurjara klopodo estis trovinta eldonejon por la dua duono de la libro ne sukcesis fini la laboron.)

1.2.1. „LA LIBRO"

La ĉefa verko de la inĝeniero Wüster estas lia doktoriga disertacio pri terminologiaj problemoj. Ĝi aperis 1931 sub la titolo: „Internationale Sprachnormung in der Technik – besonders in der Elektrotechnik" (Internacia lingvo-normigo en la tekniko, precipe en la elektrotekniko).
La spertoj kaj scipovo de W. pri la reguleca planlingvo Eo rolas kiel nevidebla fono sub la komparaj konsideroj kaj ordigaj rekomendoj de tiu-ĉi baza verko de la terminologioscienco. En la lasta kvarono de la libro la aŭtoro pruvas kaj laŭdas la avantaĝojn de Eo. Li komparas ĝiajn kvalitojn kun tiuj de naciaj kaj planlingvoj kaj plurfoje substrekas la konkludon, ke Eo estus la plej taŭga internacia helplingvo, precipe por teknikaj celoj („porcela lingvo"). Fine li eĉ donas dulingvan

resumon (Eo apud De)[12]. Per la ĉefa parto la aŭtoro metis la fundamenton de la moderna scienc-teknika lingvo-normigo. Oni trovas tie, almenaŭ en ĝerma formo, ĉiujn trajtojn de la postaj pri-terminologiaj ISO-Rekomendoj, de struktur- kaj laborplanoj de koncernaj institucioj kaj, ne laste, la skizajn konturojn de la nova scienco, kiu jardekojn poste ricevis la nomon „Ĝenerala Terminologio-Teorio" (laŭ angla mallongigo: GTT[6]).
Tiu baza verko estis tradukita en plurajn lingvojn kaj reeldonita dufoje. Pro la vigla intereso de vastaj rondoj 1934 aperis kompendio, kiu prezentis 1/6 de la originalo sub la titolo „Grundzüge der Sprachnormung in der Technik". Du jarojn poste legeblis la esperanta traduko „Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko". „La Libro", kiu anticipis la evoluon, restas aktuala kiel inform- kaj pensoriĉa, instiga fonto por ĉiuj, kiuj interesiĝas kaj okupiĝas pri lingvo-normigo. Ĝi rolas kiel „Biblio" – ne nur ĉe la anoj de Infoterm.

1.2.2. Kunlaborantoj kaj kun-laborantoj

Kvankam la plej granda, Wüster ne estis la sola, kiu same elstaris kiel esperantologo kaj terminologo: *Ernest Drezen,* Ĝenerala Sekretario de la sovetia Eo-asocio kaj iniciatinto de la sovetia interlingvistiko, estis samtempe renoma kompetentulo pri terminologiaj demandoj.
Kiam la Sovetia Akademio de Sciencoj komisiis al kvinkapa teamo la tradukon de la Wüster'a ĉefverko, Drezen estis unu el la kvin tradukontoj. Tiu rusa versio aperis en 1935. Unu jaron pli frue D. verkis *raporton* „Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro", kiu estis akceptita far la Komisiono por Teknika terminologio ĉe Sovetia Akademio de Sciencoj. Samjare, en sept. 1934, ĝin akceptis unuanime la 19 naciaj normig-asocioj de ISA, kiuj konferencis en Stockholm. Laŭ la proponoj de tiu raporto estiĝis kadre de ISA speciala *komitato por terminologio* (1936) kaj la ideo pri *„terminologia kodo"* ricevis aplaŭdon. Drezen estis komisiita, ĝin realigi. Kvankam la konkreta kodo-propono (12-paĝa listo de esperantaj radikoj!) fine estis malakceptata (*„rezolucio"*, 1938) – la ideo tamen restis viva: Wüster postlasis manuskriptan materialon pri „terminologia ŝlosilo", kiu ampleksas pli ol 20 aktujojn. Menciindas ankaŭ la esperantiganto de la Drezen-raporto (kiu eldoniĝis far „EKRELO" en 1935 kaj 1983 estis represita en Saarbrücken): *A. T. Samojlenko,* kiu dum pluraj jaroj estis laborinta kiel sekretario ĉe Wüster.
Kaj ne laste apartenas al tiuj „pontaj homoj" *H. J. Plehn,* kiu skribis al mi, ke en „la senlaborecaj tempoj de 1930/31, dum kiuj nek klasika gimnazio + teknika altlernejo nek – tutcerte – vicprezidanteco + fakdelegiteco promesis esperon de profesia bazo" li revis pri „labordonanto industriista + esperantista" kaj presigis ĉi-rilatan laborserĉan anonceton en „Heroldo de Eo". „Sola respondanto: inĝ. (ne jam d-ro) Wüster, por kiu la teksto estis tajlorita." En la sekvo Plehn „havis la feliĉon kaj honoron, labori 40 jarojn sub tiu lingvistika geniulo". Kaj ĝis la lasta minuto de sia vivo tiu kunlaboranto aktivis, por informi la Eo-movadon pri la vivoverko de la terminologo kaj esperantologo Wüster.

1.2.3. La „granda perfido" – ĉu E. W. „forlasis" Eo-n?

Unu el la demandoj, kiuj sin proponas por pli profunda esplorado, estas tiu pri la „konvertiĝo": ĉu Wüster en la memorinda ÖNA[7] – kunveno (la 12an de dec. 1935) pro la interveno de la tiama okcidentalisto Engelbert Pigal forjetis sian esperantistecon kaj (interne, kaŝe) „aniĝis" la naturalisma skolo (unue Occidental, poste Interlingua)?
Faktoj estas: li ĉesigis eldonadon de la Enciklopedia Vortaro (kvankam la manuskripto estis preta ĝis Zz), li ne batalis por Eo en la dua eldono de la IEC-Vortaro, kaj la Interlingua-vortaron, kiu aperis 1951, li karakterizas kiel „trezorejo por la terminologia ŝlosilo". Sed komparante ambaŭ naturalismajn semiplanlingvojn (kiujn li perfekte regis) kun etnaj lingvoj kaj aliaj planlingvoj, li denove (en 1966) konstatas, ke la plej perfekta solvo estus Eo, pro la senkompare pli facila lerneblo ĝis aktiva uzo – „sed bedaŭrinde Eo . . . havas *decidan malavantaĝon:* pro sia aŭtonoma derivada sistemo ĝi estas komprenata nur de personoj, kiuj l e r n i s ĝin; kaj tio estas nur eta ono de la homaro" (el la kompletiga raporto 1966 al „Lingvonormigo" de 1931). Do, jen la esenco de ĉiuj „novaj scioj": Eo-n oni devas lerni, por ĝin regi!

2. La nuna stato

Kun granda bedaŭro kaj iom da miro ni devas konstati, ke en la nunaj okdekaj jaroj, senpere antaŭ la centjariĝo de planlingvo, kiu altgrade taŭgas kiel lingva materialo por sciencteknikaj celoj, fakte *ne ekzistas* iuj rektaj, oficialaj *kontaktoj* inter Esperanto- kaj internacia terminologi-normiga movado. Necesas do, skizi la situacion en ambaŭ aparte.

2.1. Terminologio-normigo Internacia

2.1.1. ISO TC 37 kaj ĝiaj rekomendoj

Kiam Wüster mortis 1977 li postlasis ne nur la jam menciitajn 667 titolojn, kiuj portas lian nomon, sed i.a. ankaŭ kolektivan verkaron, por kiu li fakte estis „krea motoro": la sep rekomendojn de la teknika komitato por terminologio (principoj kaj kunordigo), ISO/TC 37. Tiuj sep regularoj detale konsilas, kiel verki (laŭ internaj kaj eksteraj vidpunktoj) norm-terminarojn. Momente 6 el ili estas en revizio.

2.1.2. Infoterm, TermNet k.a.

La lasta kreaĵo de Wüster estis terminologia inform-centro, kiu post longjara klopodo estiĝis laŭ kontrakto inter Unesko kaj la Aŭstra Norm-instituto: 1971 en Vieno fondiĝis Infoterm[8] kaj Wüster gvidis ĝin ĝismorte. (De tiam lia plurjara kunlaborinto, Helmut Felber, estas ĝia direktoro) 1981 Infoterm transprenis la wüsteran bibliotekon, kiu estas bazo kaj kerno de tiu unika centro por dokumentado, esploro kaj informado pri terminologiaj problemoj. Ĝi regule eldonas „Infoterm Newsletter" kaj, pli ampleksе, „Infoterm Series".
Por ebligi mondvastan kunordigadon de terminologiaj aktivecoj, Infoterm 1977 starigis TermNet[9], internacian reton kun komplekse strukturita laborprogramo. Infoterm kunlaboras kun ĉiuj terminologiaj centroj – inter kiuj Sovetunio kaj Kanado estas la plej gravaj. Gvide ĝi kunlaboras en ISO/TC 37 (kies laborgrupo 4 ekz. okupiĝas pri komputil-apogoj por terminologio kaj leksikografio. Jam ekzistas internacia normo pri interŝanĝ-formato por terminologiaj/leksikografiaj datumoj – MATER – por ebligi datum-interŝanĝon inter la multnombre estiĝantaj elektronikaj terminaraj datumbankoj).

2.2. Normigo en Esperanto

2.2.1. Tradicioj

Klopodoj pri unuecigo kaj laŭplana evoluigo de la faka leksiko en Eo havas tradicion. ISAE pli ol la Akademio komprenis la gravecon de konscia lingvo-planado en planlingvo sur scienc-teknika tereno. La komunan Terminologian Centron gvidis en la sesdekaj jaroj *R. Haferkorn.* Li eĉ korespondis kun Wüster. En la 70aj jaroj *R. Eichholz* transprenis tiun taskon. Per propra presejo li eldonis multajn interesajn materialojn kaj per lia promesplena „Slipara vortaro" realiĝis unu el la progresitaj proponoj de Wüster, nome pri „slipigeblo" de terminaroj!
Sed vivanta izolite en Kanado kaj sen iu materia subteno flanke de la Eo-movado li ne povis malhelpi la rapide akcelantan „sovaĝan" kreskadon de diversfakaj, diversspecaj kaj tre diversnivelaj terminaroj. Longjaraj ambiciaj projektoj de unuo-

puloj, paralelaj klopodoj de pluraj samfakuloj (eĉ samlandanoj) same karakterizas la situacion kiel rapide fabrikitaj vortlistoj kaj Eo-partoj en plurlingvaj, ofte altrenomaj (kaj longdaŭraj!) fakvortaroj. Minacis kaoso – kaj perdo de lasta ŝanco akceptigi Eo-n kiel seriozan sciencan interkomunikilon.

2.2.2. Provo de sinhelpo: la Terminologia Sekcio

Pro tio – sen sufiĉe longa kaj profunda antaŭpreparo kaj sen helpo flanke de la oficiala movado (UEA donis permeson, sed neniun subtenon). 1982 estiĝis TeS, la Terminologia Sekcio de UEA, kiu komence nur povis averti pri la danĝeroj de „iu ajn" termino-fabrikado kaj kontaktigi samfakulojn por interŝanĝi spertojn kaj opiniojn pri fakaj temoj kaj tiel antaŭprepari estontan terminografian laboron. Nur post tiu „unua helpo" la iniciatintoj povis ekokupiĝi pri teoriaj instruoj de Wüster kaj praktikaj ekzemploj de estiĝantaj internaciaj strukturoj.
En preparo estas nun kelkaj bazaj dokumentoj. Por pli vasta diskuto prepariĝis ekzemple norm-propono pri la procedo de terminarfarado kaj alia pri la aspekto de estontaj Esperantaj Normoj. Tiuj normoj fakte celas apliki la rekomendojn de ISO k.a. al la konkretaj bezonoj de Eo.

3. Komunaj trajtoj: problemoj kaj tendencoj

Rigardante la evoluon kaj la aktualan situacion en ambaŭ sferoj oni konstatos, ke problemoj kaj tendencoj tre similas. I.a. ili estas:
- la vetkurado kun la *scio-eksplodo*
- la kreskanta bezono pri *normigitaj terminaroj*
- la *konflikto* inter *lingvistoj* kaj *teknikistoj* (solvita per:)
- la *pioniroj:* Wüster, Drezen k.a.
- la tendenco de nura *registrado* de terminoj al racia *planado* (normigo)
- la tendenco, unue okupiĝi pri objektoj kaj procedoj en *teknikaj* kaj *naturscienca*j fakoj kaj nur poste pri *sociaj sciencoj*
- la tendenco de *izolitaj klopodoj* de personoj, organizaĵoz kaj nacioj transiri al regiona kaj tutmonda *kunlaboro* (centrigo kaj retigo)
- la tendenco de *kolektado/dokumentado* al *esploro kaj teoriigo* por ebligi *instruadon/trejnadon*
- la tendenco ankaŭ nocie *diferencigi* inter *teorio* (termino*logio*) kaj *praktiko* de terminarfarado (termino*grafio*)
- la tendenco al utiligo de la *progresanta tekniko:* de „elektronika vortaro" (vort-banko) al terminara dato-banko (kun unuecigita „formato" por interkomputila dat-interŝanĝo.

4. Perspektivoj

4.1. Naturalisma tento: Babel, Stoberski, IOUTN[10]

Por faciligi la respondecplenan laboron de tradukistoj, FIT[11] en sia internacia revuo BABEL ekde 1977 aperigas konstantan rubrikon pri internacia scienca terminaro – neologismoj en unifikado („International Scientific Terminology – neologisms in the course of unification"). Ordigite laŭ fakoj tie estas listigitaj sciencaj neologismoj kun angla difino kaj ekvivalentoj en multaj lingvoj, inter ili dum pluraj jaroj: Eo kaj Ia (Interlingua). La esperantajn vortojn kompilis, resp. kreis J. Uspienski. Redaktoro de la tuta rubriko estas Z. Stoberski (kiu konsekvence ankaŭ instigis la starigon de Internacia organizo por unifikado de terminaj neologismoj: IOUTN (sub la aŭspicio de Unesko). Ĝian 1an plenkunsidon la nova institucio havis en 1982, sidejo estas en Varsovio, la prezidanto: Z. Stoberski.)
Celo de ĉiuj klopodoj: Unuecigi kaj internaciigi terminojn, speciale neologismojn. Tiuj vortoj laŭeble estu la samaj en laŭeble multaj lingvoj.

La fakto, ke Eo samrajte „marŝas" inter la ceteraj lingvoj, signifas honorigan akcepton, kiu unuavide ĝojigas esperantiston: jen – nia lingvo estas kiel ĉiuj lingvoj! El la ĝojo sekvas la tento: por teni nian samrajtan lokon, ni sampaŝe marŝu en la vico kaj rezignu pri niaj „ekstravagancoj": se ekzemple la internacia vorto estas „concentration" (aŭ simile) – kial sole ni devas diferencigi inter koncentriĝo, koncentrado kaj koncentriteco? Se evidente aliaj lingvoj ne bezonas tian diferencigon?

4.2. Regulecaj modifoj: DLT

Sed ankaŭ el alia direkto venas delogo. Ĉi-tie nek estas eblo nek neceso detale priskribi la projekton de „distribuita lingvotradukado", kiu meritas nian plenan atenton kaj ĉiun eblan subtenon. Nur tiom: kiel „Interlingvon" la sistemo utiligas modifitan Eo-n. La modifoj necesas por plue reguligi la jam regulan planlingvon, por forigi laŭeble plej multajn ambiguecojn. El DLT-vidpunkto la reguleco de Eo kaj la supre menciita diferencigo do estas avantaĝoj. La tento por ni: kelkaj el la modifoj estas tre simpatiaj, kiel la solvo de la „seksa problemo" per nova pronomo „hi" kaj pluraligo per „hili, ŝili, ili" . . .
Jam ekestas tiaj opinioj: jen estas nova lingvo, pli taŭga, pli moderna ol Esperanto! Ni lernu la Interlingvon de DLT – por ŝpari en nia estonta teletekstilo la cel-lingvan modulon!

4.3. Memkonscia kaj akceptema: planlingvo por la 3a jarmilo

Kion do fari? Ĉu sekvi la naturalisman vojon: strebi al eble plej granda simileco kun „ .turaj" (plejparte latinidaj) lingvoj – kio garantius „tujan rekoneblecon far klera mezeŭropano" kaj la rajton resti „sama inter samaj" – aŭ modifi la parolatan lingvon al senambigua, plene regula sistemaĵo por senpere kaj senprobleme komuniki kun komputilo? Verŝajne ni devos serĉi vojon en la mezo: kun komprenemo ni interesiĝu pri evoluo kaj progresoj sur internacia ebeno, ni pripensu kaj pridiskutu ĉiun seriozan proponon por perfektigo kaj pluevoluigo de Esperanto, sed tre zorgeme kaj en ĉiu unuopa kazo konsiderante ĉiujn vidpunktojn (kaj la principojn de terminologio!) ni elektu la koncernajn solvojn.
Ni konsciiĝu, ke Esperanto ne estas *iu ajn lingvo*, ke ĝia tasko ne estas imiti aliajn lingvojn, sed funkcii kiel internacia komprenilo. Ni konsciiĝu, ke Eo estas *homa* lingvo, destinita por ebligi senperan kontakton inter malsamlandanoj.

5. Resume: 4 tezoj

1. Terminologio Internacia (TI) kaj Terminologio Esperanta (TEo) havas *komunan devenon* (la pioniraj laboroj de Wüster kaj Drezen).
2. TI kaj TE havas la *saman celon:* faciligi internacian fakan komunikadon.
3. TEo povos ŝpari fortojn, tempon, monon per *utiligo de TI-spertoj kaj rekomendoj:* principoj, nocio-sistemoj, norm-terminaroj k.t.p.
4. Kunlaboro eblus en du etapoj:
4.1. Eo-movado organizas siajn fortojn por daŭrigi la promesplenajn komencojn de la 50aj jaroj kaj ricevi konekton al TI;
4.2. en la plua evoluo de TI Eo okupu sian lokon samrajtan *apud aliaj lingvoj* – sed konsidere sian specifan rolon kaj *laŭ ĝia propra karaktero.*

6. Mallongigoj:

[1]) *ISA:* International Federation of the National Standardizing Associations (Internacia Federacio de la Naciaj Normigaj Asocioj)
[2]) *ISO:* International Standardizing Organization (Internacia Normiga Organizo)

[3]) *IEC*: International *E*lectrotechnical *Com*mission (Internacia Elektroteknika Komisiono)

[4]) *ISAE*: *I*nternacia *S*cienca *A*socio *E*sperantista

[5]) Eo: Esperanto, Laŭ ISO R 639 (1969)

[6]) *GTT*: *G*eneral *T*heory of *T*erminology (Ĝenerala Terminologio-Teorio)

[7]) *ÖNA*: *Ö*sterreichischer *N*ormen*a*usschuß (Aŭstra Norm-Komitato)

[8]) *Infoterm*: International *Info*rmation Centre for *Term*inology (Internacia Inform-Centro por Terminologio)

[9]) *TermNet*: Info*term* *Net*work (Infotermreto)

[10]) *IOUTN*: *I*nternational *O*rganization for *U*nification of *T*erminological *N*eologisms (Internacia Komitato por unuecigo de terminaj neologismoj)

[11]) *FIT*: *F*édération *I*nternationale des *T*raducteurs (Internacia Federacio de Tradukistoj)

[12]) De – Deutsch (Germana) vd. 5!

7. Literaturo:

BABEL – revue internationale de la traduction ISSN 0521, jarkolektoj 1977–83

Blanke, D.: Plansprachen in Theorie und Praxis, Akademie-Verlag Berlin 1985 (aperonta)

Dehler, W.: Terminologio Internacia – radikoj, tendencoj kaj rilatoj al Esperanto; en „SAEST 1984", Brno 1984, p. 99–106

Drezen, E.: Normigo de la teknika lingvo dum kapitalismo kaj socialismo; en: LA NOVA ETAPO 1932, n-ro 4, p. 161–66

Drezen, E.: Pri problemo de internaciigo de science-teknika lingvo, Moskvo 1935 (represo Saarbrücken 1983)

Eichholz, R.: Ĉu internacia ne-reguleco aŭ ne-internacia reguleco? en: AKADEMIAJ STUDOJ 1985, Bailieboro 85, p. 180

Malovec, M.: ISO – modelo por nia normiga laboro; en „SAEST 1984", Brno 1984, p. 107–111

Nedobity, W.: The key to International Terminology; en: Infoterm Series 7 – Terminologies for the Eighties, München 1982; p. 306–13

Olde Kalter, A.: DLT and Terminology – BSO/Research, Utrecht 1984

Plehn, H. J.: Infoterm, lasta kreaĵo de prof. Wüster; en: Apliko de Eo en Scienco kaj Tekniko (SAEST), Žilina 1981, 1a vol., p. 21 ĝis 26

Plehn, H. J.: Terminologio, Internacia Scienco – prelego dum seminario „Aktualaj problemoj de scienc-teknika apliko de Eo", Bad Saarow 1982 (multobl. manuskripto)

Uspienski, J.: Interparolo kun prezidanto de Internacia Organizaĵo por Unifikado de Sciencaj Neologismoj (IOUNT) Zygmunt Stoberski (Manuskripto de radio-intervjuo en RADIO POLONIA 85-02-22, 22,30 MEZ)

Witkam, A. P. M.: DLT – Distributed Language Translation BSO, Utrecht 1983

Wüster, E.: Enciklopedia Vortaro, A-korno, Leipzig 1923

Wüster, E.: Internationale Sprachnormung in der Technik, Berlin 1931 (3a eld. Bonn, 1970)

Wüster, E.: Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko, Dansk Eo-Forlag, Aabyhøj 1936 (represo 1975)

Wüster, E.: Einführung in die Allgemeine Terminologielehre und Terminologische Lexikographie, Wien 1979

Fritz Wollenberg

La realismo de revulo

Pri la historie optimismaj tendencoj en la pensado de Zamenhof

En la jaro 1916, kelkajn monatojn antaŭ lia morto, – la unua mondmilito jam 2 jarojn furiozis – la grave malsana Zamenhof sciiĝis, ke jus naskita infano estis ricevinta liajn antaŭnomojn. Al la gepatroj li skribis vortojn, kiuj malkaŝis liajn samtempajn senesperon kaj optimismon: „. . . Miaj antaŭnomoj, kiujn vi donis al li, alportu al li feliĉon kaj ili memorigu lin ĉiam al tiuj idealoj, por kiuj mi beaŭrinde ne povis fari multon, sed por kiuj mi ĉiam volis labori."[1] *Tiuj vortoj enhavas la konfeson, ke Zamenhof praktike ne povis efektivigi siajn idealojn, sed esprimas ankaŭ la esperon, ke liaj idealoj estonte efektiviĝos.*

Kiuj estis tiuj idealoj, por kiuj Zamenhof ĉiam volis labori? Kial li ne povis ĝisvivi ilian efektivigon, kaj de kie devenis liaj optimismaj esperoj?

Mi provas kontribui al la kompreno de tiuj demandoj per la sekvaj pensoj.

1. La konscienco de Eŭropo

Nur malmultaj elstaruloj kun humanisma pensmaniero restis fidelaj al siaj demokrataj kaj kontraŭmilitarismaj sintenoj post la eksplodo de la mondmilito en la jaro 1914. Unu el ili estis la iniciatoro de la burĝa demokrata Esperanto-movado, Zamenhof, kiun surprizis la militkomenco en la germana urbo Kolonjo.[2] Survoje al la 10-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, al festo de popolamikeco, li ne volis kredi la sciigon, ke liaj plej abomenindaj malamikoj – la ŝovinismo, rasismo kaj militarismo – nun festas triumfojn. Fizike kaj psike rompita li revenis al Varsovio, de kie lia lasta apelo al prudento kaj moralo eksonis, lia alvoko al la diplomatoj titolita „Post la Granda Milito".

Granda parto de la burĝa intelektularo subtenis la militpolitikon de sia respektiva registaro, same kiel la grandburĝaro estis subtenita de dekstraj gvidantoj de la laborista movado. Famaj germanaj artistoj, verkistoj, sciencistoj kaj teologoj subskribis la ŝovinisman „Alvokon al la kultura mondo", kiu ripetis la mensogon pri defenda milito, defendis la rompon de belga neŭtraleco, pravigis la krimojn de la germanaj trupoj en Belgio kaj laŭdis la germanan militarismon kiel gardanton de la germana kulturo.[3] Sub tiu demagogia alvoko ni trovas la mondkonatajn nomojn de Max Liebermann, Wilhelm Röntgen, Max Planck, Hermann Sudermann kaj de multaj aliaj, eĉ la nomon de Wilhelm Ostwald, kiu fervore laboris por la disvastigo de la internacilingva ideo.[4] En Francio la ŝovinismaj sentoj de intelektuloj ne estas pli malfortaj. La 70-jara Anatole France libervole anoncis sin al la fronto.[5]

Malgranda estis la nombro de la pacamikoj en la vico de la burĝa intelektularo, kiuj kuraĝe kontraŭstaris ŝovinismon kaj militarismon. Zamenhof starigis sin per sia en 1915 publikigita alvoko en la vicon de tiuj burĝaj demokratoj, kiuj fariĝis la konscienco de Eŭropo. Romain Rolland, la granda franca verkisto, pritaksis tiun militon kiel la „plej grandan katastrofon de la historio de post jarcentoj", kiel „disrompiĝon de niaj plej sanktaj esperoj al frateco de la homoj."[6] Zamenhof kondamnis la militon sammaniere kiel „grandamasan reciprokan buĉadon, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon", kiel „plej ekstermantan militon, kiun iam konis la historio".[7] La postulon krei post la milito „ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso"[8] ni trovas en la Zamenhofa alvoko same kiel en la alvoko „Al la Eŭropanoj", kiun nur 4 germanaj intelektuloj kuraĝis subskribi, inter ili la genia Albert Einstein. En tiu alvoko tekstas „ke kleraj viroj de ĉiuj ŝtatoj uzu sian influon por tio, ke – kiel necerta la rezulto de la milito ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ estas – la kondiĉoj de la paco ne estiĝu la fontoj de estontaj militoj, . . .".[9]

Same kiel aliaj burĝaj demokratoj Zamenhof ligas tiun postulon kun la espero pri burĝa demokrata aliformigo de la socio. Li prave nomas kiel kaŭzon de la milito „la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj" ne atentante, ke tiu nur estas unu kaŭzo,[10] kaj li konkludas, ke malebligo de nova milito nur eblas, se estos efektivigata la egalrajteco de ĉiuj gentoj. Tiun ĉefan postulon li ligas kun la postulo pri burĝaj liberoj, ekzemple la liberan uzon de la lingvoj kaj liberan konfeson de religioj. Sed tio por li nur estas antaŭkondiĉoj por atingi la grandan celon de interfratigo de la homaro. „Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj." La efektivigon de antaŭkondiĉoj li atendas

de la diplomatoj, al kies prudento kaj moralo li apelacias. La duan taskon devus laŭ li plenumi „personoj privataj" per „predikado, edukado, alkutimigado ktp.".[11]
Do Zamenhof dividas la celojn en nuntempaj – la burĝa demokrata aliformigo de la socio – kaj en longtempaj – la interfratigo de la homaro.
Evidente li ankaŭ en tiu senesperiga tempo ne rezignis pri sia vizio de estonta homara socio, en kiu „la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj", en kiu „Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudadi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, . . . ", en kiu „ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas".[12]

2. Pri patriotismo

Stefan Zweig diris pri Rolland, ke tiu „kiel neniu alia verkisto de tiu tempo interne estis preparita al la milito kaj al ĝiaj problemoj".[13] Ankaŭ la sinteno de Zamenhof dum la milito havas la radikojn en la tempo antaŭe. Siajn politikajn konvinkojn li nelonge antaŭ la milito resumis en la „Deklaracio pri Homaranismo". En tiu deklaracio li esprimas, kiamaniere li solvis por si mem la kontraŭdiron inter patriotismo kaj humaneco. Jam en 1905 en letero al Michaux Zamenhof parolis pri tiu interna kontraŭdiro: „Mi volis nur diri al Vi, ke kvankam de mia infaneco en mi ĉiam superregadis la 'h o m o', tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekiĝadis la 'p a t r i o t o', kiu terure bataladis en mia koro kontraŭ la 'h o m o'."[14]
La Zamenhofaj internaj kontraŭdiroj respegulas la kontraŭdirojn en la tiama de rusa carismo regata parto de Pollando. La carismo terure subpremis multajn naciecojn kaj gentojn. Ĝi incitis naciismon kaj ŝovinismon, por eviti komunan revolucian bataladon de la subprematoj. Sub tiuj kondiĉoj ankaŭ la naciismaj tendencoj interne de la burĝaro de subpremataj popoloj plifortiĝis. Sub la impreso de la antisemitismo kaj de kruelaj progromoj kontraŭ la judoj Zamenhof dum siaj studentaj jaroj de 1882 ĝis 1885 partoprenis cionistan agadon.[15] Li atendis de tiuj naciismaj ideologio kaj politiko plibonigon de la vivkondiĉoj por la judoj, sed baldaŭ deturnis sin unue praktike, poste ideologie, de ĝi ekkoninte la imperiisman karakteron de cionismo. En la „Alvoko al la juda intelektularo" en 1901 li rifuzis la ideon de juda ŝtato en Palestino[16], kaj en artikolo „Pri la homaranismo" en 1906 li pli akre kondamnis la opinion, ke „en Palestino iam devas mastrumi nur la hebreoj" kiel unu de la „sensencaj kaj senmoralaj . . . barbartempaj kaj dumezurilaj politikaj principoj".[17]
Zamenhof ne ekkonis la ekonomiajn kaj klasajn radikojn de la cionismo, sed ĝi kontraŭis eĉ al lia etburĝa demokrata antiimperiisma klaspozicio. Li atingis la konvinkon, ke patriotismo inkluzivas „la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas", sed ne „La servadon speciale al la interesoj de unu gento aŭ la malamo kontraŭ alihejmuloj".[18] Tiu kompreno de burĝa patriotismo lin kondukis dum la unua mondmilito al la flanko de veraj patriotoj.
En la nomo de tiu patriotismo li postulis la egalrajtecon de ĉiuj gentoj de ĉiu lando kaj kondamnis la „premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso".[19]

3. Aliancano de la laborista movado

La nacia demando, pri kies solvo Zamenhof „ĉiam volis labori", sed „ne multon povis fari" preskaŭ la saman tempon de 1894 ĝis 1922 estis pritraktata en pli ol naŭdek skribaĵoj de lia samtempulo Lenin.[20] Antaŭ la unua mondmilito Lenin speciale atentis tiun problemon. Fine de 1913 kaj komence de 1914 li verkis la skribaĵojn „Kritikaj rimarkoj pri la nacia demando" kaj „Pri la memdecida rajto de la nacioj", en kiuj li formulis la bazajn tezojn de la nacia programo de la bolŝevikoj en la periodo de la burĝa demokrata revolucio. Nehazarde ni en tiuj artikoloj de Lenin retrovas demokratajn postulojn de Zamenhof, memkompreneble de tute alia vidpunkto de la laborista klaso kaj sur scienca bazo. Lenin ekzemple ligas sian postulon pri samrajteco de la nacioj kun la sekurigo de la rajtoj de la nacimalplimultoj. Tio estas ĉefa postulo de Zamenhof ankaŭ. Ankaŭ por la laborista movado la naciismo estis granda danĝero. Neproletaraj demokratoj kaj komunistoj de iliaj diversaj klaspozicioj batalis kontraŭ la samaj malamikoj – naciismo, ŝovinismo, koloniismo. Tiel Zamenhof estis objektive aliancano de tiu klaso, kies historia misio ankaŭ inkluzivas la efektivigon ne nur de liaj demokrataj postuloj, sed ankaŭ de lia vizio pri justeca kaj paca, vere humanisma, socio. Li mem sentis la proksimecon al la laborista klaso ne nur pro sia profunda kono de la malriĉuloj en Varsovio, al kiuj li servis kiel kuracisto, li konsciis pri la demokrataj tradicioj de la laborista klaso, se li opiniis, ke „por neniu la lingvo internacia kaj la esperantismo havas tiel grandan gravecon kiel por la laboristoj kaj por tiu ideo por kiu ili batalas".[21]
La laborista Esperanto-movado ne nur uzis la de Zamenhof iniciatitan lingvon por siaj klasbatalaj celoj, ĝi ankaŭ komencis kritike alproprigi al si la Zamenhofan idean heredaĵon. En redakcia angulo de speciala Zamenhofa Numero de la SAT-organo „La nova epoko", de decembro 1929, ni trovas la frazon: „Ju pli profunde ni esploras la personecon de Zamenhof, des pli bone ni povos kompreni la esencon de la movado, kies iniciatinto li estis." Oni kritike rimarkas: „. . ., nun pli kaj pli evidentiĝas la ideologia malproksimeco de Zamenhof for de la klasbatalaj pozicioj de la mondproletaro." Kaj en la poemo „Al Zamenhof" ni legas:

„Kaj jen, partoprenante tiun klasbatalon,
Repuŝas ni internideon vian for,
Sed tamen vian noblan idealon
Ni realigos per alia voj-labor'."[22]

Memkompreneble la laborista movado distanciĝis de la iluzioj de Zamenhof pri la eblecoj de la burĝa socio. Al la idealoj de Zamenhof, kiujn li nur povis motivigi per forigo de „nenatura" kaj „nenormala" stato de la socio, la marksisma mondkoncepto donis realan sciencan bazon kaj la historian optimismon pri ĝia efektivigo.
Kio ĉe Zamenhof estis revo kaj espero nun estiĝis reala certeco.
Kaj ne hazarde je la flanko de la laborista movado denove ni trovas la neproletarajn demokratojn, kiuj dum la unua mondmilito kiel Zamenhof rezistis al ŝovinisma propagando de la imperiismaj fortoj. Romain Rolland, la granda amiko kaj defendanto de Sovetunio en Francio, prezidis en 1922 en Frankfurt/M kaj Albert Einstein, la respondecplena natursciencisto, en 1923 en Kassel, honore la internaciajn kongresojn de SAT.

4. Por la venko de la prudento

Hodiaŭ, en nia tempo de minacata paco ŝajnas al mi konvene, memorigi pri la bazo de la Zamenhofa optimismo, pri lia orientiĝo al humanismaj celoj, pri lia fido al socia progreso kaj pri lia aliancaneco al progresemaj fortoj, pri lia profunda fido al prudento kaj moralo de la homo.
Lia apelo en 1915 ne estis atentata en Versailles en 1919. Tie kunvenis „asocio de la rabistoj" (Lenin) por dispartigi la kaptaĵon laŭ imperiisma maniero. Tie la diplomatoj ne fondis la de Zamenhof atenditan firman pacon, sed interkonsentis militgravedan rabpacon kaj la intervenadon en Sovetrusion.[23] Zamenhof ne plu travivis tiun sperton. Li mortis antaŭ la fino de la milito.
Li ankaŭ ne ĝisvivis la komencon de la realigo de siaj idealoj en Sovetrusio sub gvido de Lenin. Ni scias, ke la plifortigo de Sovetunio kaj poste de aliaj socialismaj ŝtatoj kaŭzis novajn internaciajn rilatojn ankaŭ inter ŝtatoj de diferencaj socisistemoj. Ĝi ebligis la venkojn de la prudento en 1945 kaj 1975.
En 1945 estis venkita la krima faŝismo fare de la ŝtatoj de Anti-Hitler-Koalicio, el kiuj Sovetunio la plej grandan kontribuon faris.

En 1975 en Helsinki estis stabiligitaj la paco kaj sekureco en Eŭropo.

Por venki la danĝeron de nuklea milito hodiaŭ ni bezonas koalicion de prudento de ĉiuj porpacaj fortoj.

Laŭ spirita tradicio de Zamenhof multaj esperantistoj pledas por tiu koalicio kaj agas por ĝi. Speciale la Mondpaca Esperantista Movado multflanke kunlaboras por tiu celo bone sciante, kiuj estas la fortoj de paco kaj kiuj estas la fortoj de la instigo de vetarmado.

En ĝia informilo „La pacaktivulo" Clement Tholet kaj William Gilbert je la nomo de la belga kaj franca delegitaroj en Pardubice respondis al vizitanto de tiea pacrenkontiĝo el FRG, kiu same pritaksis la politikon de Sovetunio kaj de USONO, jenon:

„Ĉu vi vere kredas, ke ambaŭ superpotencaj ŝtatoj povas dors-aldorsiĝi pri la armila konkuro?

Reprenu laŭtempe la tutan vicon de la proponoj faritaj dum pli ol tridek jaroj tiuteme kaj vi konstatos, ke 1e la progresoj koncerne la detrupovon de la nuklea armilaro ĉiam unue devenas el USONO; 2e ĉiuj malstreĉigaj proponoj kaj konsiliigoj devenas unuavice el Sovetunio; 3e propono unuflanke decidita de Sovetunio kaj forĵetita, kiel senvalora fare de USONO, estas ne unuafrape uzi la atoman armilon."[24] En la spirito de Zamenhof ili staras je la flanko de progresemaj fortoj, kaj efektivigas la apelon al prudento kaj moralo.

5. Literaturo kaj fontoj

[1]) L. L. Zamenhof: Originala Verkaro, Eld. J. Dietterle, Leipzig, 1929 (OV), p. 585

[2]) M. Boulton, Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto, La Laguna 1962, p. 222 kaj sekve

[3]) W. Gutsche/J. Petzold, Von Sarajevo nach Versailles, Berlin 1985, p. 73

[4]) J.-P. Domschke/P. Lewandrowski, Wilhelm Ostwald – Chemiker, Wissenschaftstheoretiker, Organisator, Leipzig – Jena – Berlin 1982, p. 62, 100–104

[5]) T. Motyljowa, Romain Rolland – eine Biografie, Berlin und Weimar 1981, p. 158

[6]) T. Motyljowa, Romain Rolland . . ., p. 158

[7]) OV, p. 354

[8]) OV, p. 357

[9]) Sturm läutet das Gewissen – Nichtproletarische Demokraten auf der Seite des Fortschritts, Berlin 1980, p. 276

[10]) OV, p. 357

[11]) OV, p. 356

[12]) OV, p. 383

[13]) S. Zweig, Romain Rolland, Der Mann und das Werk (1921), citita en: T. Motyljowa, Romain Rolland . . ., p. 418

[14]) Leteroj de L. L. Zamenhof, Eld. de G. Waringhien, parto I 1901–1906, Paris 1948, p. 110

[15]) Ludovikito (= Ito Kanzi), Senlegenda biografio de L. L. Zamenhof, Tokio 1982, p. 221 kaj sekve

[16]) L. Zamenhof, Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj alvoko al la juda intelektularo, Eld. de A. Holzhaus, 1982, p. 129

[17]) OV, p. 333

[18]) OV, p. 341

[19]) OV, p. 340

[20]) R. Stoljarova, Einführung in Lenins Schriften „Kritische Bemerkungen zur nationalen Frage" und „Über das Selbstbestimmungsrecht der Nationen", Berlin 1984, p. 11

[21]) La Kulturo, I, 2 de februaro 1912, Prago, citita en: C. Murgin, L. L. Zamenhof dum la revoluci-prepara periodo (1910–1914), en: GDR-eldono de „Paco", Berlin 1981, p. 34–35

[22]) La nova epoko – monata organo de SAT, jaro VII/XI No 3 (75), de decembro 1929

[23]) G. Fuchs/H. Henseke, Georges Clemenceau – eine politische Biografie, Berlin 1983, p. 130

[24]) C. Tholet/W. Gilbert, Al Sinjoro Rudolf Fischer, en: La pacaktivulo, N-ro 138/1985, p. 33

Redakta Komitato de la oficiala serio de „Paco" (Sofio):

Violin Oljanov – ĉefredaktoro (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldřich Knichal (ČSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguen Hai Trung (Vjetnamio)
Boleslav Staszczak (Pollando)

Atentigo:

La redakcio atendas kontribuaĵojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitajn liniojn, nur en gravaj kazoj – ĝis 90. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj marĝeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpado. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! Por ke la materialo atingu la redakcion ĝustatempe, ĝi devas esti je ĝia dispono ĝis la 10a de ĉiu para monato. La redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

Kien skribi:


Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vhod 2, 1113 Sofia, Bulgario
Prezidanto: D-ro Imre Pethes, H - 1940 Budapest VI, Nepköztarsasag utja 73, Hungario
Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, Moskva K-9, USSR
Glady Claude, 36 Marne str., B - 1030 Bruxelles, Belgio
Ĝenerala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 Tour, Francio
Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26 Zyôto-ku, Osaka, Japanio
Dimitr Haĝiev, kompl. „Lenin", bl. 4, 1504 Sofia, Bulgario
Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, bulv. Emil Markov, p. k. 66, 1404 Sofia, Bulgario
Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-komitato, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia, Bulgario
Centra kasisto: (por okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 Grand Quevilly, Francio

Kie aboni:

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St., Buderim Qld. 4556
Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A - 1200 Wien AŭS 130
Belgio: Glady Claude, 36 Marne str., 1030 Brüssel
Berlino Okcidenta: Roland Schnell, Wilhelmshavener Str. 25, 1000 Berlin 21 (Postĉekkonto Stgt 137769-701) DM 15,–
Brazilo: F-ino Elma Nascimento, str. D. Claudina n-ro 100, apt. 402 Meier Rio de Janeiro, RJ-CEP 20, 721 3491,77 kruzejro
Britio: Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresly Grimsby, South Humbertide DN 36 5RT £ 4,–
Bulgario: Bulgara MEM-Komitato, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia 3 levoj
Kolombio: S-ino Leonor Calvo y Fejöo K 22 34-12 piso 4o, Bogota
Ĉeĥoslovakio: PNS Vinohradska 46, 12043 Praha 2 42 kronoj
Por la kromaj (naciaj) numeroj: ĈEA, Jilska 10, 11000 Praha 1 16 kronoj
Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK - 2700 Kobenhaven BRN 50 dkr
F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schloßgasse 30, D - 6738 Elmstein DM 15,–
Finnlando: Erkii Jarvinen, Ukonkivenpolku 2-1-73, 01610 Vantaa 61 30 fin. m.
Francio: Joseph Barre, 10 rue du Sénat, 44300 Nantes 50 fr. fr.
GDR: a) Post- und Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb d. PZV, 7900 Falkenberg, Uebigauer Str. 4, b) por la landaj eldonoj: Esperanto-Asocio en KL de GDR, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60 36 m.
Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, Sabadell (Barcelona)
Hungario: Hungara MEM-Komitato, H - 1368 Budapest 5, pf. 193 36 ft.
Italio: Ricardo Pinori, V. le Ghisleri 9/15, I - 00176 Roma (p. ĝ. k. 64882004)
Japanio: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26 Zyôto-ku, Osaka
Kubo: Kuba Esperanto-Asocio, Pac.-Sekcio, p. k. 2018, Havana-2
Nederlando: S-ino J. Vries-van Leeuwn, Johan Vermeerstr. 32, NL - 1741 K. K. Schagen, p. ĝ. k. 5569309 20 gld.
Norvegio: Olaf Reiersol, Torodveien 109, N - 3135 Torod
Pollando: RUCH – WARSZAWA
Portugalio: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6 RC A-Lisboa 460 escud.
Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C., ap. 11, R - 1900 Timisoara
SRV: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107, Quan Thanh, Hanoi
Sovetunio: ASE, Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, 103885 GSP, Moskva K-9, prosp. Kalinina 14 1,80 rbl.
Svedio: Tomas Jansson, Döbelnsgatan 24, S - 75223 Uppsala
Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave. Oak Park IL 60304 8 dol.
Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto . . . vd. maldekstre)

Grave!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 Sofia, bulv. Ĥristo Botev 97 (por „Paco"). El nesocialismaj landoj – al la adreso de la Centra kasisto – 50 fr. fr.
Tiun ĉi numeron redaktis:
D-ro Detlev Blanke



(Ni nur publikigos tajpitajn korespondpetojn)

Brazilo

Luis Fernando Silveira, Rua Leo Vitor 90, Jardim, Itaguacu, Florianópolis, 88000 Sta. Catarina, 12j., dez. kor., kol. pm

Bulgario

Instruistino dez. kor. pri literaturo, poezio: Elena Pavlova Gutman, 4003 Plovdiv, bul. Moskva 58 ap. 17

Instruistino, 30j., dez. kor. pri fremdaj lingvoj, literaturo, kol. bk: Cecka Velîĉkova, 4002 Plovdiv, Saturn 12

Oficistino, 30j., dez. kor. tutmonde kun virinoj pri literaturo, muziko, brodaĵoj, kol. bk: Veselka Nemceva, 5400 Sevlievo, Panajot kovaca 3

Instruistino de Junulara E-Societo „Juneco" dez. kor. tutmonde (30j.), ankaŭ por gelernantoj (4a–11a klaso) korespondamikoj estas serĉataj, skribu al: Maria Petkova Slaveva, 9700 Ŝumen, Iskra 22

Komencantoj el la urbo Ruse dez. kor.:
- Ivanka Borisova Todorova, 7012 Russe, str. „Pristaniŝtna" 11
- Dorinka Stojanova Dimova, 7012 Russe, str. „Parcevic" 14 (23j., instruistino)
- Ivanka Petkova Todorova, 7001 Russe, bl. Ĉiprovci 5, et. 14, ap. 5, kv. Rodina 2
- Katja Draganova Pejkova, 7002 Russe, str. Pliska, bl. Pârva prolet, 8 et. II
- Rosica Damjanova Atanasova, 7011 Russe, DZS
- Violeta Nikolova Velikova, 7001 Russe/ Tetovo, distr. Razgradski, str. Ĥr. Smirnenski 7 (flegistino)

Ĉinio

Bankoficisto, 24j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj pri fotografio, radio, lingvoj, kol. magazinojn, fotojn, bk, pm: Luo Liesi, Renmin-Lu 88, Neijiang, Sichuan, 641000

ĈSSR

Gelernantoj kun la komuna adreso: 04474 Perin okr. Košice dez. kor.:
- Ludmila Piklová (15j.)
- Kamil Goleňa (13j.)
- Žaneta Tzembecká (12j.)
- Gabriela Trembecká (15j.)

Aleŝ Ondrâĉek, Vyŝkovická 102, 70400 Ostrava-Zábřeh, dez. kor.

GDR

S-ro K. Irmscher, 9116 Hartmannsdorf, Feldstr. 21 (48j.) dez. kor. tutmonde pri sporto, kol. pm

Mi serĉas letergeamikojn: Sylvia Lassika, 1406 Hohen Neuendorf, Annemariestr. 3 (ĉe Berlin)

Lernanto, 17j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Stephan Trinkhaus, 2000 Neubrandenburg, Leninstr. 7d/13

Lernantino, 16j., dez. kor. kun gejunuloj el soc. landoj: Annett Heß, 1280 Bernau, Puschkinstr. 20

Lernantino, 16j., dez. kor. tutmonde: Ines Wilms, 1280 Bernau, Puschkinstr. 30

Studento, 20j., dez. kor. tutmonde pri fotografio, moderna muziko, bestoj, vojaĝoj: Ralf Haase, 2061 Möllenhagen, Neue Str. 5a

Komencantino, sekretariino, 35j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm: Sigrid Klingberg, 2031 Deven 20, Pf. 18

Helga Jäger, 2030 Demmin, Frauenstr. 5, (48j.) dez. kor. tutmonde

Flegistino, 57j., dez. kor. tutmonde pri vivo, E-movado, arabaj landoj: Ruth Hampel, 1055 Berlin, Paul-Grasse-Str. 34

Lutz Seupel, 1280 Bernau, Heinersdorfer Str. 33, 22j., dez. kor. tutmonde

Ulrike Hoppe, 9075 Karl-Marx-Stadt, Terrassenstr. 20, dez. kor. tutmonde pri literaturo, psikologio, muziko, lingvoj

Roland Schroepf, 1720 Ludwigsfelde, Clara-Zetkin-Str. 3: dez. kor. tutmonde pri filatelio, pop-muziko, E-movado

Petra Balzer, 7560 Wilhelm-Pieck-Stadt Guben, Cyrankiewiczstr. 11, dez. kor. tutmonde pri muziko, turismo, literaturo, medicino, E-movado

Kathrin Guski, 3014 Magdeburg, Helmholtzstr. 25, (21j.), dez. kor. pri bestoj (prec. hundoj), vojaĝoj, sporto

Andreas Dungert, 3027 Magdeburg, Albin-Brandes-Str. 3, 14j. lernanto, dez. kor. pri koresponda ŝako, kol. pm

Gundula Niewert, 3500 Stendal, Hans-Beimler-Ring 46, 34j. instruistino, dez. kor. pri literaturo, muziko, turistiko

Lernanto, 16j., dez. kor. tutmonde pri muziko, medicino, foto: Sven Korpjuhn, 2792 Schwerin, H.-Duncker-Str. 26

S-ro H. Bergner, 6840 Pößneck, Psf. 130, (31j.), dez. kor. kun soc. landoj pri fotografado, kuirado

Karin Schneider, 1260 Strausberg, Bahnhofstr. 9, Fachanlage 121/19, dez. kor. tutmonde pri muziko, libroj, vojaĝoj, E-movado

Germo Görtz, 1930 Wittstock, Kettenstr. 27 (19j.), dez. kor. pri amatora radiosporto, literaturo, muziko, kun esp. el soc. landoj

Junulo, 21j., dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, tendumo, sporto: Jens Schmidt, 2000 Neubrandenburg, Otto-Lilienthal-Str. 16

Edith Hähnsen, 3570 Gardelegen, Str. d. Befreiung 15, dez. kor. tutmonde pri turismo, E-movado

Isolde Böhme, 2851 Drefahl, Psf. 18, 34j., dez. kor. tutmonde pri literaturo-verkado

68j. pensiulino/instruistino dez. kor. p. ĉ. t.: Ingeborg Matthes, 1313 Wriezen, Frankfurter Str. 29

Apotekistino, 40j., dez. kor. p. ĉ. t.: Carola Schüler, 1313 Wriezen, Poststr. 4

Andrea Pockheiser, 7420 Schmölln, K.-Liebknecht-Str. 32, dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo, sporto

Hungario

Jószef Vigh, 3935 Erdöhorváti, Egves ut. 48, (17j.), dez. kor. pri filmoj, kol. diskojn, librojn

Győző Császár, 7627 Pécs, Körház tér 7, komencanto, dez. kor., kol. pm

Elektroinĝeniero, 46j., filatelisto, dez. kor. kun esp. el Dresden: Miklos Körmendi, Gizella u. 47. I. 12. 1143 Budapest

Szilvia Szabó, 2750 Nagykörös, Ceglédi u. 11/A, n.em. 18a, (12j.) dez. kor., kol. pm

Ester Müller, 8253 Révfülöp, Kóli ut. 51, (13j.), dez. kor., kol. bk.

Beatrix Kovács, 2750 Nagykörös, Esedi u. 54, (14j.), dez. kor.

Ildikó Irzák, 2500 Esztergom, Makarenko u. 1–3, kaj Éva Boda, 2659 Ersekvadkert, Rórsavölgyii u. 4, studentinoj en Pedagogia Altlernejo, dez. kor. kun gejunuloj el GDR pri libroj, fotoj, teatro, filmoj

Jugoslavio

Jasna Gluić, 58000 Split, Mirka Kovaĉevicá 21, (15j.), dez. kor. pri muziko, dancado, vojaĝoj, kino

Rumanio

35j. komputilisto dez. serioze kor. interŝ. pm, bk. Vojaĝonte al Braŝov povas helpi en pluraj manieroj, bv. sinanonci 2 monatojn antaŭe Ioan Vajda, B-dul Gârii nr. 30A, Bl. 225A, Sc. B. Ap-18, Braŝov 9

Komencanto, 28j., dez. kor. kun GDR-geesperantistoj p. ĉ. t.: Mihály Sándor, 4000 Sf. Gheorge, str. Berzei 12, ap. 4, Jud. Covasna

Korpkultura profesorino dez. kor.: Kornelia Nagy, 4150 Odorheiu Secuiesc intr. Garofitei 1, ap. 18, Jud. Harghita

Usono

Pensiulo dez. kor. kun kuracistino: Leon Montgomery, Box 932, Orlando, FL, 32802-0932

Soveta Unio

17j. junulino dez. kor. tutmonde pri muziko, lingvoj, kol. bk, pm: Danute Daĉiulyte, Lauko 66, 234880 Kupiŝkis

Ramutis Kilĉiauskas, 285300 Panevežys, Bites 11A-1, Litovio, (39j.) dez. kor. pri E-movado, radioelektroniko, muziko, kol. pm, diskojn, librojn, revuojn

Serĉas leteramikojn por siaj klubanoj E-klubo en Riga „Fenikso": 226050 Riga-50, p. k. 150 Latvio

Serĉas samfakulojn pri branĉoj de supera matematiko, prec. pri topologio tutmonde: 228700 Latvio Gulbene, str. Blaumann 28, s-ino Kozulina Aina

Kor. dez. el Estonio:
- 30 membroj p. ĉ. t.: Esperanto-Klubo, 202020 Kohtla-Järve, p.k. 34, 20–60 j.
- Esperanto-klasoj, 12–15j. gelernantoj: 200016 Tallinn, 10. Keskkool, Esperanto
- 13j. lernantino Merle Väljari, 200029 Tallinn, Mustamäe tee 177–57 pri filatelo, kol. bk

Eldoninto de tiu ĉi numero:

GDR-MEM-sekcio, Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Esperanto-Asocio). Redakcio: 1080 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 2 20 29 91. Respondeca redaktoro: D-ro Detlev Blanke. Redakcia komisiono: Ludwig Schödl, Rudolf Hahlbohm, Werner Pfennig. Redakcia fino: 31-a de junio 1985. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.
4405 - 36



(Foto: Zentralbild)